

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj
Anoncoj: Per 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 79 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 januaro 1927

CONGRESS IN RUSSIA.

Labour Esperantists' Visit to Leningrad.

The Sixth Esperanto Congress of Labour opened yesterday in Leningrad, and will continue until Tuesday. This is the first time that the Esperantists in Russia have invited a World Esperanto Congress to their country.

At least 340 internationalists are attending, among them being 30 Labour men and women from England who do not know a word of the Russian language. They will, of course, rely on Esperanto.

The Soviet Government has more than once shown its sympathy towards the world language. Last year it printed postcards with the Esperanto heading Post-karto. Later on it printed a postage stamp with an Esperanto wording in honour of Popov, the inventor of radio (Popov, la inventisto de Radio).

To celebrate the present congress, which is unique in the history of the Esperanto movement, the Soviet Government has printed a postage stamp almost entirely in Esperanto.

The English Esperantists who have decided to spend a holiday in Russia, left London on Saturday last. They will stay through the congress, and will go on to Moscow and Nijni-Novgorod, and then return overland through Berlin to England.

—Daily Herald, London, 7/8/26.

PRI SUGESTIO.

Konduktoro de sibiria vaporo hazarde estis flusita en malvarmiga viandvagono. Malfermante la alvenintan vagonon oni trovis la viron rigide kuŝantan sur la planko; li estis mortinta. Per kredo li sur la vagonaj muroj estis priskribinta siajn terurajn suferojn pro la malvarmo. Sed je grandega ekmiro oni konstatis, ke la vagona temperaturo estis nepre normala, ĉar la malvarmiga aparto ne funkciis.

Kaptito estis metata en ejon, kie ĵus virino estis mortinta pro azia holero. Ne sciante pri la fakto li restis sana.

Alia arestito venis en ejon, pri kiu li sciigis, ke ĵus virino tie estis mortinta pro azia holero. Kvankam la sciigo estis mensoga, li troviĝis en tia timo, ke li malsaniĝis sub holeraĵ simptomoj.

Krimulo estis kondamnita al mortpuno. Oni deklaris al li, ke li pro favoro rajtas morti pere de sango-perdo. Li estas senvestigata, ligata kaj per pinglo pikata en dorso. Samtempe oni fluigas varman akvon super la dorso. Post 40 minutoj la viro estis mortinta.

LA B. E. A. DIPLOMO.

La Viceprezidanto de la Melburna Esperanto Societo (S-ro J. Skurrie) gajnis la diplomon. Koraj gratuloj.
—(Red.)

NOKTOMEZO.

La urbogardisto direktas korradion en ombroplenajn angulojn . . . Malpleneco! Laŭlonge de nigrecaj stratoj li marŝas peze, kaj la paŝbruo resonas tambure . . . Malpleneco! Li spiras malfacile dum li spreniras la ŝtuparon. Jes, li maljuniĝas. Kiel knabo kaj viro dum kvardek jaroj li gardas tiun urboparton. Sobra homaĵo li ja estas, kaj Eminjo edzine bonagadas kontraŭ li . . . Li ne povas trovi plendindaĵon en tio. Nenio moviĝas! Ĉio marŝas bone! Sidiĝinte sur keston li bonapetite ekmanĝas grandan ajlan sandviĉon . . .

En publika parko du janaĵ homoj troviĝas sidante surbenke. Arbfoliaro flustras en milda venteto; unutona klik-klikado de herbinsektaj faras akompanaĵon por la dialogo. Kun sulkigitaj brovoj li mordetas la poleksungon, penas paroli kvazaŭ jam decidiginte, sed finiĝas babilante . . .

"Malsaĝulo mi estis, tiel promesi al vi . . . Mi ne povis scii, ke ŝi . . . ŝi . . ." Responde knabinaj okuloj perlas larme, orkapeto pendas surbrusten, ŝaltroj ondas je ŝia plorado silenta. Bela imagmondo de ina estonteco nebule jam forpaliĝis, nur korsoifon lasante . . .

Tie trans la strato oni dancas. Bonŝancaj monulaĵoj! La brila virina vestaro kaj la malhelaj frakoj de la viroj trafas liajn okulojn ĝirte preterpasante la fenestrojn. Tiujn la korto ne devigas viviĝi per la plumknarado, kiel lin . . . "Rapide finu tiun presotaĵon, juna Hudson," aŭdiĝas viveca voĉo. La junulo repreninte elbaŝe morditan plumon denove komencas la skribpenon . . .

Knabino pasas laŭlonge de la strato, malrapide, afekte, en ombrojn faritajn de la altaĵoj okulstreĉante. Du viroj alproksimiĝas al ŝi pasante, kaj al ĉiu ŝi flustre parolas. Farinte pronuĝan geston, ili formarŝas silente, kaj malespero malheligas ŝiajn okulojn, kvankam rideto ankoraŭ restas ĉe buŝo dum ŝi malaperas malantaŭ murangulo . . .

Lumaĉo de parafina lampo jetas malfortan radion tra fumlplena atmosfero en postbutika ĉambreto. Aŭdiĝas raŭkaj ekkrioj de viroj duonyĉe malpacantaj, kaj tintado de moneroj jetitaj surplanken . . .

Transmaren el la juvelita kvazaŭ per rubenoj boateto naĝas ĝisborde kantaĵoj, alttonaj voĉoj, laŭtaj ridoj

. . . La kolorigita lignopeco ondjetiĝas sur la malluma marbrusto kaj pasas rapide tra la nokto. Felisa homareto revenas hejmen . . .

El grunda multfenestra domo venas ĝemo de virino ploranta. La Morto jam apude pasis al ŝi, forprenante karese en ĝiaj brakoj ŝian amatan . . .

El premaera, malsaniga mansardo en domoĉa kvartalo venas ĝemo de virino ploranta. La Amo apude pasis al ŝi kaj metis buŝeton sur ŝian truston . . .

—Robo, Melbourne.

ESPERANTO AND WIRELESS.

82 broadcasting stations in 23 countries have broadcast courses or lectures in Esperanto. Statistics, which are still incomplete, indicate 660 items of this kind for 30 European stations.

Figures are still lacking for the great stations at Breslau, Prague, Moscow, etc.

Esperanto is more and more perfecting its wireless vocabulary. The well-known French wireless year-book "Annuaire de la TSF," in the part devoted to vocabularies in several languages, contains an Esperanto section. An English-Esperanto vocabulary has just appeared. Suggestions for similar vocabularies had already appeared in German and Russian.

For some little time a comprehensive wireless organ "Internacia Radio Revuo" entirely arranged in Esperanto, has been issued by the well-known French wireless publishing house of Chiron at Paris.—I.E.S.

SUMMER UNIVERSITY IN ESPERANTO.

During the first week in August university courses in Esperanto were held in the Assembly Hall in Edinburgh. Specialists from various countries lectured in Esperanto on subjects connected with psychology, philology, folklore, etc. Among the professors were Prof. P. Povet, Director of the Institut J. J. Rousseau, Geneva; Prof. W. E. Collinson, of the University of Liverpool; Dr. Fournier d'Albe of the Universities of London and Birmingham; Prof. Bujwid, formerly Rector of the University of Krakow, Poland, etc.—I.E.S.

SENMORTECO.

La maljuna ĝardenisto sidis en la ombroj de elmoda ĉambro. Lia vizaĝo, pala kaj senesprima, lomi similis indienon, el kiu la koloro jam forpaliĝis, kaj liaj okuloj rigardis vitre el sub la pezaj brovoj tiel same, kiel la malforta lumo de lia dometo, kiu trafenestre verŝis radion sur la cirkaŭan plektobarilon. Ekstere la vento skuis bruete la loniceron kontraŭ la fenestrovitron

Dum la tuta vintro li solece vivis sur la altaĵo, kie staris lia dometo. Nur unufoje en jaro la silento rompiĝis. Tio estis, kiam la lakona impostisto suprengrimpis la vojon, vekante la trankvilan ĝardenon per la susuro de sia nesorbema surtuto, kaj la brueto de la paperaĵoj, kiuj li eltiris el sia leda poŝo. La maljunulo nun mortas. Tri longajn jarojn li laboris por perfektigi floron el certa speco, kaj nun ĝi staras balancigante sur maldika trunketo en la malgranda kulturita terpeco lia. Ĝi estis bela. Havante formon de giganta papavo, ĝi estis blanka kiel neĝo, kaj restante en la petalcentro estis sukkena stameno, kovrita de orpolvo. Sidante apud la malvarmiginta fajro la maljunulo diris al si, "Nu, fine ĉu tio estas la plena rezulto de tiela longa eksperimento? Mi sukcesis post penego konata nur de mi eltiri tiun delikatan gloraĵon el la patrejo. kaj ĉu scios pri ĝia beleco nur la pasanta vento kaj la apudfluganta birdo, kiu rapidas trans la ĝarden-spaco? Morgaŭ la petaloj forfalos, ĝia beleco mortos . . . kaj mi vivis vane." Ekster la domo la floreto tremis pro la venonta nokto. La kandelilo sur la kamenobreto jam brulinte ĝis la meĉfino, falis estingite en lageton da fandiginta sebo. La fajrolumo dancis sur la brazajoj kaj plenigis la havigintajn vangojn de la maljunulo per kolorriĉeco. Tutan nokton li tie sidis, kaj en la mateno, kiam la sunfeoj englitis tra la fenestra kreskaĵo, la fajro jam griziĝis ĝis malvarmo kaj elmondiĝis la ĝardenisto
Muso kuretis trans la cindron

Infaneto malfermis la raston ĝardenopordon kaj ŝtelatingis la dometon. Apud la pordo granda semujo skuis siajn nigrajn globetojn, kvazaŭ petante ŝirpindon. Dikaj fingretoj detrunkigis la semojn, disjetante ilin inter la seka herbaĵo

Kiam venis la printempo, la piedvoĵeto de la dezerta dometo ridiĝis per cirklo el magiaj blankaj floroj kvazaŭ anĝelo pasante lasis for fali sian nubskarpon sur la solcan terspaco.

—Robo, Melbourne.

ESPERANTO AND SHORTHAND.

The great number of Esperanto congresses and meetings is producing an ever growing demand for shorthand writers capable of reporting debates in Esperanto. The increasing use of Esperanto in commerce is creating a good prospect of utilising Esperanto shorthand in practice.

Thus there is a real advantage for stenographers in learning Esperanto.

Adaptations exist of the most diverse systems, such as Pitman' (English) Duploye, Aime-Paris (French) Gabelsberger, National-Stenografie, Koller and Stolze-Schrey (German). The principal speeches at the last Universal Esperanto Congress in Geneva, which was attended by nearly 1,000 delegates from 38 countries, were taken down according to the adaptation of the Stolze-Schrey system. Esperanto shorthand writers have formed an international inter-systematical association, whose membership is continually increasing.—I.E.S.

ESPERANTO AND TOURING.

It is well known that Esperanto is now extensively applied to touring. A large number of illustrated guide-books in Esperanto have recently appeared (Swiss Federal Railway, Swiss Central Tourist Office, Danzig-Zoppot, Geneva, Wiesbaden, &c.)

It is announced from Berlin, that the great travel agency "Mitteleuropaisches Reiseburo" (M.E.R.) has established a special Esperanto section for the utilisation of Esperanto in touring. The section has its headquarters at the Railway Station "Potsdamer Bahnhof" (Address: Mer 10, Esperanto-Sekcio, Potsdamer Bahnhof, Berlin W.9.)

Further the European time table of Thos. Cook and Son contains a table of usual phrases in Esperanto for the use of travellers.—I.E.S.

LETERO AL AMIKO EN EUROPO.

Estimata amiko.

En unu el miaj leteroj, mi lomete priskribis la ornitorinkon, nun mi penas doni al vi pli da detaloj, pri tiu tre interesa besto.

Sinjoro H. Burrell, kiu multe studis la vivkondiĉojn de la ornitorinko, baldaŭ publikigos verkon, pri tiu ĉi la plej interesa el ĉiuj mambestoj. Sinjoro Burrell diras, ke la ornitorinko sendube estas eĉ multe pli mirinda, ol oni kutime opinias. Ĝi estas la plej diverskarakteriza mambesto en la mondo. Kvankam nature akvolokanto, ĝi tamen povas pereci de malvarmeĉo, se ĝia febo tro longe restus malseka. Kiam ĝi lasas la akvon, ĝi iras al sia tunelo por sin varmigigi. Ĝi estas tre timema, kaj malŝatas la homan tuŝon, sed kiam kolerigita, la viornitorinko sin defendas kontraŭ sia turmentanto, kaj se eble uzas sian spronon, kiu en certa sezono estas venenhava, kaj povas fari gravan vundon, kaj sinjoro Burrell konsilas al ĉiu esti zorgema, kiam oni tuŝas ornitorinkon.

La ornitorinko fosas du specojn de tuneloj, en unu ĝi loĝas, kaj la alia estas por kaŝi sin, dum ĝi kovas la ovojn. La unua tipo estas simpla, kaj la enirejo ĉiam super la nivelo de la akvo, tamen kelkfoje troviĝas dua enirejo sub akvonivelo. Por patrinceca tunelo kvietita aparta loko proksime al la rivero estas elektita, kaj tie la ornitorinko elfosas serpentan tunelon de 8 ĝis 100 futoj da longo. Ĝi finiĝas je la kovejo . . . cirkla kavo, kie en la mallumo la mirindaj mambestidoj elkovigatas el blankaj ovoj, kaj kuŝas en nesto farita el eŭkaliptaj folioj, pecoj da mola arbeŝelo akvo-herbo, ktp.

Stopiloj estas konstruataj je interspacoj en la tunelo, la lasta proksime al la nestkavo. Tiamaniere protectita la patrino dormetas dum ŝi kovas ĝis la du aŭ tri idoj aperas.

Ŝajne la subtera kovejo ne estas ventolita. Ĉu do la ornitorinko povas vivi dum longa tempo sen freŝa aero? Estas certe, diras sinjoro Burrell, ke nenla arango estas farita por ventoli la tunelon?

El siaj fruaj observoj pri la ornitorinko sinjoro Burrell konvinkigis, ke la besto, kiam sub akvo, eĉe uzas la tuŝkapablon; pliposte li supozis la ekziston de sesa sento, funkciante kune kun la tuŝsento, kaj eble origina

kunaskita eĉo. Jaroj da sperto konfirmis tiun kredon.

La sentoj de vidado kaj aŭdado, dum la besto estas sub akvo, ŝajne portempe perdiĝas. La eksperimentanto kriegis dum ornitorinko sub la akvo palpatis ĉirkaŭ liaj manoj, kaj ĝi tute ne montris ian signon de timo. Pri la alia sento, eksperimentoj konvinkis lin, ke vere la ornitorinko povas nek vidi nek flari, kiam ĝi estas sub akvo. Ĝi ŝajne ne gustas nutraĵon, ĝis ĝi atingis la supron de la akvo, kaj la tuŝsento ankaŭ ne estas tre forta, kiam la besto estas subakvo.

Ni revenas al la sesa sento, kiu ebligas direkton, sen kiu, tiu ĉi tre diverskarakteriza besto ne povas, sinjoro Burrell diras, kolekti vivantan nutraĵon, kiel ĝi faras ĉiunokte, ĝis la duono da sia propra pezo. En kaptiteco ĝi volante manĝas vivajn salikoketojn. En sia natura hejmo ĝi suŝas la vivajetojn el la koto.

La Historia Societo de Viktorio, ĵus starigis monkollekton por monumento pro memoro de Johano C. Burke, kiu en 1838 portis la unuan per landan poŝton de Melbourne al Sydney.

Sinjoro Bourke komencis la longan 2 januaro 1838, kun du ĉevaloj, unu por rajdi, la alia por porti la poŝton kaj provizon da nutraĵo por nutri lin dum la danĝerplena entrepreno. La rajdo estis tra lando antaŭe ne vidata de blankhaŭtuloj.

Sinjoro Bourke komencis la longan vojaĝon sen ia alia gvido aŭ helpo, ol kompasso tage, kaj steloj nokte. Li posedis nevenkeblan kuraĝon, kaj plenan scion pri la sovaĝejo tra kiu li devos iri, sciadon gajnitan post jaroj da sperto, kiel bovkondukisto, inter la novaj kolonietoj fonditaj de la fratoj Henty ĉe Portland, kaj Johano Ratman ĉe Melbourne. La plej malproksima loko de Melbourne kie sur la vojo li renkontis blankhaŭtulojn estis ĉe rivero Broken, loko kie pliposte la kolonio de blankhaŭtuloj estis ĉiuj mortigitaj de la indiĝenoj.

Januaro en tiu jaro estis eksterordinare varmega. La plimulto el la marĉoj sekigis, arbaraj bruloj estis oftaj, kaj krome estis la ĉiama danĝero morti de manko de nutraĵo aŭ akvo, kaj ankaŭ la danĝero de malamikaj indiĝenoj, multe el kiu Bourke vidis de malproksime, dum lia soleca rajdo al la rivero Murray.

Dum la longaj tagoj li devis transnaĝi riveretojn kaj riverojn, kiu fluas

inter li kaj lia celo, kaj nokte li piedligis la du ĉevalojn, tiamaniere ke, se ili penos forvagi, ili streĉos la ŝnurojn, kiujn li ligis ĉirkaŭ sia propra korpo. Li preskaŭ dronis, kiam li transnaĝis la riveron King, kaj poste la fumo de la arbaraj bruloj kaj la preskaŭ netolerebla varmego kaj varmegaj ventoj, devigis lin halti dum kelkaj tagoj ĉe la rivero.

Dum li transnaĝis la riveron Murray li estis minacita de kelkdekoj da indiĝenoj, kaj nur liaj mirinda kuraĝo kaj rimedpleneco savis lin. En du okazoj lancoj estis jetitaj al li, sed bonŝance ne trovis lin; kaj de tie ĝis la plej proksima kolonieto je la Sydney'a flanko de la rivero Murray la vojaĝo estis longdaŭra baraktō kontraŭ malbona vetero, soifo, malsato, kaj dormmanko. Fumsignalojn li ofte vidis sur la montetoj, kioj montris kiel zorge la indiĝenoj spionadis lin.

La noktoj estis plenaj je alarmoj, kaj misteraj sonoj, evidente faritaj de la indiĝenoj kun la celo forkuregi la ĉevalojn.

Lia alveno en Sydney mirigis la aŭtoritatulojn, kiuj preskaŭ ne povis kredi, ke tia soleca vojaĝo povus esti farita de unu sola viro. Bourke estis tre malforta, kaj la du ĉevaloj preskaŭ skeletoj, sed li plenumis la taskon.

Kiam Bourke revenis al Melbourne la civitanoj honoris lin, kiel la Sydney'aj civitanoj jam antaŭe faris.

Kun ĉiuj bondeziroj por la Novjaro, via fidele, P. H.

KURAGIGAJ VORTOJ.

Dear Sir,

The little magazine comes regularly, and I feel very grateful to the faithful few who give time and money to enable lovers of Esperanto to have a magazine of their own in Australia.

I have much pleasure in enclosing 10/-.

Sincerely yours,

M. C. TRUNDLE.

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kie malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malĝare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POB VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je pretfacila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru en adreŝon

100 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

KRONIKO.

MELBOURNE. V.— Jam komenĉigis la nova jaro — 1927! Ĉiu Esperantisto diru al si mem, "Mi laboros propagandi la karan linkgvon, mi faros mian eblon ĉi tiun jaron, interesigi aliajn pri ĝi, kaj mi komencos agi tuj." Se ni ĉiuj faros tion, la Esperanta movado bone progresos!

Dum decembro pasinta, tradukaĵoj, kaj mallongaj paroladoj plenumigis la programon de la Melburna Esperanto Societo, kaj ĉe la "Sally McGundy" kiu okazis je la tria de la monato, kantoj, deklamoj, kaj ludoj okupis la vesperon.

Je dec. 4a, sro. Rawson brodkastis de 3LO, tre interesan paroladon pri Esperanto.

MELBOURNE. V.—

Malgranda ekskurso al Brighton estis aranĝita por la Esperantistoj kaj okazis je dec. 12a.

Ĉe la Australian Church Hall, je decembro 15a, okazis tre ĝueblan programon de kantoj, muziko, kaj teatraĵoj, por festi la datrevenon de la nasktago de Dro. Zamenhof.

AUKLAND, NOVA-ZELANDO. — Sukceso-plena kaj bonega pikniko okazis dum 12a de decembro. Aranĝite de la Aucklanda Esperantista Asocio, la pikniko estis por festi kaj honorigi la datrevenon de la nasko-tago de nia mortinta Majstro, Dro. Zamenhof. Tre ĝuita tago estis forpasita sur insulo lokita en la Aucklanda Haveno—Insulo Rangitoto—al kie la partoprenantoj, post renkonto ĉe la Generala Poŝtoficjo, veturis per bonto. Multe da Aucklandanoj scivoleme rigardadis la verdan standardon flirtanten ĉe la pinto de la boatmasto; same tiuj kajnis esti interesataj pri la grupoj de personoj, kiuj parolis ne-anglan lingvon. Kvankam la pikniko provis ĝuitan kaj memorindan tagon por la Esperantistoj, ĝi ankaŭ pruvis esti bonega praktika propagandilo inter la urbanoj. Feliĉe, la Aucklanda publiko nun edukigas al nia lingvo kaj movado; tio estas tre videbla post senĉesa laboro ĉe la klasoj, per radio,

Specialisto pri Fontanplumoj

kaj per gazetaraj lecionoj kaj propagando.

La nuna prezidanto de la Asocio estas s-ro. J. S. Russell, bone konata kiel malnova pioniro de la movado en Nova Zelando.

Laŭ la vendoj de libroj ĉe Aucklando, Esperanto estas disvastiganta rapide. Dum novembro multaj libroj estis venditaĵoj — enpoŝtigitaĵoj dek kvin — kaj eĉ dudek kvinope. Ne nur Aucklandanoj estas aĉetantoj, sed libroj estas ekspeditaj al ĉiu parto de la lando, eĉ al la plej suda.

Redaktoro, notu bone: kelkaj abonantoj al la Suda Krucio raportas ke la novembra eldono de la gazeto estis tre interesiga kaj sendube ega plibonigo kompare kun la gazeto publikita antaŭ unu jaro. Unu sinjoro diras, "Mi pensas ke la novembra ekzemplero estas la plej bona el ĉiuj, kiujn mi ĝisnune ricevis."

THE POST OFFICE AND ESPERANTO.

Esthonia.

By special decree of 6 May (N.R. 113) the Ministry of Communications (Department of Posts, telegraphs and telephones) of Esthonia recognised Esperanto as a clear language for internal telegrams and for telegrams for Russia.

The Esthonian Department of Posts, telegraphs and telephones has been favorable to Esperanto for some time past. The inscription—Esperanto Farolata—(Esperanto spoken) already appears over a number of counters.—I.E.S.

KION LI TROVIS.

—Ĉu vi memoras tiun belan poŝhorloĝon, kiu mi perdis antaŭ 5 aŭ 6 jaroj? demandis Georgo. —Jes mi bone memoras la okazon — respondis lia amiko. —Ĉu vi memoras, kiel mi ja serĉadis kaj nenie povis trovi ĝin. —Jes mi memoras la diligentan kaj penegan serĉadon.

—Nu do, hieraŭ mi portis malnovan veston, kiu mi ne portis jam de kelke da jaroj, kaj kion vi pensas, ke mi trovis en la poŝo?

—Vian poŝhorloĝon, permesu al mi gratuli vin.

—Ne, mi trovis la truon, tra kiu eble ĝi perdis.

WHAT ESPERANTO REVEALS.

Professor on Language Development.

Esperanto as an introduction to the science of language, was the subject of an address by Professor W. E. Collinson, of Liverpool University, at the Universal Congress of Esperantists, in Edinburgh, yesterday.

He said that a careful comparison of the Esperanto vocabulary with the mother tongue would reveal much that was relevant to the consideration of the adequacy of language for expressing thought.

In the Esperanto root vocabulary they obtained a good synoptic view of the chief factors in the development of the great European languages.

Above all, they got to see how many different peoples had from prehistoric times till now made their contribution to the international vocabulary of Europe.

Thus they learned to look upon other nations with more respect and realise the value of co-operation in linguistic, as in more immediately practical matters.

Mrs. Edith Herrstadt-Oettingen, of Berlin, who won a prize in a Berlin Esperanto competition for having learned Esperanto in eleven lessons, gave an address in which she advocated a scheme for the establishment on the Continent of an exclusive Esperanto theatre. Such a foundation, she said, would probably be the best way to ensure that artists of all countries could build up a common literature in a single language.

Speaking at the congress on the work of the International Labour Office at Geneva, Mr. C. C. Tarelli said that though he would not claim that the Office had created a new heaven and new earth, yet during the seven years of its existence it had proved its necessity and usefulness in securing for several countries the establishment of an eight-hour day, the regulation of night work in industry, and also the regulation of conditions governing the use of white phosphorus and similar dangerous substances. —Daily Herald, London, 7/8/26.

POST TIO.

La longa artefarita tritiktufeto sur la ĉapelo de la fraŭlino lokigis horizontale, tiel ke ĝi tiklis la vizaĝon de

la viro, kiu sidis apud ŝi en la tramveturilo, ĝis ŝi fine lokiĝis kun la ŝakaĵoj en lian maldekstran oreleon. Post iom da tempo oni rimarkis, ke la viro prenis el lia poŝo grandan poŝtrancilon, kiun li akriĝis sur sia *large manplata Ekscrite de Studilino* ekdemandis. —Kial vi faras tion —? —Se tiu tufeto denove eniros mian oreleon—, la viro respondis, —baldaŭ poste estos la rikolto.

LA LINGVOJ EN PERSUJO.

En Persujo diversaj lingvoj estas parolataj, el kiuj unu, la persa, estas la oficiala. Ĝi estas nomata "Farsi."

En la regiono Azerbajĝano oni parolas la turkan lingvon, kiu diferencigas de tiu, parolata en Turkujo, tiel, ke nur la kleruloj el ambaŭ landoj povas interkompreni sin.

En Kurdistano, kie la kurdoj loĝas, oni parolas la kurdan lingvon kaj en Ĥozestano, la araban.

Krom tio loĝas en Persujo Armenoj, Hebreoj kaj Asirianoj, kiuj ĉiuj parolas sian propran lingvon.

Kvankam tiu lando estas tre diverslingva, la oficiala persa lingvo regas ĉion. Lernejoj, ĵurnaloj, institucioj uzas ĝin por korespondo, librotendado reklamo, k. t. p.

Azerbajĝano estis kaj ankoraŭ nuntempe estas la ĉefa parto de Persujo. Oni parolis tie la puran persan lingvon. Sed en la dektria jarcento, la gento Mogul, de tatara deveno, sub Ĉanĝiz-han, venkis la persan reĝon Mahommed Ĥarezsŝahi kaj ekokupis la regionon. La enloĝantoj estis devigataj paroli turklingve, sed, ĉar tiuj ĉi malame rigardis la venkintojn, ili ne volis tion fari.

La reganto, Ĥalaku-han, nepo de Ĉanĝiz-han, fortranĉigis la langon de tiuj, kiuj ne volis paroli turke aŭ li verŝigis fanditan plumbon en ilian gorgon.

La Moguloj dum 83 jaroj superregis en la lando kaj, dum tiu tempo, ili detruis ĉiujn memorajojn de la antikva persa gloro. Ili bruligis bibliotekojn, buĉadis senkompate kaj faris ĉiajn sovaĝecajn agojn.

Nuntempe la praktika lingvo en Azerbajĝano estas ankoraŭ la turka, sed ĉie ĝi estas anstataŭigata de la persa.

Ali-Akbar Memseŝi, del U.E.A., en Tabriz (Persujo).—el Belga Esperantisto.

TEKNIKO.

Teksaparato sennaveda.

Ĝis nun oni opiniis neŝanĝebla la uzon de navedo kiu, traflugante la interspacon de la varpo, enigis la vefton. Nun venas nova teksaparato sennaveda kaj alportas al la tuta teksindustrio ŝanĝegon, kies sekvoj ankoraŭ ne estas antaŭvideblaj.

Kiu konas la funkciadon de teksejo, scias, kian gravecon havas la navedo. Ĉi tiu tuta ilaro, kiu koncernas la enigon de la vefto, nun tute malnecesigas.

Per la nova teksaparato sennaveda la vefto estas enigata en kiel eble plej simpla maniero.

La aparato laboras malbrue kaj faras 180 irojn en unu minuto; la rezultato estas senmanka teksaĵo. Ankaŭ tre malfortaj veftfadenoj ne disŝiriĝas. Ne estas necese malmovigi la aparton kiel je la ŝanĝo de navedoj en ĝisnunaj aparatoj, ĉar la nova aparato teksas "senfine" de grandaj bobenoj, ĝis la tuta varpo estas finlaborita.

La aparato ekmoviĝas el ĉiu pozicio. La rapideco estas tre granda. Ĉe moderna teksilo kun aŭtomata ravedŝanĝo bone ekzercita teksisto povas servi 12 ĝis 16 teksilojn, ĉe la nova teksilo sennaveda nur iom sperta laboristo povas servi 24 teksilojn.

Tre grave estas, ke per la nova aparato ĉiuj krudmaterialoj povas esti teksataj, tute egale ĉu estas lano, kotono, juto aŭ alia materialo, ĉu delikata aŭ maldelikata. La ĝisnunaj aparatoj faras necesaj apartajn aranĝaĵojn en la teksiloj kaj en la navedoj. Tio ne plu estas necesa.

La nova maŝino estas "finita." Ĝi ne plu bezonas provadon kaj eksperimentadon, ĝi jam estas uzata en teksejoj de Sudgermanujo kaj estas konstruata en racia amas-fabrikado. La eltrovinto konstruis, provis, ŝanĝis en fervora laborado dum sep jaroj, ĝis la maŝino montris sian nunan perfektan formon.

Laŭ "Frankfurter Zeitung" de Friedr. Graser.

—el *Heroldo* de Esperanto.

KIU DIRIS TION AL VI?

Doktoro ekzamenas petanton por asekurado. —Ĉu vi iam estis grave malsana? —Ne. —Ĉu vi iam suferis akcidenton? —Ne. —Vi neniam havis akcidenton? —Neniam, krom ontai unu jaro, kiam virbovo jetis min super la barilon. —Ĉu vi ne romas tion, akcidento? —Kompreneble ne, — estis la respondo en surprizono. —Li intence faris fin.

ESPERANTO AND WIRELESS.

The programme of almost every important wireless station in Europe contains an item in Esperanto. We have already mentioned a number of wireless publications in Esperanto. We may add to the list the journal "Norsk-Radio," the organ of the Oslo station (Norway), which has recently published a technical dictionary of wireless in Norwegian, English and Esperanto.—I.E.S.

TEXTBOOK SCARCITY.

Supplies Now Available.

A large Consignment of Fryer's
"ESPERANTO TEACHER"

just landed. Thirteenth Revised
Edition.

Used at 2KY Wireless Station, Syd-
ney.

Societies, Clubs Groups or Indi-
viduals can obtain immediate supplies
in any quantity from

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY

Box 2710C., G.P.O. SYDNEY.

Cot-rate Prices. Prompt Delivery.

THE INTERNATIONAL INSTI-
TUTE

for Intellectual Co-operation and
Esperanto.

Following the example of the In-
ternational Labour Office of Geneva,
which has for several years possess-
ed an Esperanto press service, the
International Institute for Intellect-
ual Co-operation in Paris, an insti-
tution connected with the League of
Nations, has organised a special in-
formation service in Esperanto for the
propagation of the ideas of intellect-
ual co-operation.—I.E.S.

Melburna Esperanto-Societo. Prezi-
danto, s-ro C. W. Ballard; sekre-
tariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso,
Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Mel-
bourne. Kunveno: Public Benefit
Booth Building, 5th Floor, 323-325
Bourke St., Melbourne. Vendrede
vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kun-
venas ĉiun jaudon de 7.45—10 p.m.
ĉe "Rawson Chambers," Rawson
Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583).
Ĉiuste apud la ĉefstacidomo. Prezi-
danto: S-ro F. T. Simon, Sekretario:
S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River
Road, Croydon Park, Sydney.

Hobaria Esperanta Grupo. Kun-
veno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-
str. Ĉiun duan mardon, 7.30 vespere.
Prezidantino F-ino C. M. Hannaford.
Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A.
Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo. Mel-
burna. Prezidanto: S-ro H. Bvatt.
Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kun-
veno kaj poŝta adreso, 37 Brunel
St., East Malvern, merkrede vespere,
je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW." Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australian Esperanto Association, 323-325 Bourke
Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str. P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Una numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 80 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 februaro 1927

"SINJORO DELSUDO" REVENAS.

Revenis al Melburno, post kvinjara foresto en Nov-Gineo, sinjoro Maŭrico Hyde, kiu antaŭe okupis elstaran lokon en nia movado en tiu ĉi urbo. Sinjoro Hyde estis prezidanto de nia Asocio kaj unua redaktoro de tiu ĉi gazeto, en kiu foje aperis artikoloj liaj sub la pseŭdonimo A. Delsudo.

En lasta tempo sinjoro Hyde faris rapidan veturon ĉirkaŭ la mondo, kaj li iom rakontis ĝin al ni en la ĵena parolo:

—Vi jam legis en la 'Suda Kruco' pri la malgranda karavano kiu preskaŭ pereis sur la maro, kiam la Norvega ŝarĝŝipo 'Tugela' frapis rifon sude de Filipina Insularo. Post du monatoj tamen mi atingis Francujon, kaj en la brua, brila urbo Marseljo ni tuj trovis utilon de Esperanto. La deligito kaj la anoj de la Esperanto-oficejo helpis min per konsiloj kaj gvidado en la kutima valora maniero. Same estis en ĉiu urbo, kiun mi vizitis, kiel en mia lasta vizito al Eŭropo antaŭ dek du jaroj.

—Al mi ŝajnas, ke la Esperantomovado en Eŭropo estas jam pli serioza kaj pli praktika, ol antaŭ dek du jaroj. La ĉefajn lokojn en nia movado okupas homoj pli solidaj, kaj la nomo 'Esperanto,' se mi povas juĝi per propra malvasta sperto, estas ŝdata ĉiam kun pli granda respekto. La diversaj maniuloj, kiuj emis kompromiti nian movadon kun la propraj politikaj, religiaj, sociaj teorioj, estas preskaŭ eliminataj; oni

povas diri, ke en la Esperantaj organizaĵoj troviĝas homoj, kiuj laboras por Esperanto sole.

—La malgranda karavano, pri kiu mi parolis, konsistis el tri: sinjoro Lauri Laiho, Finno antaŭe loĝinta en Melburno, sinjoro Alois Chungsen, Ĉino el Nov-Gineo, kie li lernis Esperanton antaŭ kelke da jaroj, kaj mi mem. Ni disigis en Londono. Sinjoro Laiho reiris Finnlandon, kaj sinjoro Chungsen al Bristol por studadi; la Bristolaj samideanoj lin bone akceptis, kaj li tuj sin trovis en rondo de amikoj.

—Mi vizitis Germanujon, kaj revenis trans Usono, en ĉiu loko mi rilatis kun la samideanoj, kaj multon gajnis per tio. Foje mi hazarde renkontis samideanojn, simple per portado de la verda stelo. En la fervoja stacio Hoko de Holando mi vidis surskribon 'Tie ĉi oni parolas Esperanton,' la kondukto de la trajno, kiu prenis min al Germanujo, estas Esperantisto. En Barcelono mi vane serĉis la ĝustan stacion de la subtera fervojo (la plej bona subtera fervojo, kiun mi iam vidis), kiam mi aŭdis voĉon: 'Pardonu, sinjoro, ĉu mi povas iel utili al vi?' kaj ne konata samideano tuj gvidis min al la celata loko, per kio mi sukcesis trafi vagonaron por grava veturo.

—En Katalunujo, en urbo Vich mi denove vizitis amikojn, kiuj min gastame kaj sindone akceptis kiel en mia lasta vojaĝo en Eŭropo. Ni tre ĝoje rekuniĝis ĉe la stacio, kaj ili min kondukis al sia hejmo, kie mi havis

la saman ĉambron, kiel en antaŭa vizito. Kiom da domoj, pensionoj, bangaloj estis mia hejmo dum la pasintaj dek du jaroj, kaj jen mi revenas kaj denove okupas eĉ la saman liton, dum ekstere la noktogardistoj kantas 'Laudate estu Dio! La dua jam batias. Serena!' Katalunujo faras same sorĉan, logan efektan kiel ĉiam. Aferoj antikvaj restas flankon ĉe flanko de aferoj modernaj: Esperanto, radiotelefonio, k.t.p.

—En Usono lingvaj diferencoj, ekster kelkaj detaloj, ne ĝenas Aŭstraliano. La dialekto, ekster la malsaltaj klasoj, kiuj parolas en nazaj akraj tonoj, malmulte diferencas de la lingvo de Suda Anglujo aŭ la nia. Tamen mi volante akceptis helpon kaj konsilon de tre gastamaj diverenciaj samideanoj en la ĉefaj urboj, kiujn mi trapasis. En Los Gatos, en Kalifornio, mi vizitis lernejon, kies fervora direktoro, sinjoro Rogers instruas Esperanto al 65 junuloj, ĉefe filoj de la plej bonaj familioj de la ŝtato. La junaj Kalifornianoj mirinde kreskas: 14 jara knabo ŝajnas egale evoluinta kiel 18 jara ĉe ni. La pacifika homtipo, videble en Orienta Aŭstralio, estas ankaŭ multe vidata en Kalifornio.

—En Wellington, en Nov-Zelando, mi dankas al nia Prezidanto, sinjoro W. H. King, al delegito sinjoro Dust, kaj al nia malnova Melburna kunbatalanto sinjoro W. L. Edmanson, agrablan restadon en la tre bela (sed venta!) urbo.

—Pli ol ĉiam mi estas konvinkita pli la granda valoro de nia lingvo.

10 januaro 1927.

Kara Sinjoro,

Ĉi-kune mi enmetas dek-ŝilingojn kiel donacon per nia laŭdinda eta gazeto. Mi tute konsentas tiun opinion de F-ino Blyth pri la tut-kora sindonema laboro farata de la estimataj administrantoj de "la Suda Kruc." Damage estus se la Esperantistaro ne daŭrigus plene meritan subtenon por nia sola Aŭstralazia gazeto. Sen ia dubo la verkita enhavo bone komparas eĉ ofte superas aliajn Esperantajn ĵurnalojn. Tial mi petas al ĉiu Esperantisto fari sian eblon, kiel eble plej multe, el-levi la monŝarĝon el la ŝultroj de niaj fidelaj laboristoj kaj verkistoj.—Sincere la via

W. A. SAMIDEANO.

KRONIKO.

AUCKLAND, NOV-ZELANDO. —

Tiu ĉi urbo suferas grandan perdon, kvankam Aŭstralio per tio gajnas! Ĉar nia atestimata kaj fervora samideano sinjoro R. J. Crago, foriris de nia marbordo vojaĝinte Aŭstralion. La novaĵo de la foriro venis kiel surprizo; kaj sendube Nov-Zelando kaj precipe Auklandanoj, havas rajton bedaŭri la perdon de sinjoro Crago, kiu nedisputeble donis al la movado en tiu ĉi loko ferman bazon. Estas necble . . . spaco ne permesas . . . tie ĉi rekordi ĉion kion sinjoro Crago faris por Esperanto en Nov-Zelando, sed notinda estas lia laboro rilate la revivigon de la Auklanda Esperantista Asocio; lekcioj de Radiostacio IYA; kaj la gvidadon de ĉiusemajna leciono tra la kolonoj de la "N.Z. Pictorial Weekly." Ĉiu volos al "La Vaganto" sukceson en lia nova sfero.

WELLINGTON, NOV-ZELANDO.

—Skribtempe novaĵoj nin atingis ke la 6a Kongreso ne okazos ĉe Hobarto, tion ni multe bedaŭras, samtempe esprimante konfidon al la Kongresa Komitato.

Estis plezuro dum la kristnaskaj libertagoj ricevi viziton de tiaj malnovaj geamikoj, kiaj gesinjoroj J. L. King, el Gisborne, kaj la fratoj McGuigan el Mangahao-Hydro. Bonega artikolo (plena kolono ampleksa) pri la Esperanto-Movado aperis en gazeto en la Nov-Zelanda ĉefurbo je 3a januaro. La artikolo kiu bonege traktis ĉiujn progresojn de la lingvo estas eble la plej bona, kaj plej amika iam presita en Nov-Zelanda gazeto. La deligito kaj videligito de la U.E. A. nun sin okupas pri la kapkalkulo de la Nov-Zelanda Esperantitoj; kiel petita en la "Alvoko al la Tutmonda Esperantistaro" publikita en la oktobra eldono de "Esperanto." Laŭ adresaro preparita dum 1926 de sinjoro W. H. King, la Esperantistaro de Nov-Zelando nun nombras pli ol 300. Unu Esperantisto kiam li sciigis ke en Nov-Zelando troviĝas tiom da samideanoj ridegis dirante ke, "estas miloj"; sed, se jes, la nomoj de la miloj ne estas senditaj al sinjoro King, kiu diligente kaj arde dissendis cirkulerojn tra la tuta lando. La skribanto de tiuj ĉi linioj atestas al la multaj Esperantistaj geamikoj en Nov-Zelando kaj Aŭstralio la ricevon dum Kristnasko kaj Novjaro de mul-

taj leteroj, telegramoj kaj kablgramoj; ankaŭ de Kristnaskaj donacoj, inter kiuj troviĝis granda kuko kun verda stelo kaj bonvola frazo esperante skribita, pro kio speciala danko estas esprimita.

SIDNEY, N.S.K. — Pri progreso en nia movado ĉi-tie mi ne povas raporti multon, kvankam ni festis tre sukcesan "Zamenhof-Vesperon" lastmonate. Pli ol 70 personoj ĉeestis kaj ni havis Esperantan teatraĵeton, deklamojn kaj kantojn. En la ĵurnalara fako ne multaj priesperantaj artikoloj aperas, sed kiam okazo sin prezentas, ni propagandas laŭpove. Ekzemple, lastan semajnon mondvaganta bicikletisto el Riga, nomata Kotulski, alvenis en Sydney, post biciklraĵo de Townsville, kaj, i.a. diris, ke kvankam li lernis Esperanton antaŭ la komenco de sia vojaĝo, li nur spertis, ke Angla estas la mondlingvo kaj nun nur uzas ĝin. Mi tiam tuj skribis respondon citante la faradojn de la U.E.A., kaj oni represis ĝin la saman tagon, sed—nur en unu eldono! Je alia okazo mi sendis leteron al la "Sydney Morning Herald" pri la ĵusinaŭgurita Transatlantika Telefonaĵo, kiun mi tre zorge ellaboradis, sed oni evidente ne konsideris la temon alloga kaj ĝi ne aperis. Tio estas la sorto!

MELBURNO, V. — Tre interesa parolado estis brodkastita de BLO je innaŭro unua. La parolinto sro. Maurice Hyde, kiu antaŭ ne longe revenis Melburnon post vojaĝo en Eŭropo kaj Usono, donis bonan rakonton pri la okazintaĵoj dum la vojaĝo. Estus agrable al la aŭskultantoj se plian parolado sekvos ĝin.

Iom poste, dum la monato, de la ĉambroj de la Melbourne Esperanto Societo, sro. Scurrie legis du-aktan komedieton, kiun li mem verkis.

La ĉiunonata debato sukcesis bone. La temo estis "Loĝado en la kamparo kontraŭ loĝado en ĉefurbo." La subtenantoj por "Loĝado en ĉefurboj" gajnis.

MELBOURNO, V. — Dum decembro fotografaĵo de d-ro Zamenhof kaj artikolo pri internacia lingvo, aperis en la lerneja ĵurnalo. F-ino N. Byatt faris paroladon pri tion, al ĉirkaŭ 90 lernantoj de la "Domestic Arts School" Footscray. Pro la intereso montrita, f-ino N. Byatt esperas fondi grupon por studi Esperanto en la venonta Novjaro.

BRISBAIN - QUEENSLAND. —

The Zamenhof Evening.

We engaged a social hall attached to one of the cafes and arranged that the cafe cater for a hand-round supper. The expense was met by special subscriptions amongst the Class and Club members. We attended at the hall the previous evening and put up decorations which we had prepared in readiness. The result was really pretty and made a lovely setting for such an evening. There were the usual coloured streamers, shaded lights, and delicately tinted paper chains of many colours, but in addition there were special Esperanto signs, and art cards here and there with the inscription: "La verda stelo brilas sur la ruinojn de la Babelturo." The screen at the back of the platform bore a big Esperanto flag and a notice "Ni memoru Zamenhof." These were wreathed in foliage and flowers were placed at the foot. "Bonvenu" greeted people as they entered, and a sign "Pelican Kristnaskon" was suspended from the central decorations. The pillars were encircled with trails of fern and flowers. And everywhere, intermingling with the decorations, were green Esperanto stars of all sizes. A special table held Esperanto periodicals from various parts of the world.

I come now to the eventful evening. Mr. Staines (our President) and his wife welcomed the guests—who numbered about 50. Two press representatives were in attendance. The opening speech by Mr. Staines dealt briefly with the life of Zamenhof and the progress of Esperanto, and also with a summary of the grammar.

Considerable talent was displayed in the various concert items and the whole programme was carried through without a hitch. I had had fears concerning the success of the community singing, but that part of the programme was entered into with heart and soul—not to mention voice—and proved a great "hit." All were provided with song sheets and even those who didn't know the tune of "La Espero" quickly picked it up and sang with gusto. The words the strangers sang for the various Esperanto songs would have made you take a fit laughing. That all present were put into a thorough good humour is beyond question.

A touching little incident of the evening was the presentation of Miss Fraser's portrait by little Alison Tait (her grand-niece). The picture was entitled "The Little Mother of the Brisbane Esperanto Club." We are all very proud of Miss Fraser. She kept Esperanto alive in Brisbane and was a friend to all of us. Her memory lives with us as a constant inspiration to further effect.

After the supper the evening became informal. The time was all too short for the competitions, dances, etc., we had planned. One competition was particularly amusing—a very simple one which I adapted to Esperanto purposes:—

The Competition.

This little bag contains 12 grains of corn. If you should answer: Yes, No, Black, or White, or the Esperanto equivalents, to any question asked you during the evening, you must pay a grain of corn to your questioner—but only if questioner notices the mistake.

Additions may be made to your store of corn by watching for similar mistakes in reply to your questions.

A suitable prize will be given to the person who at 10 p.m. has accumulated the largest quantity of corn.

The "suitable prize" (kept a secret till the last) was a little bantam and her chick (both beauties in their own way)—and you can guess the fun and the way the folks flocked around with donations of corn to the winner. That competition was commenced during supper, and the usual questions at that time gave plenty of chances to catch the unwary.

We finished with "Auld Lang Syne" (in English—or Scotch), with linked hands in the customary manner, and thus concluded a very happy evening.

RAILWAYMEN AND ESPERANTO.

Esperanto has already rendered important services to tourists. It is, therefore, easy to understand, that it is increasingly interesting railway employers.

The last Congress of the Swiss Federation of Railwaymen at Berne on 3rd and 4th July, 1926, adopted the following resolution:

The Congress approves the movement in favour of an international auxiliary language. It recommends to members of the Federation the study of Esperanto, which occupies a foremost place at this moment.—L.E.S.

LETERO AL AMIKO EN EUROPO.

Estimata amiko,

Se vi petus informon de civitano Melburna pri la kondiĉoj de indiĝenaj bestoj en Viktorio, vi certe ricevos la respondon, ke ili estas preskaŭ ĉiuj ekstermitaj. Sed konversacio kun sinjoro Lewis, la estro de la fiŝo kaj ĉasaĵo protekta departemento, malkaŝis, ke la kangurao de diversaj specoj, la didelfo, kaj la ornitorinko almenaŭ plimultiĝas en la lastaj 20 jaroj.

Estas vere, ke la indiĝena Koala (senvosta, polhava arbobesto, havanta lanecan pelton) matlmultiĝas; ĉar, kiam la kangurao saltegas rapide for de la arbaraj bruloj, kaj la didelfo saĝe eniras kavan arbtrunkon por savi sin, la milda kaj iom nesafa Koala restas en la arbsupro, ĝis la brulo atingas kaj brulmortigas ĝin. Se la Koala estus pli saĝa ĝi scius, ke familio kiu naskas nur unu idon en jaro, ne povas akcepti tiun riskon.

Kanguruoj kaj didelfoj tiel abundas en Viktorio, ke la fiŝo kaj ĉasaĵa departemento ĉiutage ricevas petojn kaj donas permesojn al suferigitaj bienistoj por mortpafi definitan nombron el la bestoj por konservi ties rikoltaĵojn.

En la oficejo de sinjoro Lewis pensas landkarton, kolorita je la distriktoj, kie permesoj estis donitaj. Almenaŭ 40 koloritaj lokoj aperas sur tiu landkarto, kaj montras distriktojn kie la kangurao tiom plimultiĝis, ke ili detruas la vivrimedojn de la bienisto. Kaj simila landkarto pri la didelfo estas preskaŭ ĉie kolorita!

Kanguruoj abundas de Patchewoi-icock en la nordoriento, ĝis Portland en la sudo, en tuta Gippsland kaj la montaro Grampians; kaj de montro Buffalo oriente al la landlimo de Nova Suda Kimrujo. Kie ajn troviĝas herboriĉa valo, simile al tiu tra kiu fluas la riveron Macalister, la kanguruoj kolektiĝas kaj detruas la kreskantajn rikoltaĵojn.

Bariloj ne malhelpas ilin; nenio efikas krom permeso de la fiŝo kaj ĉasaĵa departemento. Tiuj ĉi dokumentoj rajtas la bieniston mortigi ĉirkaŭ 10 bestojn, kio suŝas averti la ceterajn, ke tiu bieno estas danĝera loko por kanguruoj.

Tiel forpelitaj la ceteraj kanguruoj reiras al la praarbaro, kaj pro timo ili tie restas dum eble du aŭ tri monatoj. La feloj de tiuj kiu estas mort-

pafitaj devas esti stampitaj, kaj vendataj tra definitaj agentoj, por forigi la eblon, ke bienisto mortpafu tro multe el la bestoj.

—Se oni provus vendi al peltisto kontraŭleĝe havigitan krudan pelton, oni baldaŭ vidus, kiam tia senceremonie surstratigis lin kun la felo, ke la monpuno estas tro granda, kaj la observado tro severa por permesi kontraŭleĝan vendadon de la feloj de protekitaj bestoj.—diris sinjoro Lewis. Ioj ĉe Queenscliff (banloko ĉe la enirejo de golfo Phillip) dimanĉon vespere, kiam aro da salmo pelis la pilĉardojn ĝis la marbordo inter la sintanantoj. Kelkaj el la sinbanantoj mane kaptis kelkajn salmojn. Unu viro rapidis hejmen kaj revenis kun fiŝtango per kiu li sukcesis kapti 20 salmojn en nur kelke da minutoj.

Rimarkinda historio de knaba heroeco estis rakontita en Sidney juĝejo, kiam oni faris enketon pri la morto de knabo, kiu estis mordmortigita de ŝarko.

Mervyn Allum, knabo aĝa 15 jarojn, estis atakita de ŝarko dum li naĝis renkonti boaton, kaj mortis de la teruraj vundoj, kiujn li ricevis.

Stanley Gibbs, knabo aĝa 16 jarojn, kiu kampeloĝis ĉe Port Hackrag, diris ke li kaj kelkaj amikoj estis en motorboato, kiam li aŭdis kriegon.—Ekrigardinte mi vidis la ŝarkon dum ĝi sin turnis dorsen. La ŝarko estis tiam tre proksime al Allum. Estis renio por indiki, ke la ŝarko jam mordis lin. Mi saltis en la akvon kaj naĝis por helpi lin. Kiam mi atingis Allum la ŝarko estis apud li. Allum estis konscia. Mi petis ke li donu al mi la manon. Tiam mi povis vidi la ŝarkon sub la akvo. Guste kiam mi atingis Allum mi vidis sango. Li donis al mi la manon tre malforte. Kiam mi prenis lian manon la ŝarko denove atakis lin, kaj tiris lin suben en la akvon. Je tiu tempo mi staris sur la ŝarko. Mi piedbatis ĝin por timigi ĝin, kaj penis preni ĝian naĝilon per la alia mano. Mi penis naĝi al la marbordo. Mi pensas ke la ŝarko revenis tiam

kaj tiris Allum'on for de la marbordo kaj sub la akvo. Allum estis senkonscia, kiam li denove aperis. Sinjoro Campbell tiam alproksimiĝis en remboato. Ni levis Allum'on en la boaton, kaj mi remis al la marbordo.

It is just a little vague, but it obviously has the right spirit about it. When the lad really begins to feel his feet with Gold Coast English he will be a little more explicit about what "you are willing to gift me"—and more owners of names and addresses collected from English newspapers will receive a pleasant surprise from the morning postman. In the meantime, one can only commend the writer's second shot at "bello!!" He obviously felt that there was something a little open to misunderstanding about the first effort.

—"Daily Telegraph," Sydney, 22/2/27

ESPERANTO BY WIRELESS.

Esperanto by wireless is coming to form part of the programme almost everywhere. The Belgian stations are now introducing it.

—I.E.S.

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.W.—En februara Kronikaĵo la Sydney-a raportanto menciis i.a. la trapason de mondvaĝanta biciklisto Kotulsky, el Riga, Latvio, kiu, laŭ gazetraporto en "The Sun," opiniis Esperanton neefika kaj laŭdis Anglan kiel mondlingvo.

Tiuj notoj estis legitaj en Nov-Zelando kun rezulto, ke aŭdante pri la alveno de mond-biciklisto en Wellington, samideano avertis la delegiton de U.E.A. (S-ro L. E. Dust) pri la paragrafo en "La Suda Krucio." Lian surprizon oni povas bone imagi, kiam S-ro Dust informis lin, ke la nov-alveninto ne nur estas s-ro Kotulsky, sed ke li kaj kelkaj grupanoj instruas tiun saman sinjoron nian lingvon! Tuj la lokaj membroj demandis la fremdulon ĉu la gazetraporto el Sydney estis prava kaj ricevis tute fidindan respondon.

Kiel sekvo la Sydney-a raportanto por "La Suda Krucio" ricevis de Wellington-a U.E.A. Delegito dokumenton subskribitan de s-ro Emanuel Kotulsky enhavante jenaj tre interesaj punktoj:—

(1) Mi nur povas malperfekte paroli la anglan lingvon;
(2) Gazetraportistoj en Sydney enketis angle kaj mi respondis tiel eble kiel bone mi povis. Kvankam Esperanto estis mallonge preparolata mi reniam diris ion kontraŭ ĝi ne sciante sufiĉe pri la temo.

(3) Kun praktika flanko de Esperanto mi ne renkontis ĝis mia alveno en Nov-Zelando.

(4) Danke al du-tri Esperantistoj en Wellington, N.Z. mi nun lernas Esperanton kaj anigis al U.E.A. pere de la tiea delegito.

Ricevinte tiun dokumenton la ĵurnalo "The Sun" avizigis, sed ne akceptis ĝin por publikigo. Per tiu oni konatigas kun la amikoj de Esperanto!

S-ro Kotulsky foriris de Nov-Zelando kun sia biciklo al Monte Video la 15an marto, kredeble elserĉonte delegitojn dum la restaĵo de sia vago.

La prezidanto de la Sydney Esperanto-Societo ricevis inviton de la "Institute of Pacific Relations," (Instituto de Pacaj Rilatoj) en Honolulu, Hawaii, sendi sugestiojn pri la enkonduko de Esperanto kiel kongreslingvo. Ĝis nun angla estis uzata.

HAROLD PUDNEY**Specialisto pri Fontanplumoj**

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon **POH VI MEM AŬ POR VIA AMIKO?** Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 **EQUITABLE PLACE, MELBOURNE**

kaj apenaŭ tempo sufiĉas ŝanĝi ĝin por estonta kongreso okazante proksiman julion, sed se esperantaj grupoj tra Aŭstralio kunlaboras kun s-ro Simon, tre dezirinda aliigo povas rezulti.

AUCKLAND, Nov Zelando. — Je 14a februaro, okazis kunveno de la Aucklanda Esperantista Societo. Ĉirkaŭ kvindek ĉeestis. La prezidanto, s-ro J. S. Russell, bonvenigis kelkajn novajn membrojn kaj vizitantojn, inter kiuj troviĝis s-roj Huxton (Britujo), W. Stansfield (Aŭstralio), kaj W. H. King (Wellington).

Dum la vespero s-ro King paroladis al la ĉeestantaro pri la propono de restarigo de la Nova Zelanda Esperantista Asocio. Nune, laŭ N. Z. adresaro ĉirkaŭ 300 da samideanoj troviĝas en 67 diversaj lokoj en la lando. La propono estas organizi por tiuj ĉi samideanoj unu nacian asocion, por ke la movado en N.Z. estu sur firma bazo; kaj ke la plej bonaj rezultatoj por nia laboro estu havigotaj. Multaj izobuloj jam montris intereson, certigante ke ili subtenados. En la kunveno, s-roj Russell kaj Huxton ankaŭ parolis favore pri la propono, kiu nun restas en la manoj de la 23-tia Societo, kiu esploros kaj konsideros ĝin laŭ ĉia vidpunkto.

Kiel jam faris aliaj gazetoj tra la mondo, la tagjurnaloj de Aucklando publikigis detalojn pri la mondkonata Esperantista edziĝo, de kiu la "Auckland Herald" enhavis grandan fotografon. Ŝajnas ke Esperanto ricevis vastan, publikecon per tiu simple natura okazo!

WELLINGTON, N.Z. — Plua progreso rilate la vintran radian kurson de ZYK estas farita. Dum 25a februaro s-ro King intervjuis ĉe Aucklando, la redaktoron de la gazeto "N. Z. Radio," kiu, post multaj enketoj pri kaj konsiderado de detaloj, decidis publikigi ĉiusemajne skeletonan lecionon, kiu estos klarigita de la sendstacio ĉe Wellington. Ŝajnas ke

la inaŭguro de la kurso estas certa nun. Anonco relate al detaloj aperos poste.

De post junio ĝis decembro, 1926, ok lekcionoj estis brodkastitaj de ZYK. Jen la temoj laŭvice de brodkasto:—"La Originalo kaj celoj de Esperanto"; "Generala Esplorado de la Esperanto Movado"; "Esperanto kaj Radio" (Part 1); "Komparo de Esperanto kaj la Angla" (Parto 2); "La 18a Tutmonda Kongreso de Esperanto"; "Esperanto en la Lernejoj"; kaj "Esperanto en Komercio." La lekcionoj estis bone ricevitaj; kaj estas notinde ke neniam plendo aŭ malkonkordo estis farita. Kiel rezulto de la paroladoj Esperanta Kurso perradie estis petita.

PROVO DE TEKNIKA INSTRUADO PER ESPERANTO.

L'Ecole speciale des Travaux publics, du Batiment et de l'Industrie (Speciala Lernejo por Inĝenierarto, domkonstruado kaj Industrio) en Paris, kiu posedas la plej kompletan kaj plej gravan organizadon en Francujo por teknika instruado perkoresponda, estas preta disvastigi eksterlanden tiun instruadon, por la profito de ĉiulandaj Esperantistaj teknikistoj kaj inĝenierlernantoj. Por komenci tian agadon, ĝi komisiis areton da kompetentaj Esperantistoj por traduki ĝian tutmonde konatan kaj ŝatatan kurson pri Armbetono, kun ekzercoj kaj korektaĵoj.

Bonvolu ĉiu interesato doni per simpla poŝtkarto sian nuran aprobon; tiu aproba avizo trudos al ili nenian devigon. Ili post nelonge ricevos pliajn necesajn detalaĵojn.

Ni varme konsilas al niaj amikoj fari ĉion eblan por sukcesigi tiun praktikan aplikon de Esperanto, ĉar ĝi liveros potencon argumenton por la disvolvigo de nia lingvo en la Teknikaj kaj Sciencaj rondoj Multaj skribu!! . . . Jen la adreso:

S-ro Direktoro de l'Ecole speciale des Travaux publics, 3, Rue Thenard, Paris. V.

LETERO AL AMIKO EN EGROPO.

Estimata amiko

Kune kvar Aŭstraliaj Registaroj nun konstruas ĉe la rivero Murray la Hume akvo-rezervujo, kiu, kiam finita, estos kvar kaj duonoble pli granda ol la bone konata haveno de Sydney . . . grandega enlanda sensala maro, 200 mejlojn for de la oceano.

Kiam ĝi estos plena ĝi okupos 69 kvadratajn mejlojn, aŭ 44,000 akrojn, kaj entenos la egalecon de 2,000,000 akroj kovritaj ĝis profundo de unu futo da akvo.

Superflui la ĉirkaŭan landon estas la celo de tiu ĉi granda entrepreno. Lasu min faciligi la komprenon tiu ĉi maniere . . . la akvo konservota dum la vintro egalos la ricevon de ankoraŭ 6 coloj da pluvo . . . kiam ĝi plej urge estas bezonata . . . sur areo de 6,000 kvadrataj mejloj! Nu do imagu kia beno ĝi fariĝos al la teruloj.

Multajn jarcentojn la rivero Murray fluas 1,800 mejlojn de la fonto ĝis la maro sen ia malhelpo. Tiam venis ŝanĝo, kaj 300 mejlojn de la fonto oni mase levis ĝin, por tiel diri, el la natura fluejo kaj sternis ĝin sur la ĉirkaŭan kampon for de la loko, kie oni intencas konstrui diĝegon.

La loko troviĝas kelkcentajn jardojn pli proksime al la maro ol kie la rivero Mitta Mitta kuniĝas kun la rivero Murray. En kvar jaroj, kiam la digo estos finita, la fluo de tiuj ĉi du riveroj estos haltigitaj. La akvo sin levos ĝis la supro de la digo kaj superfluos la riverbordojn, subakvigante vastajn terpecojn akrom post akro, ĝis la akvo-rezervujo estos plena.

La rivero Murray estos altigita 50 mejlojn laŭlonge de ĝia fluejo, la rivero Mitta Mitta 25 mejlojn. La akvo-rezervujo prenos la formon de giganta ĉevalŝo, kaj kiam ĝi pleniĝos, la poetoj laŭdos ĝian belecon.

En la valo Mitta Mitta troviĝas la urbeto Tallangatta . . . destinata al detruo! Kaj pli norde kie la Melbourne al Sydney vojo atingis al riveron Murray troviĝas ankoraŭ urbeto Bowna, ankaŭ destinata al detruo.

Multaj bienistoj ankaŭ devos forlasi siajn hejmojn, kaj trovi novajn. Kompreneble ke ĉiuj ricevos kompencon. Kelkcentoj da homoj estos genataj sed la akvo konservota es-

tos beno al kelkmiloj kaj treege riĉiga havaĵo por la Aŭstralia homaro.

La konstruado de la digo estas severe dividata laŭ du apartaj konstruaj planoj . . . ĉe la Viktoria flanko estas konstruata la longa tera digo kun betona koro kaj ĉe la Nova Suda Kimruja flanko oni konstruas la betonan muregon super kiu fluos la akvo, kiam la akvo-rezervujo estas jam plena, kaj per kiu oni kontrolos la akvon uzota por superflui la bienojn.

Ĉe la Viktoria flanko la digo estas interesplena pro sia koro. Ĝi konsistas el betono fortigita per feraj stangoj, kaj kiam la digo estos finkonstruita, kuniĝos kun la murego ĉe la Nova Suda Kimruja flanko, kaj fariĝos ne trafluebla baro al la akvo. La koro komencas profunde sur la solida granito, multe pli profunde ol la originala riverfluejo, kaj grade mallarĝiĝas ĝis ĉe la supro ĝi mezuras ĉirkaŭ 3 futojn en diametro.

La koro ne estas konstruata per elteni premegecon sed por ke ĝi estu ne trafluebla baro al la akvo. Tra tera digo la akvo eble trovas vojon, kaj tuj la tuta konstruaĵo estas malfortigita. Tunelo troviĝas en la mezo de la koro, tra kiu homo povas marŝi, sed la celo de la tunelo estas kapti la akvon kiu povas flui super la koro, aŭ okaze trapenetri ĝian ĉeakvan flankon. Tia maniere la kontraŭa flanko estas ĉiam tute seka, kaj ne malfortiĝos.

La digo estos 4,258 futojn longa, bezonante 85,000 kubajn jardojn da betono, kaj 3,800,000 kubajn jardojn da amasigita tero. Estas interese kompari tiujn ĉi kalkulojn kun la kalkuloj por la Nova Suda Kimruja flanko de la digo. Tie 393,000 kubaj jaroj da betono estos uzataj kaj 93,000 kubaj jaroj da amasigita tero. La sumo de la tuta digo estos 478,000 kubaj jardoj da betono kaj 3,893,000 kubaj jardoj da teramaso, kiu, plejmulte estas jam lokita.

La betona murego havos 1042 futojn da longa, kaj la digo havos 5,300 futojn da longo . . . iom pli ol unu mejlo.

La supro de la betona murego estos 132 futojn super la nivelo de la riverfluejo, kaj tiu ĉi akvo-rezervujo estos, kiam finita, la tria el la plej grandaj en la mondo.

Via fidele, P. H.

DIVERSAJO.

Erarscioj: La aĝo de bestoj.

Pri aĝo de bestoj oni povas aŭdi multe da eraraj opinioj. Plej malnova inter ili estas, ke ju pli granda estas besto, des pli longe ĝi vivas, kaj inverse. Laŭ supraĵa rigardo ĉi tiu aserto ŝajnas esti ĝusta, ĉar efektive, dum baleno kaj elefanto facile vivas kelkajn cent jarojn, ĉevalo aŭ urso vivas nur 40—50 jarojn, leono 35, apro 25, ŝafo 15, vulpo 14, lepore 10; muso jam en la sesa jaro kutimas fariĝi viktimo de la morto pro maljuneco. Sed kiam oni pripensas, ke korvo, kiu ne estas pli peza ol la ses jarojn vivanta sciuro, povas travivi 100—150 jarojn, kaj perogrande mara anemono kun plena forto povas atingi 40—50 jarojn, montriĝas, ke la supra aserto estas erarscio.

Ĝama sorto trafas la opinion, ke la aĝo de bestoj dependas de la tempo de ilia evoluo: ju pli da tempo necesas, ke besto fariĝu plenkreska, des pli longa estas ĝia vivdaŭro. 24-jara elefanto ankoraŭ estas infano, 7—8-monata muso jam plenkreskiĝis.

Cardanus skribas en 1546: "Qui tarde crescunt, sunt diuturnioris vitae." (Kiu malrapide kreskas, longe vivas.) Flourens eĉ fiksas la proporcion tiamaniere, ke la vivdaŭro estas kvinoblo de la evolutempo.

Iom da vero estas en la afero, sed la tezo ne povas fariĝi ĝenerale valida. Multaj fiŝoj, rampuloj, birdoj maturiĝas en kelkaj jaroj, tamen vivas 100 jarojn, kaj kontraŭe inter insektoj estas multaj, kiuj evoluas en kelkaj jaroj, por ke ili, kiel plenkreskintoj, vivu eble nur kelkajn tagojn.

Ankoraŭ ekzistas kelkaj opinioj, kiuj nuntempe jam povas esti rigardataj kiel erarscioj.

La faktorojn, kiuj determinas la

vivdaŭron, oni ankoraŭ ne konas. Kiel ĝeneralan biologian tezon tamen oni povas akcepti la opinion de Weismann, laŭ kiu la vivdaŭro estas dependajo de la proporcio inter la plimultiĝemo kaj la stato de danĝero. Besto, kiu estas tre multiĝema, kaj samtempe nek ĝin nek la idaron minacas danĝero, vivas mallonge, dum besto, kiu estas malmultida kaj inter konstantaj danĝeroj, vivas pli longe.

Ekzemple aglo, kiu havas pojaron nur du ovojn kaj kiu inter la multaj danĝeroj eble nur en 50 jaroj povas eduki idojn, vivas tre longe. Por la malgrandaj, pli facile vivantaj kaj pli multiĝemaj birdoj sufiĉas dekoble pli mallonga vivo, por ke la konserviĝo de ilia speco estu sekurata.

Ĉi tiu tezo pli malpli validas ankaŭ por la kreskajaro.

Kolemano Popp.

—El Heroldo de Esperanto.

The "Radio-Belgique" station in Brussels announces an Esperanto course in French commencing on 15 January. On the same day the Antwerp station "Radio-Zoologie" began broadcasting an Esperanto course in Flemish.

The Stuttgart station, whose broadcasts are received in Wurttemberg, Alsace and part of German Switzerland, has placed in its winter programme a series of ten lectures on the auxiliary language problem in relations to the mother country, wireless, aviation, the school, trade, science, diplomacy, social policy and employees.

The last Esperanto course broadcast by the Minneapolis Station (U.S.A.) has shown that interest in Esperanto is increasing in America. More than a thousand listeners-in have ordered grammars of the language.

—I.E.S.

THE READING OF ESPERANTO LITERATURE

is essential in order to obtain clear expression and good style.

WE HAVE AN EXTENSIVE STOCK OF THE LATEST LITERATURE
BY THE BEST AUTHORS.

Pro Iŝtar (Luyken), La Faraono (Kabe), Karmen (Merimee), Lilic (Synotte), The Complete Bible.

Send stamp for full price list. Include postage when ordering, 1d. for each 1/-.

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY, Box 731f, ELIZABETH ST. P.O.,
MELBOURNE.

PRINCE CHARLES OF SWEDEN AND ESPERANTO.

Prince Charles of Sweden, the brother of Princess Astrid, who married Prince Leopold of Belgium, is a convinced Esperantist. The Belgian Esperantist League, which had sent him a letter of congratulation on his examination in Esperanto, has received the following reply to its president written in Esperanto:

Stockholm, 4 December 1926.

Sir,

Please accept my best thanks and those of my parents for your kind congratulations on my examination in Esperanto. My Rector informs me that I passed with success and even with distinction, but I am well aware that I have still a great deal to study. I have also other languages to learn, which are so difficult that they take up all my time. Nevertheless I retain my interest in Esperanto and hope for its speedy victory. Will you be so good as to convey my best wishes to the Belgian Esperantists.

I was deeply touched by your kind expressions in regard to my sister, who has been so heartily welcomed by all of you in her new country.—
Yours sincerely,

CHARLES.

—I.E.S.

THE TECHNICAL PRESS AND ESPERANTO.

The Swedish railwaymen's journal, "Signalen" regularly publishes a column in Esperanto.

The Germana neutral scientific shorthand organ "Deutsche Kurzschrift," (German Shorthand) published in Essen, gives an Esperanto summary in each number, in pursuance of the recommendation of the International Technical Press Congress, which advised all specialist reviews to facilitate their foreign circulation in this manner.

—I.E.S.

ESPERANTO IN THE POSTAL SERVICE.

Mention has already been made of the employment of Esperanto in the Russian postal services. The Soviet Postal Administration has also issued reply post cards with headings in Russian and Esperanto.

—I.E.S.

SUBAKVAJ URBOJ.

Ŝipestro de Kaspia komerca ŝiparo, Atajev, kondukante vaporiŝipon de Persujo al Baku, aliĝis la kutiman vojon kaj veturis laŭlonge de la bordo de l' terlango Ŝihovaja. Lodo montris strangan profundon seninterrompe kaj akre ŝanĝiĝantan kaj donantan impresojn de saltoj.

La kaŭzo estis en tio, ke la ŝipo veturis super urbo, nun tombigita en akvoj de Kaspia Maro. En pli-malpli malprofundaj lokoj estis klare vidataj stratoj de urbo en azia arkitekturo.

Laŭ rakontoj de ĉi-tieaj ŝikaptistoj similaj subakvaj urboj estas renkontataj en multaj aliaj lokoj de Kaspia Maro. Dum senventa, suna vetero oni povas vidi restaĵojn de urbo, kiu troviĝas proksime de ŝtona malprofundaĵo "Ignatjev." Antikva nomo de ĉi tiu urbo estas Horabaŝeher. Sur fundo de maro ĝis niaj tagoj konserviĝis ŝoseo, kiu komenciĝis apud fortikaĵo de Baku, poste sub akvo treniĝas al Brailov-promontoro, ree eliras sur teron kaj apud vilaĝo Ŝihovaja kaŝiĝas sur fundo de Kaspia Maro.

En lokaj sciencaj rondoj oni opinias, ke urboj marfundiĝis knūze de fortega tertremo antaŭ kelke da jarcentoj ĝis nia tempo.

Trad. V. Vanifatjev.

—el Heroldo de Esperanto.

SCIENCE AND ESPERANTO.

Men of science in the Far East are increasingly making use of Esperanto. The observatory of Mount Taten, near Tokio, has just published in that language its voluminous aerological report for the year 1926.

Beginning with last year a group of Japanese doctors have published a scientific journal in Esperanto and Japanese, "Psikiatrio," dealing with the problems of psychology and neurology, under the direction of Dr. Junko Sibata, of the Imura-Bioin Hospital, Hatagaya, near Tokio.

THE GREATEST SPANISH LEXI- CON AND ESPERANTO.

The example of the great Spanish lexicon "Espasa" is significant. In this monumental work every word is accompanied by a translation in several languages and in Esperanto.

—I.E.S.

ESPERANTO AND THE BLIND.

Esperanto is taught in almost all the blind schools of the world. Books printed in Braille are very costly and their number in every language is sufficiently restricted. In Esperanto the blind of all countries have a very considerable common literature and a widely circulated international review. The first wireless journal for the blind has just been started by the great French publishing house of Chiron in Paris.

—I.E.S.

A WORLD CENSUS OF ESPERANTO.

On the occasion of the fortieth anniversary of the launching of Esperanto, a census of esperantists of the whole world will be organised under the direction of the head of the Esperanto Institute of Germany at Leipzig. (Address: Esperanto, Leipzig W.31). Esperantists throughout the world and especially those who do not belong to any Esperantist organisation, are requested to notify their names, addresses, etc.

—I.E.S.

ESPERANTO AND THE UNIVERSITIES.

We have already mentioned that the University of Zagreb (Yugoslavia) has established a chair of Esperanto in its commercial faculty.

Under the official patronage of the Chamber of Commerce the University of Valencia (Spain) has instituted a course in Esperanto in its foreign language programme.

—I.E.S.

ESPERANTO IN THE PUBLIC SERVICES.

Two delegates of the Finnish Railways have just made a journey through Europe for the purpose of studying the special traffic conditions in different countries. They visited 25 towns in 15 countries and travelled a distance of nearly 10,000 kilometers. The only foreign language which they used was Esperanto, which they found everywhere sufficient.

—I.E.S.

WIRELESS & ESPERANTO.

The "Deutsche Welle" (German wave) Station of Koenigswusterhausen commenced on 6 November the broadcasting of a new regular Esperanto course.

Radio-Geneva has been doing the same since 4 November.

On 9 October the Station at Novosibirsk in Siberia broadcasted its first lecture in Esperanto.

Radio-Vienna and Zagreb and the Station at Sydney, New South Wales, broadcast regular weekly items in Esperanto.

—I.E.S.

OFFICIAL EXAMINATIONS IN ESPERANTO.

For the third time official examinations in Esperanto took place in Vienna on 10th November, 1926. Thirteen candidates, among whom were 12 teachers and one foreigner, passed the teacher's examination with distinction. Four persons successfully passed the examination of capacity.

The examinations in Esperanto of the London Chamber of Commerce are about to be held in London.

—I.E.S.

ESPERANTO IN COMMERCIAL EDUCATION.

The commercial school "Merkur" of Zagreb has introduced Esperanto as a compulsory subject into its curriculum for 1926-27.

—I.E.S.

ESPERANTO IN CHINA.

"I found Esperanto very useful in China," reported Dr. Williams, medical superintendent of the London Missionary Men's Hospital at Hankow, in an interview upon his arrival in Sydney yesterday. The international language was making big headway among the southern Chinese, he said, and he found it most useful in his work. In Peking he had given two addresses at a school where Esperanto was taught, and in Shanghai he received a letter from a Chinese who was connected with a group of 80 Esperantists. Such groups existed in various parts of south and south-west China, and elsewhere.

—"Daily Telegraph," Sydney, 22/2/27

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 7; Amerika Esperantisto, 4; British Esperantist, 263; Belga Esperantisto, 12; Deutschreft, 7; Esperanto Preso, 3, 4; Heroldo de Esperanto, 2, 3, 4, 5; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, 7, 8, 9; Internacia Esperanto-Servo, 13; International Language, Feb.; La Unuigita Tuthomaro, jan., feb.; La Nova Tago, 4; Oomoto Internacia, 13, 14; Pacifika Espero, 19; Verda Stelo, 1; Vegetarano, 1; Verda Mondo, 2.

ORIGINAL LITERATURE IN ESPERANTO.

Esperanto already possesses a considerable number of original works by authors of various nationalities. A new collection of original poems by the Hungarian poet Jules Baghy has just appeared.

—I.E.S.

THE INTERNATIONAL PEACE CONGRESS AND ESPERANTO.

Acting on a proposal of the English National Council of the Anti-war Congress, held in Geneva, adopted unanimously, at its sitting on 3 Sept. 1926, a resolution providing that, commencing from 1931, all speeches at peace congress shall be translated exclusively into Esperanto.—I.E.S.

NE ILL.

—Mia amiko,— diris la konservativulo,—vi volas, ke oni egale disdonu la tuthavaĵon, sed ĉu vi ne konsentas, ke se la tuta mono de tiu ĉi lando estis disdonita inter la popolo, ke tiuj, kiuj nun estas riĉaj, baldaŭ regajnu la riĉaĵon.

—Ne la homoj kiuj ricevis ĝin,— kiel heredaĵo respondis la sprita socialisto.

KONGRESO DE INTERNACIA "ROTARY-CLUB" OJ.

Kongreso de Internacia 'Rotary-Clubs,' grava asocio, kiu entenas 110,000 membrojn en 32 landoj, okazos en Ostende (Belg.) je la 5a de junio 1927. Jam kelkaj samideanoj, membroj de tiu Asocio, propagandis pri Esperanto en siaj kluboj kaj sukcesis interesigi ilin pri nia lingvo, ĉar la idealo de la Rotary' anoj multe similas Esperantismon.

Por utiligi tiujn unusajn sukcesojn kaj ebligi efikan agadon en la Kongreso suprealudita, estas necese, ke la Rotary'aj Esperantistoj antaŭe interkonsiligu. Tiuĉe ili do estas petataj konigi kiel eble plej baldaŭ siajn nomon kaj adreson al S-ro Rollet de l' Isle, 35, Rue du Sommerard, Paris. V. Francujo.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun laŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobaria Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: f-ino I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

La Suda Kruco

Oficiola Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio : Abono (por dek du numeroj) :
 Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
 Melbourne (Aŭstralio). Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Una numero: 4 pencoj
 Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 83 (Seventh Year) Melbourne (Melbourne), Australia. 10 majo 1927

LIBERAL DONATION FROM NEW ZEALAND ESPERANTISTS.

Our New Zealand friends took very kindly to the idea of having a Congress at Hobart last Easter. Although few had any intention of attending they all responded liberally to the Congress Fund. When information reached them that the Congress would not be held they unanimously agreed to devote the Fund to assist La Suda Kruco. S-ro W. H. King of Wellington, who did a great deal of propaganda work was asked to send the handsome sum of £8/9/- to us with a message expressing the hope that the assistance would relieve the publishing Committee of some of their worries. This it has certainly done. It has paid all expenses in connection with the production of one issue and gone quite a long way towards paying for a second. We here express our sincere thanks to our New Zealand supporters, assure them that their assistance is most timely and highly appreciated and in return assure them that every effort will be made on our part to keep the Suda Kruco such as to be looked for with interest each month. Once more we tender our sincere thanks.

Mr. J. G. Pyke, a well-known Melbourne Esperantist, left for Europe by the steamer "Ceramic," en route to the next Esperanto Congress, which this year will take place at Danzig.

SIXTH AUSTRALASIAN CONGRESS.

New Zealand Fund.

In response to a circular letter issued by me to New Zealand Esperantists inviting monetary assistance for the above-mentioned Congress, twenty-seven donations and Congress fees were received by me as follows:—W. McGuigan, 5/-; J. McGuigan, 5/-; Mangahao-Hydro Esperanto Class (per W. McGuigan), 11/-; J. Mader, 7/6; C. H. O'Dwyer, 7/6; Mrs. W. J. Butler, 5/-; J. Mackie, 1/-; Mrs. L. Payne, 10/-; J. Thom, 10/-; J. M. Vujcicich, 5/-; M. Pavlinovich, 10/-; J. Majstrovich, 10/-; Mrs. T. Dorofalff, 2/6; W. H. King, 10/-; M. J. Ravelich, 10/-; Auckland Friends' Esperanto Class (per A. M. Jackson), 3/6; C. J. Nola, 2/6; P. Sunde, 5/-; M. Sunde, 5/-; M. Marinovich, 7/6; Miss E. Hodgkinson, 5/-; L. E. Dust, 2/6; Auckland Esperanto Society, 10/-; Miss D. Tilly, 2/6; D. Tilly, 2/6; S. M. Ujdur, 10/-; Dunedin Esperanto Class (per Miss M. McCarthy, 7/6; Mr. and Mrs. J. L. King, 5/-.

Total amount subscribed	£8 18 0
Less expenses	0 6 0

Balance for Congress . . . £8 12 0

After the postponement of the Congress had been definitely decided, I secured, by correspondence, the wishes of the subscribers, who instructed me to dispose of the money

in the following manner:—

Payment of subscriptions to La Suda Krucio:—W. and J. McGuigan, Mrs. W. J. Butler, J. Thom, J. M. Vujicich, M. Pavlinovich, J. Majstrovich, M. J. Ravelich, C. J. Nola (six months); P. Sunde, M. Sunde, Miss E. Hodgkinson, Auckland Esperanto Society (2 copies), D. Tilly, S. M. Ujdur, Dunedin Esperanto Class, Mr. and Mrs. J. L. King.

Donations to La Suda Krucio:—Mangahao-Hydro Esperanto Class, 11/-; J. Mader, 7/6; C. H. O'Dwyer, 7/6; J. Mackie, 1/-; Mrs. L. Payne, 10/-; J. Thom, 5/-; M. Pavlinovich, 5/-; W. H. King, 12/6; M. J. Ravelich, 5/-; Auckland Esperanto Class (per A. M. Jackson), 3/6; M. Marinovich, 7/6; D. Tilly, 5/-; S. M. Ujdur, 5/-; Dunedin Esperanto Class, 2/6.

Two refunds of 2/6 each were made, and postal charges on the last named correspondence amounted to 5/6. At this stage two subscribers increased their donations by 2/6 and 5/- respectively. The balance (£8/9/) has been remitted this day to the Editor of La Suda Krucio as subscriptions and donations to the gazette.

I desire to express my sincere thanks and great appreciation to all those friends who so generously responded to my appeal. Although the moneys were not used as originally intended, subscribers can rest assured that they have, by helping and supporting La Suda Krucio, done a laudable act and a service to the Esperanto movement in Australasia.

W. H. KING,

New Zealand Secretary for the Sixth Australasian Congress.

Wellington, N.Z., 21st April, 1927.

Turkey.

Esperanto also numbers adherents in all parts of Turkey. Groups are to be found in various localities and the Universal Esperanto Association has delegates in the principle towns. A Turkish Esperanto Association has recently been formed and officially recognised.

The most active group is that in Constantinople, under the presidency of the Turkish engineer, Hilmi Djelil Bey. Dr. Ali Fuad Bey, Inspector General of Hygiene in Constantinople, is also a fervent Esperantist.

—I.E.S.

KION ĈIU DEVAS SĤI PRI LA LINGVOSTUDADO.

Egar senton de supereco ĝuadas personoj, kiuj povas paroli krom sia gepatra alian lingvon modernan. Se ili scipovas, — imitinda estas ilia diligenteco! Eĉ ne, se ili nur povas manipuli per kelkaj lingvaj ŝablonoj kiel per ludkartoj, tiam ne envia! Multe pli preferu plenan posedon de la sola lingvo Esperanto, ol diletaj kaj fuŝi per kelktrio da modernaj lingvoj! Sciu bone, ke naciilingvoj subtenas ne nur la pensadon, sed ankaŭ la nepensadon per tio, ke ili metas grandan nombron de pretaj lingvoŝablonoj, naciismaj frazoj, fiksitaj esprimoj, je ĉies dispono, kiujn li devas parkere lerni. Eĉ kompatinde senenhava cerbujo povas esti tapetita per tiaj luksaj frazeroj kaj tiel aspekti legata. — Tia estas bedaŭrinde tiu afero. Oni eble povus resti indiferenta al ĝi, se ĝi ne tuŝas, suferigus nian propran infanaron. En la mezlernejoj oni devige lernas fremdlingvojn. Tio nenecese suferigas la lernantojn; pro tio estas nepre necese, preparoli tiun aferon el vidpunkto de ĝia utileco kaj malutileco. — Depost jardekoj oni ripetadas, ke la lernantoj de la mezlernejoj tro estas ŝarĝataj per lernmaterialo, ke ili korpaj kaj spirite kadukiĝas sub la pezo de lernpostuloj kaj ke urĝe necesas radikala reformo de la mezlerneja instruplano. Ne estas dubo pri tio. Sed tamen ĝis nun preskaŭ nenio okazis, por forigi tiun mizeron. Jen kelkaj vortoj pri tiu temo por informi speciale la gepatraron pri tio, kio precipe estas necesa kaj ebla. — Ĉiu scias, ke same kiel por muziko ankaŭ por studado de fremdaj lingvoj la koncerna talento estas necesa. Sen tiu talento la lernanto ĉiam restas mallertulo. Spite al tiu tre klara sperto la mezlerneja instruplano tamen postulas, ke ĈIU mezlerneĵano lernu minimume du fremdajn lingvojn, neniam konsiderante, ĉu li havas por tio la necesan talenton. — Ĉu tiuj lingvoj havas tian edukan valoron kaj gravecon, kiel ekzemple matematiko aŭ la natursciencoj? — Ĉu ili por la venonta vivo de ĈIUJ mezlerneĵanoj estas egale necesaj? — Ĉu almenaŭ 10% de la mezlerneĵanoj lernas dum 7—8 jara penado tiujn lingvojn tiom, ke ili povas bone interrilati baze kaj skribe kun la koncernaj naciianoj? — Ne, ne, ne! La

eduka valoro de la lingvostudado estas tre malgranda, ĝi konsistas precipe nur el ekzercado de la memoro, el parkerado de lingvoŝablonoj kaj neregulaĵoj. — Por tio multe pli bone taŭgas aliaj regulecaj, logikaj instrumentarioj. — La angla verkisto Jack London diras (en sia fama romano "Martin Eden," ĉap. XIII). "estas egale kion vi studas. Vi povas studi la francan, la germanan, aŭ ĵeti ĉion ĉi kaj profundigi en Esperanton. Vi atingos la saman kulturnivelon. Same vi povas okupiĝi pri la greka aŭ la latina, sed la lastaj **neniam utilos** al vi por io ajn." Simile juĝis Darwin, Davy, Farady, Mayer, Lëebig, Helmholtz, Wilh. Ostwald kaj aliaj.

La devo de la lernejo estas, eduki la homon tiel, ke li sciu **logike pensadi** kaj **memstare agadi**. La nuna lingvoinstruo efikas la kontraŭon. Ĉar malantaŭ ĉiu lingva regulo embuske staras la neregulaĵoj kaj esceptoj, pro tio la lernanto akiris la konvinkon, ke en niaj praktikaj aferoj logiko kaj reguleco ne estas necesaj, eĉ estas neeblaj. Li akiris tiel danĝerou malestimon kontraŭ ĉiu leĝo. — Por la praktika vivo la nun, instruataj fremdlingvoj nur malofte estas necesaj. La grekan oni nur tiom bezonas kiel la hebrean. El la latina la kuracistoj, juristoj, pastroj ktp. nur bezonas eretojn, kiujn ili povas bone lerni dum nur du aŭ unu jaro — kio ja ofte okazas, — ĉar nun ne plu estas necese legi latinajn aŭ grekajn verkojn en originalo, ĉar ili estas jam aŭ tute malmodernaj aŭ tradukitaj kaj la asertata fama **eduka valoro** estas trompo.

Kiom la plejmulto de mezlernejoj lernas la nacilingvojn, kiujn oni instruas, pri tio ĉiu povas konvinkiĝi, se li havos okazon aŭdi, kiel abiturintoj **balbutas** kun la koncernaj naciaj. — Tamen proksimume 10 instruhoroj semajne estas dediĉataj al la por ĈIU **deviga** lingvoinstruado. Tio sumiĝas dum 7 ĝis 8 jaroj kun la prepara hejma laboro al 6000—7000 horoj! Tiuj terura multaj horoj estas por la plejmulto de la mezlernejoj tute malŝparita, **perdita tempo**, kvankam ili ofte, ho tre ofte kaŭzis multegan penadon kaj nervostreŝantan laboron. — Pro tio oni rajtas postuli reformon de la mezlerneja instruplano. Estas kompreneble, ke oni ne povos fari ĝin tiel, kiel oni ŝanĝas ĉemizon. — La mezlernejo lernigas la fremdnaciajn lingvojn, — kutime du, .. certe nur pro

tio, por ke la absolventoj povu interrilati kun la koncernaj nacioj. Sed kial nur kun du? Ĉie oni devas interrilati kun 4, 5 nacioj. Sed kiu povos lerni tiom da lingvoj? Granda embaraso! — Ne, neniam embaraso, ĉiu nur lernu la facilan internacian lingvon Esperanto kaj tuj li interkompreniĝos kun ĈIUJ nacioj, ĉar ĉie en eksterlando oni ekkomprenis la grandan utilon de internacia lingvo kaj komencis lerni kaj lernigi Esperanton. Kiu nacio plej bone progresos en tiu afero, tiu havos la plejan utilon per tio en la internacia trafiko. Do oni ne prokrastu, ĝis aliaj enpeliĝos la profiton. Esperanton, tiun logikan lingvon lernas ĉiuj facile eĉ sen lingvotalento. Pro tio ĉiu devas postuli tujan instruadon de Esp. en ĉiuj lernejoj, sed unue en la mezlernejoj, kie tio povos okazi sen plia surŝarĝo de la lernantoj, simple per ioma limigado de instruado de la nun instruataj fremdlingvoj. Ĉar la eduka valoro aŭ utilo de ili estas preskaŭ nenia, pro tio **tute ne damaĝos**, se oni el la instrutempo de ili forprenos du horojn semajne kaj dediĉos ilin al Esp.-instruo. Tiel oni gajnos bonan preparon por la instruado de la **malfacilaj fremdlingvoj** naciaj. Tri-jara esp.-instruo suŝcos. La lingvoinstruistoj saĝe ekkomprenu sian avantaĝon, tuj lernu Esperanton kaj post unu jaro ili jam povos ĝin instrui. — Poste oni **laŭvole** povos komenci per pli larĝa limigado en la instruado de fremdlingvoj. La tiel ŝparitan tempon oni uzos por la ĝis nun tro malatentata kaj tamen necesega korpo eduko, kaj por aliaj en la praktika vivo tre necesaj instruoj. El la memciitaj 7000 instruhoroj certe 1000 suŝcos per esp., la aliaj restos por praktikaj scioj. — Oni memoru, ke **per fremdlingvoj** ankoraŭ neniu inventis ion gravan por la homaro. Oni pro tio ankaŭ malkonsilu **profesia** studadon de fremdlingvoj. — Post la reformo la abiturintoj certe ne sciós balbuti fremdlingve, sed ili interkompreniĝos bone kun la tuta mondo kaj sciós suŝcon pri financaj, bankaj, ekonomiaj kaj aliaj por la vivo necesaj scioj kiujn lerni ili ĝis nun ne havis tempon.

La internacia paska konferenco en Praha (1927) ankaŭ pritraktos similan celon la peresperantan interlernejan korespondadon. En tiuj aferoj speciale la gepatraro, sed ankaŭ ĉiuj inteligentaj homoj devas helpi, ĉar ili progresigos tiel la propran infanaron.

Per la dirita reformo la mezlernejanaro kvazaŭ resaniĝos el la suferoj de la fremdlingva balasto, kiu nun kadukigas ĝian sana menson kaj korpon. Pro tio ĉiu helpu, por ke niaj posteuloj ne diru, ke ni en la komerco de la dua kvarono de la XX. jarcento estis same malsaĝaj, kiel la homoj antaŭ cent jaroj, kiuj kontraŭbatalis la fervojon.

ESPERANTO CLUB.

Welcome to a Russian.

A number of members of the Brisbane Esperanto Club met at the home of Mr. and Mrs. J. Carrick, Moorooka, for the purpose of welcoming Mr. W. J. Tulubieff, a young Russian Esperantist (a student of electrical engineering at the University of Queensland), whose presence in Brisbane has just been made known to the club, and whose departure to Clermont on practical surveying work is expected to take place at any moment. Those present included, in addition to the guest of honour, Mr. A. Staines (president) and Mrs. Staines, Mrs. N. Sunholm, Misses R. Riordan, E. Simpson, G. Carrick, and E. B. Carrick (hon. secretary), Messrs. Proctor and Baker.

Welcoming speeches were made by the president and Mr. Proctor, and a telegram in Esperanto was read from Mr. H. H. Hutton regretting his inability to be present, and asking that his greetings be conveyed to the guest.

Mr. Tulubieff suitably responded and in fluent Esperanto described his experiences since leaving Vladivostok, his native town. He painted a vivid picture of life in Peking, and his experiences there as a teacher of Esperanto.

A vote of thanks was accorded Mr. Tulubieff for his discourse.

Supper was followed by the singing of Esperanto songs, and a recitation of Dr. Zamenhof's poem, "La Vojo," was contributed by Mr. Tulubieff. The president conveyed thanks to Mr. and Mrs. J. Carrick for their kindness in giving the use of their home.

"Telegraph," 1/3/27.

Donations to Suda Krucio Fund. — Mrs. Tillotson, 5/-; Mr. Blyth, 1/-.

LETERO AL AMIKO EN EUROPO.

Estimata samideano,

Ĉiuj esploristoj, kiam ili penis esplori la internon de tiu ĉi insula kontinento, fidis al la genio de la indigenoj. Al la vojaĝanto ili estis tiel utilaj, kiel kompasoj, kaj sciis kiel kaj kie havigi nutraĵojn. En la plej fruaj tagoj antaŭ ol oni sciis, ke la indigenoj havas lingvon dividitan en milon da dialektoj oni kondukis lin por agi kiel interpretisto.

El la historio de Aŭstralia esplorado la nomo de Jackey Jackey por ĉiam estos respektata. Li estis indigeno el Singleton, Nova Sud-Kimrujo. Li akompanis la ekspedicion de Edmund Kennedy, kiam ti iris por esplori la promontoron York Peninsula. La ekspedicio lasis Sydney'on je aprilo 29- 1848. Kiam ĉiuj aliaj mortis aŭ ne plu povis daŭrigi la vojaĝon, Jackey Jackey akompanis Kennedy'on, kaj estis kun li, kiam li estis morte vundita per la lanceoj de malamikaj indigenoj. Jackey portis Kennedy'on al la densaĵo. Lia priskribo de la lastaj horoj de la esploristo estas kortuŝa:—

—Sinjoro Kennedy, ĉu vi lasos min —, mi demandis.

—Jes Jackey, mi lasos vin—, diris la jam mortanta esploristo.

—Vi portu la librojn, Jackey, al la ŝipestro, sed ne la grandajn librojn. La registaro donos al vi multon por ili—.

—Mi kunligis la paperojn kaj tiam Kennedy diris—, 'Jackey, donu al mi paperon, kaj mi skribos,' kaj li malantaŭen falis kaj mortis.

—Mi kaptis lin dum li falis kaj tenis lin, tiam min detruis kaj ploris.

Jackey sin regis kaj, per hakileto, faris krudan tombon por ricevi la korpon de sia estro. Li kovris ĝin per herbo kaj arbtrunkoj kaj siaj propraj ĉemizoj kaj pantalono, kaj kiam noktiĝis li komencis la vojaĝon al la marbordo. Persekutata de nekompataj malamikoj, li vndis tra krokodilhavaj marĉoj kaj riveroj, ĝis la kolo! en la akvo, ĝis li atingis Albany'on, kaj trovis la ŝipon Ariel atendantan la revenon de la ekspedicio.

La registaro donacis al Jackey medalon, kaj li revenis al Singleton, kie li mortis de ftizo.

Simile heroo estis Yarri, iu indigeno el Gundagai. La blankrasaj in-

vaduloj de la lando de la nigrrasuloj mortpafis lian edzinon. Sed en 1844 kiam la rivero Murrumbidgee fariĝis enlanda maro, kaj la urbo Gundagai estis sub akvo, Yarri komprenis kia danĝero minacis la urbanojn, kaj en sin kanoto farita el peco de arĉelo, li iris por savi ilin, li sukcesis savi 100 el la urbanoj. La grandecan de la tasko, kiun li prenis sur sin oni povas kompreni, kiam oni scias, ke post la subakviĝo nur 7 konstruaĵoj restis el 78, kaj 80 el 250 homoj pereis. Yarri mortis en la hospitalo ĉe Cootamundra.

Neighbor estis malsimila tipo. Li estis indiĝeno el la rivero Roper distrikto, en la malproksima lando de Aŭstralio, kie la indiĝenoj ne komprenis la leĝojn de la blankrasuloj, kaj kie la indiĝenoj opiniis ke ili havas la saman rajton mortigi bovon, kiel kanguruon. Neighbor estis prestita pro bovŝtelado. Li estis sur voje al la malliberejo, kondukata de policano Johns, kiu, kiel estis tiam kutime, enkatentigis lin per pezaj ĉenoj, kaj devigis lin marŝi apud la flanko de lia ĉevalo. Ili estis vadante tra inundata rivero, kiam la ĉevalo renversigis kaj piedfrapis la kapon de la policano. Estis nur pro la rapida ago de Neighbor, ke la policano ne dromis. Neighbor tiris la senkonscian viron el la akvo, kuŝigis lin sur la riverbordon, kaj nur lasis lin kiam li estis komforte lokita. Malĝoŝante la katenojn, per blaso,

kiun li prenis el la poŝo de la policano, li surseliĝis kaj forrajdis por trovi helpon. La vivo de la policano estis savita. Neighbor povus sin liberigi, sed li estis tro heroo.

Li iris en la malliberejon kun koro tiel gaia kiel infano. Li estis nur 16 jara . . . needukita sovaĝulo.

Lia heroeo tiel impresis la popolojn de la Norda Teritorio, ke ili atentigis la aŭtoritatojn pri la heroo, kaj la Brita Reĝo donacis al Neighbor la Albert Medalon, la Viktoria Krucon por civitanoj.

Estis festa tago en Port Darwin, kiam ĉiuj el la urbanoj kunvenis por honori Neighbor-on . . . malaplomba junulo, sin demandante pro kio la ekscito, sed tamen viro, kiun la Reĝo plezure honoris. La medalo estis fiksita al lia jako de la gubernatoro. Estis la unua fojo, en kiu la Albert medalo estis donacita al nigrrasulo. Sed aliaj nigrrasuloj meritis ĝin.

Sinjoro Clement Wragg estinta ŝtata meteorologo, diradis, ke la Aŭstraliaj indiĝenoj pli multe scias pri astronomio ol la indiĝenoj el ia alia lando en la mondo.

Aŭstralia vojaĝisto en la nordo konstatis, ke li renkontis rimarkindan lingvistan indiĝenon, kiu povas paroli Bengalee, kaj la Singapore kaj la Manila indiĝenajn lingvojn, krom tio li flue parolas kelkajn Aŭstraliajn dialektojn.

Via fidele, P. H.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriptan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon **POF VI MEM AŬ POR VIA AMIKO?** Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE MELBOURNE

THE READING OF ESPERANTO LITERATURE

is essential in order to obtain clear expression and good style.

WE HAVE AN EXTENSIVE STOCK OF THE LATEST LITERATURE
BY THE BEST AUTHORS.

Pro Iŝtar (Luyken), La Faraono (Kabe), Karmen (Merimee), Lilio (Synotte), The Complete Bible.

Send stamp for full price list. Include postage when ordering, 1d. for each 1/4.

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY, Box 731f, ELIZABETH ST. P.O.,
MELBOURNE

DU LEGENDOJ EL LA AŬSTRALIA FOLKLORO.

(1) La Gruo Kaj La Korvo.

La gruo estis bonega fiŝisto. Per siaj piedoj ŝi ĉasadis fiŝojn el sub la arbotrunkoj subigintaj sub la riveretojn, tiel kaptante multe da ili. Unu tagon, havante grandan aron de kaptitoj surborde kuŝantan, ŝi ekvidis alveni korvon, kiu petis de li kelke da fiŝoj. "Ne; vi devas pacienci ĝis mi ilin bakos," diris responde la gruo. Sed la korvo estis forte malsata kaj sekve de tio senpacienca: ŝi do ne ĉesis ĝeni la gruon, kiu tamen ĉiam diris, "Atendu, atendu."

Post iom da tempo la gruo turnis la dorson al la korvo, kaj ĉi tiu kaŝe proksimiĝis al la fiŝoj por ŝteli el ili, sed la gruo, divenante, ke io malbona okazas, returnis sin, kaptis la ŝtelonton, ekprenis fiŝon kaj ĵetis ĝin al la korvo en la okulojn. La korvo pro tio blindiĝis por kelkaj momentoj kaj falis sur la cindrigitan, nigran herbon, ruliĝante torde pro doloro. Kiam li restariĝis, videble estis, ke nur la okuloj havas blankan koloron, kaj ke la resto de lia korpo estas nigra. De tiam ĉiuj korvoj tiel aspektas.

Nu, la korvo firme decidis venĝi al la gruon, pro tio, ke ĉi tiu kaŭzis al ĝi blankajn okulojn kaj nigran plumaron. La ŝanĝito do zorge observis por ekuzi oportunan okazon, kaj unu tagon, ekvidinte, ke la gruo profundo dormas, ŝi senbrue iris proksime al la malamiko, kun fiŝosto en la ungoj. Tiam, tre zorge, facilege, ne vekante la dormanton, ŝi enpuŝis la oston en la buŝon ĝis trans la langradikon de la gruo. Post tio la farinto forŝteliris tiel sensone, kiel ĝi alveris . . . tre zorgante ne fari brueton.

Satdorminte, la gruo vekigis, kaj malferminte la buŝon por cecedi ĝi forte sentis bezonegon sufoke krii. Kian penon ĝi faris por forigi la obstrukcon el la gorgo! Baraktante kaj sin tordante, ŝi laŭte eligis strangan raŭksonaĉon: tio estis ĉio, kion ĝi povis eligi, ĉar la osto firme tenis sin en la loko. Tial eĉ ĝis la nuna tago la ununura krio eligebla de gruo estas "ga-ra-ga-ga-ra-ga"!! kaj per tio sono la Aŭstraliaj indigenoj nomas ĝin.

(2) Kiel la Suno Estiĝis.

Dum longa tempo nenia suno ekzistis, sed nur luno kaj steloj. Tio es-

tis antaŭ ol la homoj alvenis sur la teron, kaj surtere vagadis nur la bestoj kaj birdoj, kiuj estis kelkoble pli grandaj ol estas la nunaj kreitaĵoj.

Unu tagon Dinewan, la dromajo, kaj Brajgah, la gruo, staris sur vasta plataĵo apud la rivero Murrumbidgee (elp. Murrumbiĝi). Ili malpaciis kaj interbatalis. Brajgah, tre kolerante, kuregis al la nesto de Dinewan, ekprenis el ĝi unu el la grandegaj ovoj tie kuŝantaj kaj ĝin tutforte suprenĵetis kontraŭ la ĉielon. Ĝi tie rompiĝis, frapinte amason da porbrula ligno. Tio ekbruliĝis, kiam la ovo-flavo verŝiĝis sur ĝin. Pro tio la malsupra mondo estis bele prilumata. Je la miro de ĉiuj tie vivantaj, ĉar ili jam de longe alkutimiĝis al duonlumo kaj sentis sin iom konfuzataj de tio brileco.

Iu bonfara spirito, kiu vivis en la ĉielo, konstatis kiel brile kaj bele aspektis la tero, prilumata de tiu konflagro. Li pensis do, ke bone estus fari bruligon ĉutage, kaj tio jam fariĝas eĉ ĝis la nuna tago. Ĉiu tuta nokto li kaj liaj helpantoj amasigas brulotajn lignopecojn. Kiam la amaso estas preskaŭ sufiĉe granda ili elsendas matenan stelon por averti la teranojn, ke baldaŭ la ĉielanoj ekfaros la bruligon. Sed post kelka tempo ili trovis, ke tia averto ne estas kontentiga, ĉar la teraj dormantoj ja ĝin ne vidis. Ili pensis, ke ia bruo estas necesa je la mateniĝo por anonci la baldaŭan alvenon de la suno kaj por veki la dormantojn. Tamen ili ne povis decidiĝi pri elekto de vivaĵo taŭga por tia longedaŭra ofico.

Okaze ili ekaŭdis la ridan voĉon de Gaŭgaŭgaga, la kukaboro (Aŭstralia nomo de la birdo Dacelo gigas, ofte vulgare nomata Laughing Jackass; elp. laŝing ĝakas), trarandantan la aeron. "Jen la bruo, kion ni serĉas," ili diris. La kukaboron ili do informis ordone, ke jam de nun tuj kiam la frumatena stelo ekpaliĝos, kaj la tago estiĝos, ĝi ridu je sia plejforta povo, por ke la ridado veku ĉiun dormanton antaŭ sunleviĝo. Ili aldonis ke se ĝi ne konsentos, ili ne konsentos ekbruligi plu la sunfajron; anstataŭe ili lasos la teron ree enfali en ĉiaman duonlumon, laŭ ties antaŭa stato. La kukaboro submetis sin al la volo de la spiritoj, konsentis plejforte ridi je ĉiu taglumiĝo, kaj tiel konservis la lumon por la terloĝantoj. Tiam agon

ĝi faras akurate depost tiu tago, plenigante la aeron per sia laŭta, elgorga "gaŭ-gaŭ-ga-ga"!!

Kiam la spiritoj ekbruligas la fajron, ĝi donas nur malfortan varmon. Sed en la tagmezo, kiam la tuta amaso da lingvo jam flamegas, oni forte sentas la varmecon. De tiu tagtempo ĝi iom post iom formortas ĝis nur la ruĝa, ardanta cindre postrestas je sunsubiro. Tio tre rapide estingiĝas, krom unu-du pecoj, kiujn la spiritoj kovras per nuboj kaj ŝpare metas flankon por ekbruligi la novan amason da lingvo, kiu ili devas pretigi por la venonta tago.

Oni ne permesas infanojn imiti la ridon de Gaŭgaŭgaga, la kukaboro, timante, ke la birdo aŭdeas ilin, kaj kolerete ĉesos sian frumatenan krion. Se infanoj ja malgraŭ avertito ĝin imitas, nebezona dento elkreskas el supre de "subokula dento" (Angla: eyetooth). Tio devigas la malobeulon ĉiam porti porpunan signon, kiu montras lian malrespektaĵon, ĉar la bonaj spiritoj tre scias, ke se la tempo venos, kiam la Gaŭgaŭgagoj ĉesos antaŭanonci la sunon per ride, tiam oni nepre ne plu vidas "Daens" (indigenojn) en la lando, kaj la duonlumo jam ree gajnos sian regardon. —El la Angla tradukita de ROBO, Melbourne.

RECENZO.

LA ALTA KANTO DE LA AMO, laŭ malnova legendo rekantita originale en Esperanto de Teo Jung. Eldonita de "Heroldo de Esperanto," Horrem bei Koln (Germanujo); 38 paĝoj.

En plaĉaj simplaj versoj sinjoro Jung rakontas malnovan legendon pri la krucmilitoj. La edzo, kiu batalas en Palestino por liberigi la tombon de Kristo, la fidele edzino, kiu lin atendas kaj serĉas, iliaj aventuroj kaj fina ĝoja rekuniĝo—jen la temo.

La stilo estas fundamenta kaj klara. La preso kaj kovrilo estas pli bonaj, ol oni kutime trovas ĉe libroj de tia amplekso. La verko estis premiita per la Natura Floro de la Dekduaj Internaciaj Floraj Ludoj, kaj certe donos plezuron al multaj, kiuj ordinare ne amas la poezion. (A.D.)

SERVOKAPABLA! : MARCUS TYBOUT. Georges Eekhoud. El la flandra (francilingva) originale tradukis kun permeso de la aŭtoro Leon Bergiers. Eldonis F. Hirt & Sohn, Leipzig. Internacia Mondlitera-

turo volumo 20.

Mi legis en la antaŭparolo, ke Georges Eekhoud "estas certe la plej originala kaj propra belga verkisto, Li estas ne nur la ĉefo de la nuna belga literaturo Li estas figuro kiel hieraŭ estis Anaatolo France kiel estas hodiaŭ Romain Rolland." Sed la legado de la verko ne donis al mi la ĝoon, kiu mi esperis. "Servokapabla" estas insultegado kontraŭ deviga militservo, skribita de la vidpunkto de malamio de la sistemo. Estas ankaŭ dirita en la antaŭparolo, ke Eekhoud "estas la poeto de la stratulaĵoj," sed tio ne rajtigas lin skribi, kiel li skribis pri la gepatroj Goor, en, "Servokapabla," kaj pri la diboĉoj de Marcus Tybout, en la alia historio. Ĉu ni devas laŭ tiu ĉi verko formi nian koncepton de la Flandra literaturo?

La tradukinto, Leon Bergiers — nur dudekjarulo—meritas salavaran gratulon. Li tre plaĉe uzas nian lingvon, kaj mi esperas iam legi alian tradukan de li verkitan el pli nobla temo. (C.W.C.)

LA KARTO MISTERA, alfarajo kaj tradukaĵo de la rakonto verkita de Cleveland Moffett, Edward S. Payson. British Esperanto Association, 142 High Holborn, London. Prezo, unu ŝilingo, plus afranko, aŭ 4 U.E.A. respondkuponoj po 30c. afrankite.

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.K. — Moderna vivo postulas modernaj metodoj. Progreso demandas, ke ni lanĝu niaj kutimoj laŭtempe, sen kio, antaŭenigo ne povas esti. Kiel vera tiuj vortoj estas inter esperantistaj rondoj? Ni facile parolas pri alilanda progreso de nia lingvo, pri radio, aviado, konstruado, reklamado, kaj mil aliaj aferoj, sed kutime forgesas alĝustigi nin inter nia propra kreskanta familio.

En Sydney oni tion rimarkigis, kiel en aliaj urboj, kaj pensis longe pri rimedo. Semajno post semajno membroj kunvenis, instruado okazis, lektoj estis faritaj, kaj diversmaniere ni penis interesigi anojn per iom peza, pedagogia metodo. Sed la spirito mankis; nur la entuziasmo por nia afero kunligis nin kaj post disigo Esperanto ofte estis forgesita ĝis la proksima renkontiĝo. Kiel kaŭzi metamorfozon?

Nuntempa kliniĝo de la mondo es-

tas ĉefe al rapidigo kaj amuzajo. Ĉu oni ŝatas ĝin aŭ ne estas indiferentajo. Sed, se oni povas profiti per tia adapto, estus malsaĝe ne alpreni ĝin. Negocisto devas, alie li pereas. Kial ne esperantistoj?

Bone konsciante, ke de la junularo grandparte dependas nia estonto, la Sidneĵanoj decidis zorgi pri ili kaj per alloga programero altiri ilin. Antaŭ ses monatoj estis decidita aranĝi regulan dancadon en la klubejo je la lasta ĵaŭdo de ĉiu monato. Sukceso estis taja! Novaj vizaĝoj aperas, harmonio ekzistas, membroj sin pli rapide ekkonas, kaj eĉ maljunaĝuloj ne forestas tiajn vesperojn.

Ne nur per dancado oni plezurigas la membrojn kaj iliajn amikojn, sed inter ĉi tiu ero estas enmetita kanto, humoraĵo aŭ deklamo (angle kaj esperante. Per facila maniero oni atingis tion, kion oni ofte ne povas ĉe sekaj kunvenoj — propagandas kaj samtempe montras, ke esperantistoj estas tiel gajaj, kiel aliaj.

La Sydney-a klubo felicitas disponi je bonaj muzikantoj — pianist(in)oj, bangoisto, kaj haŭajaj instrumentistoj, kiuj ĉe diversaj vesperoj sin alternigas. Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ankaŭ estas provizataj. Ĉu oni povas miri, ke ĉi tiu je la dek-unua estas ankoraŭ tro frua?

Kaj la financa flanko estas la plej gojiga fakto de ĉi tiu eniranto donas leŭvolan donacon ĉe la pordo kaj ĉar elspezoj neniam estas, ofte enkasigas kvar ĝis ses semajna luo-prezo.

Estus sendankema, se la nomoj de la ĉeforganizantoj de tiuj bonegaj vesperoj ne estu menciataj: F-ino M. Harwood, vic-prezidantino; F-ino Violet Fairfield, kasistino; kaj S-ro Victor Rutland. Ke ili daŭrigu la revigon de tiu societo!

RAILWAYMEN AND ESPERANTO.

The official organ of the Swiss railwaymen at Bern has just introduced a permanent Esperanto column in the three editions of its organ "Der Eisenbahner" (German) "Le Cheminot" (French) and "Il ferroviere" (Italian). It is to be hoped that other technical organs will follow this example, which is of great importance for all railwaymen, and particularly for the external staff.

—I.E.S.

BRISBANE ESPERANTO CLUB kunvenas la trian Mardon ĉiumonate, 7.45 p.t.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Vic-Prezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW." Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 14 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 junio 1927

LIBRO EN ESPERANTO PRI AŬSTRALIO.

La firmo Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, anoncas baldaŭan sponon de libro "Aŭstralio: Lando kaj Popolo." Tiu ĉi geografia verko enhavas ĝeneralan priskribon de nia lando kaj estas kredeble unika per tio, ke ĝi prezentas Aŭstralion de du vidpunktoj de eksterlandana kaj de enlandana. La verkintoj estas Laŭri Laiho, (Finno), kaj Delsodo, (A. Maurice Hyde, Aŭstraliano.)

THE CURSE OF BABEL.

Under the title "Babel est-elle encore maudite?" (Does the curse of Babel still hold good?) the Revue de l'Univers in Paris has published an interesting pamphlet from the pen of Raymond Julliard. In an excellent style and in a convincing manner the author shows that Esperanto is steadily advancing, and that neither the inertia of the masses nor the opinions of slow-sighted or sceptical opponents can arrest its progress. The book also contains extracts from replies by eminent persons in France to questions addressed to them on the subject of Esperanto. Finally, M. Charles Richet, of the Institute in a preface, once more declares himself an enthusiastic adherent of Esperanto, which he describes as "a beautiful and luminous reality."

—I.E.S.

ESPERANTISTS ISSUE BANK NOTES.

The little town of Laren, in Holland, is the place of origin of a new kind of paper money (says the New York "Times"), which Drees Uitterdijk, the Dutch champion of Esperanto as a world language, feels confident will soon take its place among the recognised currencies of the world of trade. Agitation for the commercial use of Esperanto has long stirred discussion.

The unit of the Esperantist currency is the Spesmilo, of a value of about 50 cents in American money, and it is being issued by the Universala Spesmila Banko of Laren, which is trying to raise 20 000 Spesmiloj in real money for the purpose of starting the formation of a company with a capital of 100 000 Spesmiloj.

As recently explained by a writer in Het Volk of Amsterdam, the Esperantist bank is to keep one-quarter of its paid-in capital on deposit with a sound Dutch bank and is to maintain a covering of 40 per cent. in gold, silver, national currencies, etc., for its notes. The other 60 per cent. of the capital may be used for investments and safe business transactions.

At first it is expected that the Spesmiloj will be used by Esperantist publishing houses and in other international trading in books, etc., and that eventually they will become

recognised by even non-Esperantists as filling the need for an international currency not subject to fluctuations and exchange losses.

The notes carry a picture of The Hague Peace Palace on one side and on the other the head of Dr. Zamenhof, inventor of Esperanto, and the denomination.

"Evening News," 12/5/27.

A COMMON TONGUE

To Unite the World

The presence of the Czecho-Slovakian Soccer team in Sydney has again demonstrated that while they are all good fellows and true "sports," language difficulty bars friendly conversation," writes Mr. F. T. Simon, president of the Sydney Esperanto Society.

"This has induced your 'Man About Town' to comment on 'the necessity of a universal language,' stating that it would be a boon even if only for social purposes.

"The fact is that never before has the need been more pronounced than at present. Not merely in sport alone, but in every walk of life, could such a language be used. And it is being used, for Esperanto has proved itself an efficient medium in all parts of the world.

Study Widespread.

"The only difference is that Esperanto does not aspire to be a "universal" language, but simply an "international auxiliary" medium. Its study in Europe is widespread, which, I am sure, can be proved by the Czecho-Slovakians.

"Shortly, we are to have broadcasts relayed in Australia from Continental stations. Each will speak in their own tongue, and for matters of comparison it will certainly be interesting. But is not the need for an international language apparent once more?

"It would certainly be to the advantage of the Australian public to take a greater interest in Esperanto, otherwise they will be left far behind."

—"Evening News," 28/5/27.

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.K. — Dum la monato, nova membro, s-ro Alexander Jamieson, alparoladis la anojn de Sydney Esperanto-Societo pri "Interkomunikado — Antikva kaj Moderna." Kiel entuziasma radio-amatoro la parolanto povis profundigi en la temo kaj traktis ĝin de la komenco kun kurierportantoj ĝis hodiaŭa radia studio.

Ĉe tia kunveno ni havis la plezuron bonvenigi f-inon V. Cox, sekretariino de la Melburna Esperanto-Societo.

S-ro Edgar A. Pryke, unu el la aŭstraliaj Esperanto-pioniroj, tre interesis membrojn kun parolado titolitan "Legendoj el Malproksima Oriento." Fluparole li montris per ideale elektitaj ekzemploj la similecon inter orientaj kaj okcidentaj fabeloj. Abundas bravaj princoj, belegaj princinoj, malriĉuloj kun honestaj, laboremaj gepatroj, strangaj animaloj, feinoj, kaj mirakloj, samkiel en tiuj de Grimm, Andersen, kaj aliaj bonkonataj verkoj. Tamen, naciaj kutimoj traperetras, ebligante ioman studadon de la popola moraleco kaj vivmaniero. La aŭdantaro vigle aplaudis la parolanton je la fino.

Monata dancado denove okazis kaj estis decidita doni la enspezojn de proksima amuzajo al U.E.A. Genevo.

Omi atentigas pri la ĉi-tie okazonta jarkunveno je la 30a junio. Vizitantoj estas invitataj.

MELBURNO, V. — Dum la pasintaj unu du monatoj, troviĝis en la programo de la Melburna Esperanto Societo, kelke da tre interesaj paroladoj pri diversaj temoj. S-ro Hudson donis pluan kaj pli detalan rakonton pri multaj interesajoj en tiu malnova, kaj vasta kontinento, Afriko.

Alia parolado, tute malsama, sed egale interesa alimaniere, estis donita de s-ro Grant, kiu priskribis la vivmaniero kaj morojn de diversaj fiŝoj.

La lando de la fama poeto, Robert Burns, estis laŭdata per kantoj kaj priskribo, de entuziasma samlandano, s-ro Skurrie, kiu parolis al tre interesataj aŭskultantoj.

Antaŭ nelonge denove okazis ekskurso por tiuj, kiuj ŝatas la marsadon, sed bedaŭrinde la vetero ne estis bona, kaj iom malpligrigis la sukceson de la promeno.

Tre plaĉis al Esperantaj aŭskultantoj de SLO, aŭdi pri progreso de la internacia lingvo in Rinujo, kiun raportis d-ro Williams, kiu antaŭ ne longe revenis de tiu lando. S-ro Pyke ankaŭ brodkastis pri Esperanto, antaŭ ol li ekiris por ĉeesti la proksiman mondkongreson.

Ĉe la kunveno de la Melburna Esperanto-Societo, 323-325 strato Bourke, kvina etaĝo, okazos danco, je la 17 junio, 8a vespere. Ĉiu samideano estas kore invitata. Venu kaj venigu viajn amikojn.

HOBART ESPERANTO GROUP.—Members of the above Group have been greatly pleased to receive another visit from our ardent samideano (Dr. F. J. Williams) who has been on a brief visit to Hobart in connection with his Missionary work.

On May 23rd some of the members met at the house of the President (Miss Hannaford) where a very pleasant evening was spent. Dr. Williams kindly brought a number of photos of scenes in China which were much enjoyed, and gave a very interesting outline of the state of things in China. He also spoke of the encouraging extent to which Esperanto is being taught in various parts of that country. The doctor as usual has seized every opportunity for propaganda work while in Hobart, among which was a talk from the Hobart Radio Station on an Esperantist's experiences in China, which will extend a knowledge of the movement in Tasmania. Members joined in wishing Dr. Williams a pleasant journey back to the mainland, the only regret being that his time was too fully occupied to allow of his again visiting the Group.

AUCKLAND, Nova Zelando.—Societa kunveno okazis ilan aprilo. Estis decidite skribi al s-ro King, A.E.A. Kongressekretario, petante lin enpaga la societan donacon, kio konsistas el dek ŝilingoj, al "La Suda Kruc" kie du kotizojn al la gazeto.

Dum aprilo du Esperantistoj foriris—unu al Skotlando (Sro E. H. Lawton) kaj alia al edzocaj vicoj (Sro M. J. Ravelich). Bonvojaĝon al la antaŭa; bondeziroj kaj gratuloj de la Aucklanda Esperantistaro etendiĝas al la geedziĝintoj.

Kunveno de la Societo okazis 14an marta. Post fino de negocaj aferoj ĝenerala diskuto rilate la elparolon de la vokaloj "a" kaj "e" aŭdiĝis. Ĉiame restas malsamaj opinioj pri la korekta maniero per kiu oni devus ciparoti tiu sonojn. La prezidanto faris referencon al ses diversaj libroj, kiuj klarigis malsame. La diskuto estis intereso-plena, precipe ĉar la temo estis traktata dum la lasta vizito de s-ro King el Wellington, kiu parolante la lingvon uzas mallongajn vokalojn. La kunveno estis konkludita per lego kaj tradukado de la libro "La Kamena Angulo."

CAMBRIDGE, N.Z.—La Somera Lernejo por Instruistoj okazigita ĉe Cambridge, (N.Z.) dum januaro estis bonega kampo por disamado de nia lingvo, kaj frapante la okazon, s-ro Instruisto C. J. Adcock, Del. de U.E.A., liveris lecion pri Esperanto al la instruista geĉeestantaro. Tag-jurnaloj priskribis la lecion intereso-plena kaj instrua; kaj longa kaj plena raporto aperis. Sen ia dubo, s-ro Adcock, kiu pritraktis admirinde la temon laŭ la diversaj avantaĝoj de disvastigo kaj progreso, faris unu el la plej gravaj paŝoj ĝisnune vidoblaj en N.Z. La oportuno por paroli al reinstruistoj pri Esperanto ne sin prezentigis ĉiun semajnon. La rezultatoj jam montriĝis ĉar s-ro Adcock raportas ke kelkaj instruistoj komencis lerni Esperanton, kio afero estas bonega per tio ke la varbado de personoj de la instruista profesio portas netakceblajn sekvojn. Tia lekcio estas la unua en Nova Zelando. Pro tio kaj pro la sukcesego atingita gratulojn al s-ro Adcock!

WELLINGTON, N.Z.—Dum Marto troviĝis ĉi-tie la monfiranta ciklisto el Riga nomita Kotulski. Ĉar raporto aperis en la februara numero de Suda Kruc sciigante ke s-ro Kotulski parolis kontraŭ Esperanto dum restado en Sydney la Delegito kaj Vicdel. de U.E.A. intervjuis la cikliston, kiu refutis tute la gazetraporton ke li, antaŭ ol komencante sian vojaĝon, lernis Esperanton kaj nun ne uzas ĝin sed kontraŭe uzas nur la Anglan lingvon. Kiam s-ro Kotulski alvenis Wellington-n li ne povis paroli Esperante, kaj nur malbone Angle, sed la Delegito posedis Esperanto-francaŭ lerno-libron per kio la ruso, kiu sci-

cvas rusan, francan, germanan, k.a. lingvojn, bone kaj rapide lernis Esperanton. S-ro Kotulski aliĝis al U.E.A. kaj uzos Esperanton dum la cetero de sia vojaĝo cikle tra Suda Ameriko, ankaŭ en Usono kaj Britujo, en kiuj landoj povas interparoli li nur malbone. Estas videble ke la Sydney Jurnalistaro uzis la rusan kiel instrumenton kontraŭ Esperanto, kaj farante tion kredeble trompis multajn Sydneyanojn.

WHANGAREI, N.Z.— Pastro s-ro Woolloxall paroladis pri la temo "Esperanto" al la membroj de la ĉiusemajna lunĉo de la loka Rotaria Klubo. Interalia li instigis Rotarianojn studi la temon kaj subtenodi la movadon. Post la parolado la klubanoj donis koregan dankesprimon al la parolinto. La du lokaj taggazetoj dediĉis multe da spaco al detala raporto pri la afero.

S-ro D. Tilly, D.B.E.A., akceptis la postenon de N.Z. sekretario de la Internacia Policista Ligo (de Wein).

DUNEDIN, N.Z.— La gazeto, "Otago Witness" akceptis bonegan artikolon pri la progreso de Esperanto. La artikolo, kiu aperis je 26a aprilo, estis verkita de la kapabla plumo de f-ino E. Hodgkinson, kiu priskribis la temon en tre alloga kaj admirinda maniero. Tia artikolo venigos geamikojn al nia movado!

HOBART CONGRESS COMMITTEE HELPS "LA SUDA KRUCO."

When it was hoped a Congress would be held at Hobart during Easter last the committee advertised in this gazette. They paid for the publicity and we were not entitled to look or hope for anything more. However, on winding up their accounts the committee found themselves with £2/5/- in hand and this has most generously been handed to "La Suda KrucO." We share with Mr. Guilbert and his fellow workers their disappointment at the failure of the Congress to materialise this year and still hope that Hobart will one day welcome visiting Esperantists to a Congress. The money sent is equal to a gain of nearly a dozen subscribers for a year and we express our warmest thanks and appreciation of the donation and the kind feelings towards us which prompted it.

LA UNUJAJ EUROPAJ LOGANTOJ EN AUSTRALIO.

Verŝajne la unuaj Eŭropanoj, kiuj celis trovi konstantan loĝejon en Aŭstralio estis du Holandaj ŝipanoj, kiuj, en Novembro de la jaro 1628a, ilia ŝipestro, komandanto Francois Pelsaert, pune forlasis sur la marbordo de Okcidenta Aŭstralio proksime al la sĉdo de la nuna Geraldton.

La ŝipo "Batavia" de Pelsaert estis unu el are de komercaj ŝipoj, kiuj, proksime al la fino de la jaro 1628a, ekveturis de Holando al la insuloj sudokcidente de Azio. En Junio en la sekvinta jaro, dum la veturado trans Hindujan Oceanon, ventego disigis la ŝipon "Batavia" for de ĝiaj kunŝipoj. Blovite tre suden for de la ĝusta veturvojo, ĝi rompigis sur la danĝerplenaj rifoj, ĉirkaŭantaj la insuleton "Houtman's Abrolhos," la plej suda korala formacio en la mondo. La pasaĝeroj kaj ŝipanoj en la nombro de ĉirkaŭ tricent personoj subordigis sur du-tri insuletojn de Houtman's Abrolhos, sed pro la rapideco de la deŝipiĝo, ili, prenante provizon da manĝaĵoj, malzorgis porti kun si sufiĉan da akvo. Ne trovante naturan fonton de akvo-provizo sur la nuda rckaro, kiu estis ilia rifuĝejo, ili sekve estis en tre granda danĝero de morto de soifo. Pro la ekstrema graveco de la pozicio, la ŝipestro, prenante kun si kelkon el la ŝipanoj, ekveturis en la pinaso apartenanta al la ŝipo, por serĉi la nemalhaveblan fluidon sur la ĉeftero, pri kiu oni celis, ke ĝi ne estas malproksima. Ili sukcesis atingi la ĉefteron kaj tie subordigi. Malfeliĉe ili trovis nuda senvegetaĵa la apudmaran teron, kaj, malesperinte akiri sufiĉan provizon da akvo, ili ekveturis al Batavio por helpo. Dum la homoj lasitaj sur la insuletoj estis feliĉaj en tia mezuro, ke ili trovis akvokaven, pri kiu ili unue supozis, ke inter ĝi kaj la maro estis subtera fluejo, ĉar ĝia akvo levigadis kaj mallevigadis kun la tajdo. Tamen ĝi enhavis trinkitaŭgan akvon. Liberigita el sia maltrankvilo pri tio, ili devis fronti ankoraŭ unu gravan, tujan danĝeron pro la konduto de iuj el sia anaro. En la frua parto de la veturado de la malfeliĉa "Batavia," la ŝarĝzorgisto, Jerome Cornelis, kaj iuj el la pli sendisciplinaj ŝipanoj komplotis ribeli, ŝteli la ŝipon kaj

fariĝi korsaroj. Ial ili ne tiam plenumis la projekton, sed jam nun pro tio, ke Pelsaert forestis kaj la ŝipanoj kaj pasĝeroj, inkluzive de kelkaj virinoj kaj infanoj, estis limiĝintaj per la malvasta spaco de la marzonita insuletoaro Houtman's Abrolhos, la kanajlo Cornelis kaj liaj samideanoj denove konspiris kaj celis fari sin estroj de la situacio. Ili perforte ekposedis la rompitan ŝipon, buĝis tridek-kvardek el tiuj, kiaj rezistis ilin kaj kaptis la virinojn. Ili intencis kapti la ŝipon, kiu eble Pelsaert venigos de Batavio por savi ilin, kaj tiam komenci piratecan karieron sur la apudaj maroj. Tamen malgraŭ ilia estrado de la ruinigita ŝipo kaj daŭro el la insuletoj, kiuj devis resti la rifugiintoj, la homoj sur la tria insuleto sukcese kontraŭstaris iliajn atakojn, kaj kiam Pelsaert returne alvenis la insuletoaron en la fregato "Sardam," oni arestis kaj enkatenis la konspirintojn. La plimulton el la arestitoj oni senprokraste ekzekutis, sed ial lasis vivi daŭro el ili nomitajn Loos kaj de By. Al tiuj oni donis malgrandan boston kaj provizon da manĝaĵoj kaj lasis al ili la duban eblon de vivado sur la dezerta marbordo de nekonsolata lando priligata de sovaĝuloj.

Kvankam Tasman, veturonte en la Jaro 1644a ricevis ordonon kiel eble sciigi pri la forlasitoj, tamen verŝajne oni neniam akiris pluan informon pri tiuj nevolantaĵoj logiĝintoj en Aŭstralio. Oni nur povas supozi, ke

se ili sukcesis amike interrilati kun la indigenoj, eble ili parte estis la kaŭzo de la enmikso de la rango de blanka raso en tiu de Aŭstraliaj niguloj. Post ducent jaroj Sir George Grey rimarkis tian mikson inter la indigenoj de Nord-Okcidenta Aŭstralio.—C. Smith, en "The Age," Melbourne.

El la Angla lingvo tradukis Geo. Gordon, F.B.E.A.

LAST MONTH'S SUPPLEMENT.

In compliance with a request we last month circulated a pamphlet entitled "La Edukado de la Infanoj pri Pacaj Principoj." Our issue was made up when the pamphlets came to hand and as we wished to avoid delay they were sent out without special reference to them elsewhere. They were not distributed merely as a service for a price, but because they had a theme that no one could take exception to; and as the publishing Society had helped Esperanto it was only right that Esperanto should help them. Moreover, we think that every additional use that is made of Esperanto brings the day of universal use much nearer. It is regretted that some errors appear in the "setting," but they are not such as would obscure the meaning or should debar it from circulation.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POŬ VI MEM AC POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posta. Memoru la adreson

1 EDWING PLACE MELBOURNE

THE READING OF ESPERANTO LITERATURE

is essential in order to obtain clear expression and good style.
WE HAVE AN EXTENSIVE STOCK OF THE LATEST LITERATURE
BY THE BEST AUTHORS.

Pro Iŝtar (Luyken), La Faraono (Kabe), Karmen (Merimee), Lilio (Synotte), The Complete Bible.

Send stamp for full price list. Include postage when ordering, 1d. for each 1/-.

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY, Box 731f, ELIZABETH ST. P.O.,
MELBOURNE.

LETERO AL AMIKO EN EUROPO.

Estimata amiko,

Argumentis inter alia dum multaj jaroj tiuj, kiuj studas la Aŭstraliajn indiĝenajn bestojn, pri la naskiĝo de la kanguruo. Tiu ĉi demando nun estas solvita per la eldono de verko de Le Souef, Burrell kaj Troughton. Profesoro J. A. Thomson skribante leteron al la 'Empire Review,' diras, ke li taksis la valoron de tiu ĉi verko, laŭ la infermedona prikskribo de la iro de la novnaskita kanguruo en la poŝon de la patrino, kio estas temo pri kiu eĉ Aŭstralianoj iafaje skribis sensecaĵojn.

La patrino portas la idon dum 39 tagoj antaŭ naskiĝo. Kiam naskita la kanguruo estas ĉirkaŭ unu colono longa, kaj ne nur ĝi estas blinda kaj senhara sed ĝi ankaŭ estas tiel nematura, ke ĝi ne povas mamsuĉi. Ĝiaj antaŭaj membroj kaj kapo estas senproportie grandaj kaj facilmovaj, kaj la eta ido uzas ilin en sia aventura iro sur la haŭto de la patrino al la ventra poŝo, kiu evolvas ĉirkaŭ la kvar laktglandoj.

Eble la patrino helpas la idon per siaj lipoj, sed estas renia dubo pri la riskplena instinkta vojaĝo, kiu okupas ĉirkaŭ duonhoron. La lavro, kiel oni povas nomi ĝin, sin movas inter la haroj kun energiaj penoj de ĝiaj antaŭaj membroj, kaj daŭras flankaj movoj de ĝia kapo. Iafaje ĝi perdas la vojon por iom de tempo. Kiam ĝi atingas la poŝon, kaj tŭsas unu el la mampintoj, ĝi haltas kaj sin fiksas al ĝi per la buŝo. Ĝi facile malfiksigas eĉespte pro unika adaptaĵo, per kiu la mampinto, unue pinta kaj firma, grandigas en la buŝo de la ido kaj plenigas ĝin, tiel ke la ido restas firme fiksita. Tio daŭras dum kvar monatoj. En la frua periodo, se ne por la tutaj kvar monatoj, la eta ido ne povas suĉi, kaj la lakto devas esti perforte enigita en ĝian buŝon, per la kuntiriĝo de speciala muskolo ĉirkaŭ la laktglando. La spirado estas ebligita al ĝi per speciale longigita epigloto gardanta la traheon, kaj longigita kartilago en la laringo. La du kune estas puŝitaj antaŭen en la bazon de la naza aperturo, tiel ke la aĉro povas pasi de la naztruo al la pulmoj laŭ longe de portempa senfina traĵo.

Laŭ la tempe sinjoro Cecil Freer

venis al Melburno por ĝui libertempon, kaj donis al ĵurnalisto iom da informo pri la bubaloj, kiuj troviĝas ĉe lia bienego en la Nordo Teritorio de Aŭstralio; dum la venonta semajno li revenos al Darwin, kaj el Darwin vojaĝos 100 mejlojn oriente al sia 1000-kvadrata-mejla bienego, kie troviĝas 10,000 bubaloj, kaj 400 ĉevaloj.

Sinjoro Freer estas la plej sperta bubala paŝtisto en la Teritorio, kaj ĝi estas li kiu starigis la bubalan industrian sur firma bazo. Antaŭ dudek jaroj juna Freer kontraktis sin al advokato en Darwin, kiel lernanto, sed labori en oficejo tedis lin. Li jam antaŭe neniam rajdis ĉevalon, kaj tre malofte uzis pafilon. Tamen li akceptis kontrakton por pafi bubalojn!

En tiuj tagoj ekzistis malsamaj kondiĉoj ol hodiaŭ. Tiam tute mankis bienoj. Rivalaj aroj da ĉasistoj vagis sur la plataĵoj kaj senlekter mortpafis la bubalojn kaj pelis ilin for de la aliaj ĉasistoj.

Oni ankoraŭ mortpafas la bubalojn, sed la vagantaj aroj da ĉasistoj ne plu troviĝas kaj la bubaloj ne estas senlekter mortigitaj. Sinjoro Freer estis la unua homo fordi bienegon en la Teritorio. Li posedas lugron kaj ŝipstacion, kaj li portas la bubal haŭtojn per la lugro 100 mejlojn al Darwin.

Li dungas unu blankkrasulon kaj 30 indiĝenojn tra la tuta jaro. Mankas vojo al tiu ĉi bienego pro la multaj marĉaĵoj. Li rajdas al Darwin aŭ veturas tien per la lugro, kaj riĉevas poŝtaĵon nur monate.

Unu el la kialoj por lia nuna vizito al Melburno estis katastrofo rilatanta al virbubalo kaj li mem kaj malbona ĉevalo kaj eksplodita pafilo. Ĉiuj amase falis.

Li ankaŭ venis al Melburno por peni interesigi la Ministron de Hejmaj kaj Teritoriaj Aferoj pri lia industrio. Antaŭ nelonge li faris kontrakton, por vendi bubalan viandon al Javo. Sed oni sciigis lin, ke li devas pagi al registara inspektoro 500 funtojn sterlingajn jare, kaj ke la inspektoro devas inspekti la bubalojn antaŭ ol ili estos buŝmortigitaj, kaj ankaŭ stampi la viandon.

La ideo, ke la inspektoro povus inspekti la bubalojn dum kuregado, es-

tas ridinda, tial li forlasis la kontrakton. Miloj da tunoj de viando estas jare malŝparita.

Li eksportas la haŭtojn al la Mediteraneaĵaj landoj, kaj la meza prezo ricevata estas naŭ pecoj por funto. Mezkvalita haŭto pezas 75 funtojn. Virbubalo havas haŭton kiu, en lokoj estas dika je du coloj, sed la ledo farita el bubala haŭto estas nur mezkvalita.

Tute mankas bariloj kaj bestoj. La bubaloj estas sovaĝaj. La ĉasistoj per ĉevaloj galope ĉasas kaj mortpafas la bubalojn. Troviĝas deponejoj ĉe interspacoj en la bienego, kie oni metas la haŭtojn. La bubalaroj estas lokitaj kaj mortpafitaj eble 59 mejlojn for de la bienega hejmo. Via fidele, P. H.

LISTEN IN TO ESPERANTO FROM SAR, MELBOURNE.

Mr. C. W. Ballard, Chief delegate of the U.E.A. in Australia and President of the Melbourne Esperanto Society has received a request to talk on Esperanto from the above station. Our readers should watch the radio programmes for the precise date.

NEKROLOGO.

La 17an aprilo radice anonco anoncis al ni la morton, ĉe la insuloj Kermadec lokitaj ĉirkaŭ 600 mejlojn malproksime de Auck'land, de s-ro C. H. Parker, bone konata kaj pionira Esperantisto de Nova Zelando.

S-ro Parker energie kaj favore laboradis por Esperanto dum sia multjara restado en Auck'land. Li gvidis Esperantan kolonon en la gazeto "Auckland Labor News" kaj rigeme sin interesis pri Esperanto-klubo. Subteninto de la Laborista Partio, li kelkfoje aranĝis la reprezentadon de nia lingvo en la procesioj je "Labora Tago."

Je la fino de pasinta jaro s-ro Parker kun du kunuloj foriris Auck'land por reiri al sia bieno sur la Kermadec Insuloj. Ses semajnoj antaŭ ol la morto, dum laborado surbiene, unu el la fingroj vundiĝis, kaj la membro veneniĝis rezultante la morton. En Nova Zelando ne estas parencoj, sed multaj geamikoj de la mortinto troviĝas, kiuj kortuŝite sentas pro li.

Forpasis unu el la plej fidelaj amikoj de Esperanto.

LIBROJ RICEVITAJ.

Ni faras recenzon ĉiam ni ricevas du kopiojn de iu libro. Ĝiam la eldonisto sendas nur unu kopio, ni nur mencias la titolon, eldoniston kaj prezon.

Niĉjo Mensogulo, Biblioteko Tutmonda, (de British Esperanto Association), Fajreroj, Adalberto Smit, sm. 0.50.

Besa Adresaro 1927, Bohema Esp., Servo. 0.50 Fsv.

Miraklaj Aventuroj de Sinjoro Longkrurulo, Rjme verkita kaj eldonata de Drees Uitterdijk L. K., Hilversum, Holando, kun 152 bildoj kaj 1662 strofoj. Prezo sm. 1.25.

La Vero pri la Suda Tirolo, 1918-1926. Kompilita laŭ fidindaj aktoj kaj aŭtentaj faktoj de Hans Fingeller, Suda Tirolo, Eldonita de la aŭtoro. Kvankam ni ricevis du kopiojn de ĉi tiu libro ni ne volas esprimi opinion pri la enhavo. Kompreneble ĝia enhavo estas politika kaj kvankam ni ĝoje vidas, ke la aŭtoro uzas Esperanton por atingi internacian legantaron, ni lasos la leganton aprobi aŭ malaprobi la enhavon. La broŝuro komistas el 51 paĝoj la papero estas bona, la presado klara, kaj la Esperanto korekta.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, 5-6; Arbeiter-Esperantisten, 1-2, 3; British Esperantist, 264, 265; Bulgara Esperantisto, 8; Brazila Esperantisto, 9-12; Belgia Esperantisto, 1, 2; Bulteno de la Antverpena Esperanta Komitato, 1, 3; Bulteno de Internacia Scienca Asocio, 6; Der Arbeiter-Esperantist, 3, 4; Esperanto, 319, 320; Esperanto-Anzeiger, 4; Heroldo de Esperanto, 6 ĝis 14; Holanda Esperanto-Pioniro, 17, 18, 19; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, 28 ĝis 38; Internacia Esperanto-Servo, 14; International Language, March, April; Internacia Medicina Revuo, 2; Kolektanto, 6; La Suno Hispana, 116, 117, 118; La Lernanto, 45, 46; La Revuo Oriento, 2, 3, 4; Libera Laboristo, 2, 3; La Progreso, 1-2, 3; Oomoto, 26; Pedagogia Revuo, 2-3, 4; Pola Esperantisto, 2, 3; Pacifika Espero, 21-22; Svenska Arbetar-Esperantisten, 2, 3; Svenska-Tidningen, La Espero, 1, 2, 3; Verda Stelo, 3; Verda Mondo, 3.

UNIVERSALA ESPERANTISTA
PACIFISTA LIGO.

Lasta Alvoka!

Dum du jaroj ni klopodadas starigi fortan pacifistan ligon; ni alvokis en la Esperanto-gazetaro, ni skribis al la Naciaj Societoj, ni korespondadis kun interesuloj,—sed ĝis nun nur en unu lando (Ĉeĥoslovakujo), la pacifistoj energie kaj frukt-plene laboras.

En nia lasta cirkulero, ni klare montris nian celon: "unuigi per Esperanto ĉiujn direktojn en la pacmovado, por formi unu grandan internacian forton por la paco."

Por atingi tion, ni nepre bezonas la helpon kaj subtenon de ĉiu Esperantisto-Pacifisto. Ligo sur papero ne efikas.

Se ni ne akiras la bezonatan kunlaboron en multaj landoj, tiam estos neeble, daŭrigi nian laboron.

De la rezultato de ĉi tiu alvoko dependos, ĉu nia Ligo havas ekzistrajton.

Al vi, Esperantistoj-Samideanoj, la decido!

por: U.E.P.L. Julia Isbrucker,
Prezidantino.
Oostduinlaan 32, HAGO (Holando).

ESPERANTO AND WIRELESS.

Yet another German station, that of Langenfeld in the Rhineland, broadcast a program in German and Esperanto on 29 January last. The Kovno Station (Lithuania) commenced an Esperanto course on 2 February. The WPCB Station in New York broadcasts in English and Esperanto every Wednesday.

The Sremska Station, following the example of other Siberian stations, has for some time past pursued a similar course.

—I.E.S.

ESPERANTO IN THE NEAR EAST.

Persia.

The number of Esperantists in Persia is continually increasing. A more intensive propaganda is at present in preparation. There are already two excellent grammars in Persian. An "Esperanto Key" in the form of a small pamphlet weighing no more than 10 grams, and containing a complete grammar, the fundamental vocabulary and a list of commercial words in common use, will shortly appear.

The Universal Esperanto Association has delegates at Teheran, Tabriz, Ispahan, Sultanabad, Resht and Kermanshah.

—I.E.S.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaudon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobaria Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 85 (Eighth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 julio 1927

WORLD BROADCASTING AND AN INTERNATIONAL LANGUAGE.

By F. T. Simon

(President of Sydney Esperanto Society and Member of Modern Languages' Association).

While the world was still acclaiming and marvelling at the establishment of another remarkable broadcasting record—that of relaying 2LO (London) through PCJJ (Holland) and 2BL (Sydney)—arrangements were well in hand to further extend this service. Paris, Berlin, Vienna, and other important European stations are shortly to be heard throughout Australia and New Zealand.

The underlying motives, it may be deducted, are not solely to provide variety, or of appeasing listeners' constant demands for "something fresh," or even of basking in the limelight of public approval, but, principally, in the manifold interests of Radio Science. Space must be conquered and the ends of the Earth brought together.

Laying away the headphones at dawn, tired but satisfied, after listening from 1.30 to that historic occasion when London was first made available to the general public. I wondered what the next achievement could be. To me, this record seemed the climax—half round the globe was as far as the Magic Spark was

needed; the other half being the return journey, so to speak.

Yet, we, in this Age of Speed and Miracles, expect records to be turned out like condenser plates at a factory. So often have we been told: "Only the surface of Radio has been scratched," that with confidence almost child-like, we look to our wireless technicians to beat each new performance with something even more startling.

But how many stop to ponder the more obvious questions: What will this World Broadcasting lead to? Will it encounter any obstacles?

Again using the recent 11,000 mile relay as an illustration, has it occurred to you over how many countries the human voice was carried, and the number of languages spoken en route? This is by no means an irrelevant question, because language plays an important part in broadcasts over such an extensive area.

To many, therefore, this relay must have been unintelligible, only those possessing a knowledge of English being able to understand what transpired, apart from musical items. That the experiment was primarily intended for Australia, South Africa and India, is but a subsidiary matter.

Davis Cup results, news items, meteorological reports, and particularly station announcements, may be taken as of general interest, but failure to know our language would

place all this knowledge beyond the reach of a foreign listener. Very well then, you may say, let them learn English! Just here lies the catch.

Shortly we are to hear Berlin, Paris, and Vienna, perhaps Rome, Madrid, and Copenhagen. Will these transmissions be made in English? Certainly not! Strange languages will assail our ears and, unless we are acquainted with them, no matter whether the voices talk to us about minor or major happenings, we will be given an opportunity of knowing just how much we don't know!

Herein rests the problem. World Broadcasting is to be effective something must be done to make the spoken word understood by every listener.

To render everything into half-a-dozen languages is impracticable; consider the time and trouble alone. Besides, have you heard the broken English of that Dutch announcer? I have, and was forced to smile.

Yet there is a reasonable way of overcoming this difficulty. By adopting an international auxiliary language. Its necessary qualification must, of course, be simplicity; easily pronounced, easily understood, and easily learned.

Prominent radio men and influential wireless organisations have delved deeply into this matter during the last few years, and it is surprising that their findings are not more widely known in Australia. With few exceptions the verdict, singly and collectively, has been in favour of Esperanto.

Why Esperanto? Because its adoption will not engender rivalries which that of any other language would entail. In other words, its neutrality is its safeguard. In addition, it has those attributes just mentioned. A Radio Language must always have as its chief object the purpose of serving all people alike, and placing none at a disadvantage.

By using Esperanto side by side with the national tongue it would be a matter of indifference whether the broadcast were received from London, Buenos Ayres, or Tokio.

This method is actually in practice at several radio stations in Europe,

and practically all of the more important ones devote certain hours regularly throughout the week to giving instruction in Esperanto.

Curiously enough, those continental stations whose programmes it is proposed to first transmit to us, are amongst the more ardent advocates of Esperanto, and, providing the time chosen is one that coincides with that of an Esperanto lesson, Australian and New Zealand audiences may have a chance of hearing that language explained from either Paris, Berlin, or Vienna.

—"Wireless Weekly," 24th June, 1927.

WELL KNOWN ENGLISH ESPERANTIST HONORED BY THE KING.

Word has just come from England of an honor that had fallen upon a veteran Esperantist. At the Congress in Krakow in 1912 there appeared an elderly gentleman then hardly known among samideanoj. He was Ebenezer Howard, founder of the Garden City movement, and at that time lecturing through Europe on the subject, in Esperanto. Mr. Howard's work in town planning and in providing ideal conditions for industry and domestic life had brought its recognition from the King, for now he is known as Sir Ebenezer Howard.

On the journey from Vienna to Krakow two Esperantists in one of the compartments were delighted that they had many views in common and the hours passed quickly. One of them was much impressed by the thoroughness of the preparations being made for the coming Congress and said: "Do you know they not only picked out the hotel for each visiting delegate but have assigned him his roommate." In proof of this he pulled out from his pocket the form letter from Congress headquarters reading: "Ebenezer Howard, Hotel de France, Room 19. Roommate H. W. Hetzel, Philadelphia, U. S. A." remarking as he had not met the person he didn't know what kind of a chap he was. We have President Hetzel's word for it that he was the other fellow! The coincidence was a cause for much merriment between them.

LETERO AL AMIKO EN EUROPO.

Estimata samideano,

Multaj aŭstralianoj kiuj vizitis Papua, revenante al Aŭstralio, rakontis strangajn historiojn pri raso de palmipedaj homoj, kiu laŭ famo loĝadas en la marĉego Agaiambo. Referato al tiuj ĉi strangaj homoj troviĝas en la jara raporto de la leŭtenanto-gubernatoro (Kavaliro H. Murray).

Laŭ neas la famon, ke la indiĝenoj estas palmipedaj, sed raportas, ke ili estas neordinare interesaj homoj.

—Mi restis unu tagon—, diris la gubernatoro, —inter la popolo de la marĉego Agaiambo en golfo Dyke Ackland, kiuj, la famo diras, estas palmipedaj. Komprenoble ili ne estas palmipedaj, kaj tre similas al la ĉirkaŭaj indiĝenaj rasoj. Eble la muskoloj de iliaj kruroj malpli evoluis ol tiuj de la rasoj, kiuj kutimas marŝi kaj kuri en la arbarego, ĉar tiuj ĉi indiĝenoj, kiuj loĝadas en la marĉoj, ĉiam vojaĝas per kanotoj, kaj malofte surbordliĝas; sed, se estas diferenco, ĝi ne estas rimarkebla. Ni estingis la marĉegon, unue per ŝalupo, kaj poste, kiam la rivereto tro mallargiĝis por permesi la uzon de la ŝalupo ni veturis per kanotoj.

Ĝi estas bela loko, kie la marĉo largiĝas kaj kovriĝas de purpuraj kaj blankaj akvolilioj, kaj tie ankaŭ abundas marĉbirdojn. Troviĝas nur du malgrandaj vilaĝoj, en kiuj loĝadas malpli ol 100 homoj; la domoj estas konstruaĉoj, konstruitaj sur longaj stangoj super la akvo. Tiuj ĉi indiĝenoj nutras sin per malgrandaj fiŝoj, sago (nutra faruna nutraĵo farita el la medolo de iuj specoj de indiĝenaj palmoj, kiuj kreskadas sur la marĉbordo), kaj de tempo al tempo marĉbirdo, kiujn ili kaptas per retkaptilo. Ili havas kelkajn porkojn, kiujn ili metas sur estrado . . . kie ili restas ĝis oni buĉas ilin.

Ĉiu porko havas apartan estradon, sed ili neniam tuŝas la sekajn terojn; fakte ili neniam vidas ĝin. La vivo devas esti tre unutona por tiuj ĉi marĉloĝantoj, preskaŭ tiel unutona kiel ĝi devas esti por iliaj porkoj. Ili posedas nenian propran teron, sed oni informis min, ke ili jam komencis kulturi unu aŭ du terpecojn, supozeble laŭ permeso de la terposedantoj.

—Iufoje ili laboras ĉe la plantejoj,

kaj mi supozas ke iom post iom ilia sorto pliboniĝos, sed nuntempe ĝi ne estas enviinda.

Malmultaj aŭstralianoj scias, ke kelkaj el la plej multekostaj gemoj troviĝas en nia hejmlando. Eĉ parlamentanoj miris, kiam sinjoro Blakeley demandis de la Ĉefministro en la parlamentejo, ĉu li povas aranĝi montradon de iaj el la maloftaj kaj belaj gemoj . . . opaloj, safiroj, turmalinoj, topazoj kaj rubenoj, ĉe Canberro; por ke vizitantoj el aliaj landoj povu vidi ilin kaj preparoli ilian belecon en aliaj landoj.

Ne kontenta pri la promeso de la Ĉefministro, ke li pripensos la aferon, sinjoro Blakeley mem aranĝis montradon de Aŭstraliaj opaloj ĉe la Melbourne Parlamentejo por ke la parlamentanoj, inter kiuj estis la Ĉefministro, vidu kiaj belaj gemoj troviĝas en Aŭstralio. La opalojn oni montradis antaŭ kelkaj tagoj en la salono Queen's. Oni elmontris ilin en ĉiu diversa grado de traktado, de la natura stato, kiel krudaj ŝtonoj, ĝis la perfektigitaj stato, kiel kolĉenoj el belaj, rondaj opaloj, valorantaj 150 ĝis 300 funtoj sterlingajn, aŭ kiel ravaj kameoj el blindetiga koloro.

Sinjoro Blakeley diris, ke la plej belaj opaloj troviĝas ĉe White Cliffs. Grawin, kaj Lightning Ridge. Troviĝas aliaj ĉe okcidenta Kvinlando, kaj ĉe la montaro Stewart en Sud-Aŭstralio. Ĉiuj gemoj montritaj estis rave belaj, kaj la parlamentanoj kiuj vidis ilin partoprenis en la entuziasmo de sinjoro Blakeley pri la eventuala gemkomerco de Aŭstralio.

Antaŭ kelkaj tagoj fiŝkaptisto ĉe Welshpool (haveno ĉe la suda marbordo de Viktorio) portis al Melbourne tre interesan fiŝon. La fiŝo, kiu estas indiĝena al Eŭropaj maroj kaj estas konata kiel Hispana skombro, estis stampita ĉe la flanko. Oni supozas ke la fiŝo estis stampita, kiam ĝi eble estis unujara, kun la celo studi ĝian migradon.

Grandaj nombroj de tiuj fiŝoj estis vidataj ĉirkaŭ Viktorio dum la lastaj 12 monatoj, kaj kaptiĝis ĉe la marbordo Ninety Mile kiu etendiĝas de la lagoj Gippsland ĝis golfo Cor-net.

La fiŝkaptisto diris, ke la fakto, ke tiom multe el tiuj fiŝoj tien ĉi venis kaj restadis dum unu tuta jaro, ŝajne

pravas ke plaĉas al ili la Viktoria marbordo.

La fiŝkaptisto opinias, ke tiu ĉi strange migranta fiŝo eble anstataŭas tiun specon de fiŝo loke nomita Trevalla, kiu antaŭ ne longe forlasis niajn marbordojn.

Kiam la fiŝo estis montrita al Eŭropa fiŝvendisto en Melbourne, li diris, ke en Hispanujo oni multe ŝatas ĝin, kaj ke oni povas vendi ĝin je alta prezo. Tie ĉi ankaŭ la fiŝo estas multekosta.

Kun amika saluto, via fidele, P. H.

AL LA INTERŜANGISTOJ FILATELISTOJ KAJ KOLEKTISTOJ DE POSTKARTOJ.

Laŭ pluraj petoj, ni proponas la kreadon de vasta asocio por permesi al ĉiulandaj kolektistoj reciprokan interkonatigon instigantan al ĉiusecaj interŝanĝoj.

Tiu-ĉi asocio posedas sian propran gazeton redaktotan francalingve kaj esperante. La gazeto enhavas la liston de ĉiuj membroj kaj ankaŭ informojn pri aperoj de poŝtmarkoj kun konsilojn de spertaj kolektistoj. Se kiel ni esperas ni ricevos ĉiujn helpojn kiujn ni antaŭvidas, la unua numero de tiu-ĉi bulteno — kompreneble rezervata nur por la anoj — aperos proksime.

Jam dank'al niaj personaj rilatoj en esperantaj rondoj, ni estas certigataj pri multaj aliĝoj en diversaj landoj.

Diru plue ke estas senpaga la abono sed la anoj devas aboni la monatan lultenon. Abonprezo en Franclando: 5 franc. frankoj malplikarigita al 6 fr. frankoj por membroj de U.E.A. (aliaj landoj: 14 kaj 12 fr. frankoj).

Diversaj premioj, speciale pligrandigoj de la abontempo kaj eĉ dumvivaj abonoj estas donataj al la anoj kiuj akirigos pli da 3 novaj aliĝoj.

Aliparte por la kolektistoj ne konantaj francan aŭ esperantan lingvojn, aperos speciala multlingva kodo.

Ĉiu filatelisto intencanta riĉigi sian albumon sen multaj kostoj interŝanĝe de siaj propraj "duobloj," ĉiu kolektisto de ilustritaj kartoj deziranta tutmondan korespondadon bonvolu sendi al ni sian aliĝon, konigante nur la celon kaj la kondiĉojn de sia propono pri interŝanĝado.

LEVY,

45, rue Courloison, Provins (S.-et-M.)

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.K. — La propaganda de nia lingvo spertis tre plezurigan vigiligon en la gazetaro pasintmonate. Longaj artikoloj aperis en "Evening News," "Sydney Morning Herald," "The Sun," "Sunday News," kaj "Wireless Weekly." Ĉiuj vekis intereson kaj el multaj enlandaj urboj venis demandoj pri plua informo. Denove montras, ke se la temo estas interese kaj laŭmomente la ĵurnalaro ĝin akceptas kaj la legantaro siavice respondas per akrigita scivolemo. Do, propagandu!

"Sydney Esperanto-Societo" denis al sia anaro sekvantan programon dum monato Junio:—

Junio 2a. — Parolado de la prezidanto pri "Ido kaj Esperanto Komparataj (Fino)."

Junio 9a. — Laŭtlegado de teatraĵeto "George Dandin," per sep anoj, f-inoj Cullington, Fairfield kaj Jolliffe, kaj s-roj Davies, Rutland, Simon kaj Torr.

Junio 16a. — Vizitis la klubejon f-ino Maud Helm kaj s-ro Maurice Hyde (Melbourne), kiuj alparoladis la membrojn. S-ro Hyde travojaĝis al Brisbano, kie li estis registrare transloĝigita pro oficiala okupo.

Junio 23a. — Tre sukcesa koncerto kaj dancado ĉeestata de 60 personoj. La Centra Oficejo de U.E.A. pro kies bono la festeto estis aranĝita, ricevos plurajn funtojn sterlingajn.

Okaze de rekordfrapanta relajo de Londona Radio-programo per Philips Eksperimenta Stacio en Eindhoven, Hollando, ricevita kaj redisaŭdigita de ZBL., Sydney, je 21a. majo, la Sydney Esperanto-Societo sendis gratuleton al ĉiuj partoprenintoj, samtempe rekomendante la gradon uzadon de Esperanto por internaciaj disaŭdigadoj, precipe dum anoncado de la ĉefstacio en Hollando. La distanco estas pli ol 10,000 mejloj (16,000 k.m.), kiu facile konstatas mondrekordon.

Ce ripeto la 24a junio, kiam London, Radio-Paris, kaj Langenberg (Germanujo), estis klare aŭdebla, la loka societo denove sendis leteron kua sarfa enhavo al la diversaj fremdaj radio-stacioj.

Aliŝtatanoj kaj Nov-Zelandanoj, kaptante estontaj relajoj, estas petataj fari saman rekomendon.

S-ro Simon, kiu aŭskultis ambaŭ transsendoj dum la fruaj matenhoraj raportas, ke dum germana parolado el Langenberg, je 5.43 a.m. (Sydneya tempo), li definitive aŭdis la vorton "Esperanto," sed ne povis bone kapti la tekston. Estas bonkonata, ke la plejmulto de la germanaj stacioj, kiel ankaŭ multaj da francaj, tre favoras Esperanton. Oni tial miras, ĉu la germana stacio uzis la okazon propagandi iomete.

AUCKLAND, N.Z. — La hejmo de s-ro A. E. Dewing ĉe Remuera estis la kunveno por ĉirkaŭ tridek da samideanoj dum la vespero de 31a majo. La okazo estis pro festo en honoro de gesroj M. J. Ravelich, kiuj kunedziĝis dum pasinta paskotempo. Post mallonga parolado s-ro J. S. Russell, prezidanto de la ĉi tiea Asocio, transdonis, en la nomo de la samideanaro tie-ĉi kaj aliloke, al la gastoj donacojn decajn al la okazo. S-ro Ravelich, esprimante dankon pro sia edzino kaj mem, diris ke tia amikeca kunveno troviĝas nur inter Esperantistoj. La ĉeestantaro konkludis tre ĝuitan vesperon per la kunkantado de "La Vera Fratara."

WANGANUI, Nova Zelando.—S-ro instruisto F. E. Moreton ĉe la "Friends' School" instruas Esperanton al klaso de infanoj, kiuj bone progresas en siaj studoj. S-ro Moreton raportas ke la geknaboj lernas la lingvon precipe kanti en Esperanto.

WELLINGTON, N.Z. — Brodkasto de parolado pri Esperanto okazis de radio-stacio 2YK dum 18a majo. La parolinto, s-ro King, en kvaronhora lekcio pritraktis la temon "La Esperanta Biblio."

La defegito kaj vic-del. de U.E.A. (S-roj Dust kaj King, respektive) nun sin okupas rilate al varbiĝo de novaj membroj por U.E.A., kiu estas petinta ĉiun delegiton energie agi tiudirekte, tiel plifaciliganta la aferojn de la Asocio, kiu pro manko de

mono estas nune grave minacita.

ADELAIDE, S.A. — A new group has been formed at North Adelaide, and a class of children also are being instructed in Esperanto. When Dr. Williams was here he gave a talk from 5CL. As a result many enquiries were received and books sold, mostly in outlying places.

MELBOURNE, V. — Antaŭ kelkaj semajnoj la anoj de la Melbarna Esperanto Societo debatis pri tre interesa temo "Aŭstralio por la Blank-rasoj" kiu elvokis multajn diversajn opiniojn. Tamen, je la fino, oni decidis ke tiuj, kiuj parolis por la propono, gajnis; kiu decido tre kontentigis la plejmulton.

Antaŭ nelonge, komitato estis elektita por aranĝi serion de dancoj. La unua danco, kiu okazis je la 17a junio, en la klubĉambroj, estis granda sukceso. Ornamenta de verdaj kaj blankaj girlandoj, la dancĉambro aspektis tre bele. La dancado daŭris ĝis la dekunua horo, kaj inter la dancoj la ĉeestantoj partoprenis en amuzaj ludoj kaj vigla interparolado. Multaj ĉeestis kaj la vespero pasis tre gaje kaj feliĉe. La proksima danco okazos je la 15a de julio.

Kelkaj Esperantistoj renkontiĝis lastan dimanĉon posttagmeze, kaj ĉuis tre bonan promenon de orienta Kew ĝis Balwyn. La vetero estis tre agrebla kaj la piedirantoj tre ĝuis la marŝadon. De monteto nomata Beckett Parko, kie troviĝas soldata monumento sur la supro, la anaro vidis tre belan panoramon; en la proksimeco la valon kun kampoj kaj arboj, kaj en la distanco, la montojn, kiuj aspektis tre bluj pro la malproksimeco kaj la duonkrepusko.

PERTH, W.A. — At a meeting of Esperantists held in Perth, W.A., on June 21st, it was unanimously decided to reform the old "Nigra Cigno" group. The following officers were

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon "POB VI MEM AC POR VIA AMIKO"? Li havas multajn el ĉiu speco, je prez facile por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE MELBOURNE

elected:—President, S-ro Goode. Secretary and Treasurer, S-ro. McGuire. Weekly meetings will be held every Tuesday at "Gracemere," Hay Street east. We cordially congratulate the gesamideanoj and officers on the success of their efforts.

ESPERANTO BY RADIO.

Arrangements having been completed with the New Zealand Broadcasting Company, a radio course of Esperanto lessons will be commenced from the new super-station, 2YA (Wellington) on the 14th July. Consisting of about twenty lessons, one being broadcasted each Thursday evening from 7.30 to 8 p.m. (N.Z. time), the course will be conducted by Mr. W. H. King, who has also arranged with the journal "N.Z. Radio" for the publication of the lessons prior to their being broadcast from the station.

Having a strength of 5,000 watts, 2YA is the most powerful in New Zealand and one of the four strongest in the Empire. The station is audible in all parts of New Zealand and programmes should be well received by Australian listeners.

Listeners in both countries are requested to notify reception of the Esperanto course to the station (N.Z. Broadcasting Company, Wellesley Club Chambers, Wellington) for by so doing encouragement will be given to all working in connection with the course. New Zealand subscribers to the Suda Krucio are specially invited to give the course as much publicity as possible; also to inform their radio friends of the opportunity which is being afforded them to gain a knowledge of Esperanto.

To the Editor, "Suda Krucio."

Sir,—A well-wisher of the Melbourne Esperanto Society in the person of f-ino L. Law has been good enough to forward to the Hon. Librarian M.E.S. a number of unused books by Zamenhoff as a gift to the Library.

This gift is much appreciated and should you be able to grant space in your journal, the thanks of the M.E.S. will be suitably demonstrated.

—Yours, etc.,

C. G. ROBERT, Bibliotekisto.

MUSIC AND ESPERANTO.

Esperanto has made great strides during the last few years. It has passed through the purely experimental stage, and has become a recognised international auxiliary language. The day has passed when it was regarded by many as a fad. People in all lands make use of it for every conceivable purpose.

The question arises as to whether it is used for musical purposes as much as it deserves to be. Students of Esperanto will agree that the phonetic rendering of words, combined with stress on the penultimate syllable, provide most euphonious expression when used in song.

No language is more beautiful than the Italian for rendering opera and national songs. The same may be said of Esperanto, and no better corroboration is needed than that of the choral items rendered by Esperantist singers at recent Congresses.

The extreme flexibility of Esperanto enables a competent vocalist to sing with ease and without visible effort. This characteristic feature of the international language offers to a singer what so many national languages lack, i.e. a medium by which the most delicate shades of thought may be expressed in song; it lends itself to musical coloration and vividness.

Most music lovers recognise and appreciate this quality in the vocal presentations given by many eminent visiting Italian singers in recent years.

The writer is of opinion that a well trained quartet party or a small choir singing entirely in Esperanto would score marked success before Australian audiences.

As a means of propaganda there can be no doubt that an Esperanto Concert Party would perform valuable work in demonstrating the beauty and advantages of the language. Music, like Esperanto, knows no nation; both are truly international; each has its mission of peace and good-will to all men.

ESPERANTISTA RESPONDKU- PONO.

La Centra Oficejo de U. E. A. havis la feliĉan ideon eldoni specialan esperantistan respondkuponon, kiu plenisigos grandan mankon trovitan de ĉiu samideano por la absendo de malgrandaj monkvantoj, kiel pago de informoj petitaj la U. E. A.-Delegitoj aŭ de ia ajn mendo malmultvalora. Ĝi ne havas la malavantaĝojn de la internacia poŝta respondkuponon, kiuj estas: ne esti ĝenerala por ĉiuj landoj, aĉetebla nur en kelkaj urboj kaj nur en la grandaj oficejoj, ĉirkulado dum limigita tempo, trokareco de ĝia kosto de aĉeto, kompare al ĝia reala valoro, k. a. La nova kuponon plie validas dum 3 jaroj, estante renkeepata ĉiam dum tiu tempo kaj je ĝia nombra valoro de U. E. A. Tiu kuponon povas kaj devas esti la vera kankrono de la esperantistaro, kompreneble por malgrandaj sumoj sendotaj enlande kaj eksterlande, kaj aperos antaŭ la neesperantista publiko kiel nova pruvo de la potenco kaj solidareco de nia movado.

SHORTHAND AND ESPERANTO.

The shorthand press is displaying considerable interest in a parliamentary adaptation to Esperanto of the German shorthand system, Stolze Schrey, by Mr. Kreuz, the General Secretary of the International Central Esperanto Committee. The proceedings of the last Universal Esperanto Congress in Edinburgh, were taken down by two shorthand-writers, one using the Stolze-Schrey system and the other Pitman's.

The New German official system (Reichskurzschrift) has recently been adapted to Esperanto by a well-known German shorthand-writer, Karp Wallon, the senior German Esperantist.

Professor Scheller of Hildburghausen, Thuringia, has published an adaptation of "Stenotachygraphie" to Esperanto.

The committee of the Arends school (the Arends system is widely disseminated among German workmen) has also decided to prepare an adaptation of its system.

—I.E.S.

VICTORIA COMES IN TO LINE.

We gratefully acknowledge having received from Mrs. R. B. Bigelow, Victorian Congress Secretary, the sum of 25/-. This represents the amount paid by those Victorian Esperantists who intended to take part in the Hobart Congress. Those who contributed were unanimous in deciding to hand the amount over to La Suda Krucio. As we are continually faced with a climax in our finances, we gladly welcome this and similar donations. The material help is most timely and fully appreciated.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 10; Arbeiter Esperantisten, 4-5; British Esperantist, 266; Belga Esperantisto, 3-4; Bulteno de la Antverpena E. Komitato, 4-5; Der Arbeiter Esperantist, 5; Esperanto-Anzeiger, 4; Heroldo de Esperanto, 15, 16, 17, 18, 19, 20; Internacia Esperanto-Servo, 15-16; International Language, April, May; Internacia Medicina Revuo, 3; La Unuigita Tuthomaro, marto, aprilo; La Suno Hispana, 119, 120; La Lernanto, 47; Pacifika Espero, 23-24; Revista del Ateneo, 8; Svenska-Tidningen, La Espero, 4; Verda Stelo, 4; Vegetarano, 2.

Syria.

In view of the language difficulty in Syria, students of different nationalities are greatly interested in Esperanto. In the American University at Beirut three classes in Esperanto, with 60 pupils, have just been organised under the direction of professors speaking respectively Arabic, Persian and Armenian.

An Esperantist group is in course of formation in that town.

—I.E.S.

ALVOKO AL VERKEMAJ ESPERANTISTOJ ĈIULANDAJ!

Ni serĉas en ĉiuj landoj Esperantistojn kiuj estas kapablaj verki aŭ traduki diverstemajn artikolojn pri literaturo, tekniko, sciencaj kaj aliaj temoj. Interesiĝantoj sendu siajn adresojn tuj per simpla poŝtkarto al L. Dedericks, Hannover, Sallstr. 124 (Germ.)

JARA KUNVENO.

La jara kunveno de la Melburna Esperanto-Societo okazis 24 junion, ĉe la kunvenejo 323-5 strato Bourke, Melburno. La jenaj oficistoj estis elektitaj, Prezidanto, s-ro N. Grant; Viceprezidantoj, s-roj J. Skurrie kaj P. Hudson; Sekretariino, f-ino V. Cox; Kasisto, s-ro E. Cox; Bibliotekisto, s-ro H. Byatt; Helpbibliotekisto, s-ro J. Robert. La Kasisto raportis malgranda kreditbalanco por la klubo, kaj la Bibliotekisto raportis pligrandigita balanco por la biblioteko.

THE BIBLE IN ESPERANTO.

The first edition of 3,000 is already nearly exhausted. A fresh issue is in hand. 2,000 copies of the penny Gospel of Mark have just been issued.

ESPERANTISTA AKADEMIO.

Elektoj en la Lingvan Komitaton. Voĉdonintoj: 107. Estas elektitaj: Nova membro: S-ro Cogen (101 voĉ.); Elirintaj membroj: S-roj Lundgrew 99 voĉ.; Krestanoff, 98; Grau Casas (Josep), 97; Torok, 95; F-ino Pulvers, 93; S-ro Blok, 91. La Sekretario, R. de Lajarte. La Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, Tr. Cart.

En la juĝeja.

Juĝisto: "Vi batis la atestanton tiel, ke li ne povis labori tri tagojn."

Kulpigito: "Sed mi, sinjoro moŝto, mi eĉ ne povis skribi du tagojn, tiel doloris mia mano."

Singarde.

la vojaĝisto: "Mi ĉiun nokton metas mian monujon sub mia kapkuseno."

2a vojaĝisto: "Tion mi ne povas, ĉar tiel alte mi ne povas dormi."

ANONCO.

Zdenek Skalsky, fotografisto Ĉerveyen Kostelee. Ĉeĥoslovakio deziras poŝtmarkojn, poŝtkartojn, kaj fotojn interŝanĝi. Ĉiam respondas.

A CORRECTION.

It is regretted that the name of Mr. J. Majstrovich was inadvertently omitted from the list of N.Z. donors to the S.K. which was published in our May issue. Mr. Majstrovich generously donated the sum of 5/- to La Suda Krucio which amount is now acknowledged with thanks.

BRISBANE ESPERANTO CLUB kunvenas la trian Mardon ĉiunonate, 7.45 p.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Viceprezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro N. Grant; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaudon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĉuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobaria Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW." Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str. P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 86 (Eighth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 aŭgusto 1927

KVINSLANDA RADIO-SERVO ALLASAS ESPERANTON.

La radio-servo de Kvinlando estas ŝtata entrepreno, kaj ĝis nuna rifuzis ĉiujn proponojn pri disaŭdigoj pri aŭ en Esperanto, malgraŭ ke en aliaj ŝtatoj de nia federacio la privataj stacioj de longe okupas sin pri nia lingvo.

En lasta tempo la Brisbanaj samideanoj rekomencis sian atakon, kaj dank' al la klopodoj de sinjoro Kidd, la agema vicprezidanto de la Britana Esperanto-societo, la direktoro jam cedis, kaj permesis serion de ses paroladoj, kaj mem aludis eblecon de kurso sekvonta la serion de paroladoj.

La unuan parolon faris nia konata samideano doktoro F. J. Williams, kelksemajna vizitanto al Kvinlando, kiu antaŭ du semajnoj parolis el la stacio 4QG je la temo: *Travivaĵoj kun Esperanto en Ĉinujo*. La horo difinita por la paroloj estas ne oportuna por multaj aŭskultantoj, nome 6. 15 ĝis 6. 30 vespere; tamen jam alvenis ne malmultaj respondoj de diverslokaj interesatoj, kiuj serĉas informojn pri nia movado.

"La Suda Kruco" petas ĉiujn, kiuj aŭdas la parolojn (de kiuj ni poste anoncos la plenan programon), skribi al "Esperanto, 4QG, Brisbane" esprimante sian ŝaton kaj la esperon, ke oni poste donos kurson de instruado pri la lingvo.

BABEL AND THE WILY CHINESE.

"The Age" tells of an instance of the readiness to turn to account the difficulties of languages at the League of Nations. At the Assembly that Mr. Latham (Attorney-General) attended, the President was a Servian, who understood French, but not English. The Chinese representative gave notice that he wished to present an encyclopaedia to the League, and mounted the tribune to make some appropriate remarks. Speaking in English, he intimated his intention to make the gift, but having done so, he forthwith proceeded to launch a bitter attack upon Great Britain and the British policy in China. The English-speaking representatives listened in amazement, but the chairman, not understanding the drift of the remarks, did not intervene. Only when the speech was later translated into French did he perceive that it was grossly out of order, and a spirited reply to the charges was made by Sir R. Cecil. The moral is obvious. Much embarrassment would have been spared certain parties had the medium of speech been Esperanto.

RADIJO.

Ce vesperfesto aranĝita de la Helsinkiaj esperantistoj, radio-paroladoj en Esperanto el Melbourne kaj Londono precipe Melbourne estis bone aŭdebla.

KRONIKO.

MELBURNO, V. — Kelkaj anoj de la Melburna Esperanto-Societo renkontiĝis ĉe Bell, antaŭ kelka tempo, kaj promenis ĝis Heidelberg. Ili trovis la ekskurson kaj la interparoladon survoje. De la altaĵo okcidente de la urbo, estis videbla tre bela vidaĵo.

S-ro Hudson donis instruajn lecionojn pri Esperanto, per la rekta metodo, kiu tute kaptis la atenton de ĉiuj. — S-ro Grant interesiĝis ĉiujn per tre bona parolado pri la birdoj de Aŭstralio. Per la helpo de bildoj li montris al la anoj la formojn kaj aspekton de multaj ne bone konataj birdoj.

Multe partoprenis la debaton kiu okazis je la fino de la monato. Per multa parolado kaj ne multe da logiko la jesa partio gajnis pri la temo "Ĉu la kinematografo estas bona por la intelekto?"

Je julio 15a, okazis alia tre ĝuinda festo. La anoj kaj gastoj pasigis la feliĉajn horojn per dancado, ludoj, k. t. p. kaj Fino. Veronica Cox donis plezuron per kelkaj ĉarmaj kantoj. — Poste en apuda ĉambro, belete ornamita, la ĉeestantoj ĉuis kafon kaj frandaĵojn.

Interesa al la mondo de Esperantistoj, estis la leciono pri Esperanto kiun s-ro Rawson brodkastis de 3LO, en la komenciĝo de la monato.

BRISBANO. — Grava sukceso ĉe la ŝtata radio-servo; vidu la raporton aliloke.

La vizito de doktoro F. J. Williams, el Melburno kaj Ĉinujo, estis ne nur plezuro por la ĉiticiaj samideanoj, sed ankaŭ valora akcelo de nia propagando.

Agrabla vesperfesto la 2-an de julio en la domo de malnova samideano, sinjoro Norman Mille, en Moorooka. Kantoj kaj deklamoj en Esperanto kaj aliaj lingvoj. Oni ja ne forgesas, ke Esperanto-grupo ekzistas interalie por ekzercado pri la lingvo Esperanto, kaj ne pri la Angla!

Sukcesa ekskurso la 10-an de julio al Monto Coot-tha ("Unuarba Monteto").

Kelkaj utilaj raportoj instatempe aperis en diversaj taggazetoj. La publiko estas per tio konstante memorigata, ke Esperanto vivas kaj progresas.

La kurso por lernantoj jam kunevenas en la urbo mem, en la domo

Gilberti, sur strato Queen, kontraŭ la Regna Trezorejo, ĉiun jaŭdon. La kursanoj estas multe ŝaldantaj al sinjoro Vitoŝinski, kiu ĝis nun afable disponigis al ili sian hejmon en la kvartalo West End.

AUCKLAND, Nova Zelandio. — Dum vizito al tiu-ĉi urbo en majo, s-ro J. L. King, Del. de U.E.A. (Gisborne), bone propagandis Esperanton pentante ĉe du el la ĉefbutikoj grandajn kaj belegajn afiŝojn de la 19a Universala Esperanto-Kongreso (Danzig). Ankaŭ, parolado estis liverita al la Aucklanda sekcio de la N. Z. Laborista Partio (politika), kiu ricevis entuziasme la temon kaj la parolinton.

ROTORUA, N.Z. — En gazeto, "Rotorua Chronicle," s-ro instruisto C. J. Adcock, Del. de U.E.A., per verkaĵo propagandis Esperanton. Alĝartikole, s-ro Adcock metis la aspirojn de la lingvo internacia antaŭ la legantaro, enkondukante nekontraŭstareblajn faktojn kaj pruvojn rilatantaj al la neceso por nia lingvo, Esperanto. Ordinare, la argumentoj por Esperanto estas malnovaj, trovitaj kaj samspecaj, sed tiuj de s-ro Adcock estis renovigitaj por taŭgi al la nuna periodo progresna, kaj krom tio aranĝitaj konvinkige.

WELLINGTON, N.Z. — Dum 7a julio, s-ro W. H. King ree brodkastis de stacio 2YK. La brodkasto estis la lasta parolado antaŭ ol la inaŭguro de la Esperanto-kurso konsistanta el dudek lecionoj brodkastotaj de la nova kaj potenca stacio 2YA. Plenaj detaloj rilate al la kurso estis disaŭdiigitaj.

Du lecionoj el serio aperanta en la radia jurnalo "New Zealand Radio" aperis en eldono de 9a julio.

Kelkaj ĉi-tieaj radiuloj raportas ŝuĝon de pri Esperanto parolado de liu stacio ĉe Melburno. Oni diras ke la klareco de la brodkasto estis bone.

PERTH, W.A. — On Sunday, 17th July, Mr. P. Newland lectured on "Esperanto—the international Language" at the Leederville Town Hall. Much interest was shown by those present. The address was concise and to the point. Mr. Newland merits praise for the admirable way he handled his subject. Other speakers followed and questions were answered by the lecturer.

During the past month a deputation consisting of F.ino N. Byatt and S-ro Cain waited on the State educa-

tional authorities for the purpose of obtaining the use of a room in James Street School, Perth, for an Esperanto Class. Permission was freely given and gratefully accepted by the deputation.

PERTH, W.A. — On the invitation of S-ro Cain—delegate U.E.A.—a much travelled Esperantist, Edmund Zscheile, was present at the weekly meeting of the Perth Esperanto Societo. S-ro Goudie welcomed the visitor in a few well-chosen words, after which our samideano gave a most interesting address on his experiences in the course of his wanderings in many countries during the past four years.

S-ro Zscheile is a cultured gentleman of German nationality. He is a most enthusiastic supporter of Esperanto, and uses every opportunity for propaganda purposes. The press in Perth published articles and paragraphs concerning the visitor, and stressed the uses he made of the international language. Although four years have passed since he left Leipzig, S-ro Zscheile will not have completed his self-imposed task of walking round the world until August 1930.

On 28th July at Burda College, S-ro Zscheile delivered a further address on "Esperanto in many lands"; a representative audience thoroughly enjoyed listening to his interesting and instructive talk.

The Black Swan (Nigra Cigno) Group of Perth, Western Australia, after a period of hibernation has once more come forth in new plumage. The Group now known as the Perth Esperanto Society has been reformed and has been holding a weekly meeting for conversation in Esperanto at "Gracemere," 277 Hay Street, Perth. This meeting will however in future be held at 14 Bennett Street. Classes for the instruction of Esperanto are being held in the James' Street Schools, and quite a number of students are being instructed in the Kara Lingvo. There is every indication that the resurrection is a permanent one and it is much to be hoped that it will be so as West Australia contains a large number of Esperantists who should value the Group in the Capital.

SYDNEY. — La loko Esperanto-Societo povas raporti la sekvantajn erojn:—

Julio 7a.—Alveninte de Moksikujo, s-ro J. Fekonja multe interesigis unojn per alparoladeto pri liaj spertoj kun Esperanto en Sud-Amerikaj respublikoj, kiujn li ĵus malrapide travojaĝis. La efiko de la lingvo estas mirinde, li diris, ĉie oni renkontas afablaj, helpemaj samideanoj. S-ro Fekonja, kiu estas Jugoslaviano kaj nur malmulte parolas anglan, intencas resti dum kelka tempo en tiu-ĉi urbo kaj iĝis ano de la societo. Kiel aldono al la rimarkoj de s-ro Fekonja, Pastro Serišev rilatis kiamaniere li profitis en 15 diversaj landoj en Eŭropo kaj Azio per kono de Esperanto.

Ce pliposta eksterordinara kunsido la membroj unuavoĉe decidis fari finon M. Harwood, vic-prezidintino cum du ĵaroj kaj nun forlasante la klubon pro sanaj kaŭzoj, dumviva membro per trafe honori la multaj de ŝi faritaj servoj. Estas la usuala fojo, ke la societo starigis tian altan titolon.

Julio 14a. — Laŭprograma temo estis "Aventuroj—veraj kaj . . ." kiu donis ŝancon al komencantoj vice rakonti antaŭe preparitan mallongan historion por gajni memfidon kaj praktikon en la lingvo. Kompreneble, pli spertaj membroj ankaŭ helpis, ĉefe per terure malveraj aventuroj.

Julio 21a. — S-ro Pfahl okupis la atenton de la ĉeestantaro per diversaj allogaj sciigoj pri progreso en Esperantujo.

Julio 28a. — Kutima dancado okazis kun partopreno de 50 personoj. Krom solo-kantoj kaj deklamoj, anoj de la Laborista Eduka Asocio (drama sekcio) tre bone ludis la kontraktan scenon el "La Komercisto de Venecio."

Dum lastaj kvar semajnoj sekvantaj gazetartikoloj aperis:—"Sydney Morning Herald" (2/7/27), "Sunday Sun" (3/7/27), "The Sun" (4/7/27), "Labor Daily" (5/7/27), "Sydney Mail" (13/7/27), "Daily Guardian" (26/7/27) kaj "Daily Telegraph News Pictorial" (26/7/27).

Kiel sekvo, la societo enskribigis pli multaj membroj, ol dum iu simila periodo.

Granda intetreso nuntempe okupas Sydneyanojn pri revivigita propono okazigi internacian ekspozicion ĉi-tie

cum 1931, kiam la enorma ponto super la haveno estos finkonstruita. Esperantistoj pensas pri mondreklamo en la tre taŭga lingvo, Esperanto. Ĉu ni povas esperi?

THE BEST OLD TESTAMENT COMMENTARY.

"The originator of Esperanto is a Jew, a Hebrew with a broad mind and a wide outlook, and that has been of immense advantage to the Esperanto movement. At an early date Dr. Zamenhof began to translate and publish favorite books of the Old Testament from the Hebrew, and gradually the possibility of a complete Esperanto Bible assumed shape. Esperantists may well rejoice that he was spared to accomplish so much. It would have a great thing if the work had been done at all; but the translation has been conspicuously well done. For many years I was an examiner in Hebrew at one of our universities, and I know how difficult it is to render exactly many of the Hebrew words, and I know also that many Hebrew passages and terms are still obscure to Western and Christian minds. For years I have studied a chapter of the Esperanto Bible every day, and I am daily more thankful that Esperanto came under my notice when it did. I believe that I have never yet risen from reading a chapter without getting clearness regarding some phrase or word or shade of meaning which formerly was veiled to me. I am confident that the careful reading of the Esperanto text has been more valuable to me than the perusal of many commentaries. What the reader wants to know is the exact sense of the original; and I have seen no English or other translation that makes me feel so certain that I have got at the true meaning of the inspired author as the Esperanto does. Zamenhof's Esperanto translation is the briefest and best commentary on the Old Testament which has ever come into my hands."

—Rev. J. Beveridge, B.D., A.K.

DONACO.

La Komitato de la Viktoria sekcio de la A.E.A. donacis tri funtojn sterlingaj al la Suda Krucio. Per tia ĉi n' kvitaceas la ricevon kaj multe dankas la Viktoriaj anoj de la A.E.A. — (Red. Adm.)

PRI LA RILATO DE LA VIRINO AL LA VIRO.

(El "Sezamo kaj Lilioj" de John Ruskin).

En la jenanta elĉerpajo el la prelego "Sezamo kaj Lilioj" Ruskin subtenas el la verkaroj de Shakespeare kaj Scott siajn konvinkojn pri la morala supereco de la virino je la viro kaj ŝiaj pozicio kaj funkcio en la socio.

La baza utilo de eduko estas povi gi nin konsiligi kun la plej saĝaj, plej grandanimaj homoj pri ĉiu punkto de aferoj de ni grave nekompreneblaj. Guste uzi librojn estas studi ilin por havigi al ni helpon; turni nin al ili, kiam la propraj scio kaj solvopovo mankas, kaj lasi nin gvidi de ili en pli larĝan vidspacon, pli puran koncepton ol la niaj, kaj ricevi de ili la konstatojn unuigitajn de la juĝistoj kaj konsilantoj de la homaro, tra ĉiuj epokoj, anstataŭ kontentigi je nia ŝanĝema opinio.

Ni nun faru tiel. Ni vidu, ĉu la plej grandaj, saĝaj, korpuraj homoj el ĉiuj tempaĝoj interkonsentas pri la interrilato de la virino kun la viro. Ni aŭdu la ateston, kiam ili postlasis al ni pri tio, kion ili opiniis la vera ŝigno de la virino kaj ŝia maniero de helpo al la viro.

Unue, ni iom pritraktu Shakespeare-on.

Rimarku, ke vidate larĝe la verkaro de Shakespeare ne prezentas al ni ian ajn veran heroon: tie troviĝas nur heroinoj. Ne estas unu tute heroo ŝifuro en ĉiuj liaj verkoj teatraj, se ne paroli pri la supra skizo de Henriko kvina, traigita pro porceneja celo, kaj la ankoraŭ pli rebale skizita Valentino en "The Two Gentlemen of Verona" (La Du Sinjoroj de Verona). En la bone prilaboritaj, perfektaj dramoj nenie troviĝas ia heroo. Otelo estus tia, se lia naiveco ne estus tiel granda, ke ĝi igas lin viktimo de ĉiu malbonulo de lia renkontita; li estas ja la sola ekzemplo de viro eĉ alproksimiginta al la heroo tipo. Koriolano, Cezaro, Antonio, kun foriganta forto staras en vivo kaj pro ilia vanteco eniras ruiniĝintaj la tombon. Hamleto estas animece neagema kaj neenergie spekulativa. Romeo estas senpacienca knabo; la Komercisto de Venecio laci submetiĝa antaŭ malbona fortuno:

Kent, en Reĝo Lear, kvankam tute nobla ĉe koro, tamen estas tro kruda kaj nepolurita en sia karaktero por esti efike helpa en kriza tempo, kaj malaltigas ĝis rango de nura servisto. Ne malpli kornobla, Orlando tamen estas ne alia ol kornopatinda, malsperiga ludilo de blinda hazardo, sed sekvata, konsilata kaj fine savita de Rosalindo.

Kontraŭe, preskaŭ ne estas unu dramo, kiu ne prezentas vivbildon de perfekta virino, firmstara en trankvila espero kaj senerara viveco. Kordelio, Desdemono, Izabelo, Hermiono, Imogeno, Reĝino Katerino, Perdito, Silvino, Violo, Rosalindo, Heleno, kaj lasta sed eble la plej bela el ĉiuj, Virgilio, estas ĉiuj karaktere senmankaj kaj konceptitaj laŭ plej alta, heroo tipo de la homaro.

Mense notu due, ke la katastrofo de ĉiu dramo estas kaŭzita de la malsageco aŭ kulpo de iu viro: la reboniĝo, se ja estas tia, ĉiam efektiviĝas pro la sageco kaj virto de iu virino, kaj se ne estas tio, nenio savas estas. La katastrofo de Reĝo Lear estas pro lia seneco de prudento, lia malpacienca fierco, lia nekompreno de la propraj filinoj: la virteco de lia sola fidela idino estus savinta lin de la malbonaĵoj de la aliaj, se li ne forjetus ŝin: tamen ŝi preskaŭ savis lin malgraŭ ĉio.

Ne estas necese rakonti la historion de Otelo—aŭ pri la ununura malfortaĵo de lia tiele grandega amo—aŭ pri la malsupereco de lia perceptipovo ĉe kompare kun tiu de la ĉefa personino krom unu en la verko, Emilino, kiu mortis ateste kriante kontraŭ lia crarego: "Ho mortiginta plumkapetulo! Kial la Sorto donis tian bonegan edzinon al tia malsagegulo?"

En "Romeo kaj Julieto" la sagaca kaj admirinde kuraĝa ruzo de la edzino estas ruinigita de la maldiskreta senpacienco de ŝia edzo. En "Winter's Tale" (Vintra Rakonto), kaj en "Cymbeline" (elp. Simbelin) la feliĉo

kaj ekzisto de du reĝaj familioj jam perditaj de post longaj jaroj kaj enaŭgerigitaj ĝis formorto de la malsaga agado kaj obstineco de la edzoj, estas finfine restarigitaj firme de la reĝinecaj pacienco kaj sagaco de la edzinoj. En "Measure for Measure" (Mezuro por Mezuro) la maljusteco de la juĝitoj kaj la hontinda malkuraĝeco de la frato kontrastas la venkantan verecon kaj diamantan purecon de virino. En "Koriolano" la konsilon de la patrino, se la filo estus akceptinta kaj aginta laŭ ĝi, tio estus savinta lin el ĉiu malbono, sed lia momenta forgeso pri ĝi montriĝas esti la kaŭzo de lia vivruiniĝo. Sia preĝo, fine plenumita, savas lin, ja ne de la morto, tamen de la honto vivado kiel la detraino de lia hejmolando.

Ankaŭe, kion mi diros pri Julio, kies konstanta fideleco kontrastas la facilanimecon de amanto, kiu ne estas pli ol malbona knabo? Kion pri Heleno, ĉiam konstanta malgraŭ la koleretemo kaj ofendado de indiferecna junulo? Pri la pacienco de Hero, aŭ la koramo profunda de Beatrico, aŭ la trankvile dediĉata sageco de la "neklera knabino," kiu envenas inter la senhelpajn, blindajn, malamikajn pasiojn de viroj, kiel anĝelo milda por savi per sia nura ĉeesto kaj venki la plej krimajn malicaĵojn per sia rideto?

Rimarku plu, ke inter ĉiuj el la ĉefaj virinfiguroj en la verkaro de Shakespeare estas nur unu karaktero malforta—Ofelio. Tiu kortusa katastrofo, kiu fermas la tragikan "Hamleto" estas kaŭzita de ŝia tuta, laŭnatura nepovo helpi kaj saĝe gvidi la amanton, kiam li plej urĝe bezonas tion. Finvorte, kvankam troviĝas tri malbonaj virinoj inter la ĉefaj personoj en la dramoj—Lady Makbeto, Regan, kaj Goneril—oni tuj sentas, ke ili estas ja malbelegaj ekceptoj je la ordinara virina naturo, malbonigaj en ilia influo ĝuste proporcie al la povo de bonfarado, kiun ili

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare reboniĝos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monaĵo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE

Tio, ĝeneraldire, estas la atesto de Shakespeare rilate la karakteron kaj la ĝustan lokon de la virino en la homa vivo. Li prezentas ŝin esti neerareble fidele, saĝa, neelvojigebla justa konsilanto, ĉiam forta por sanktigi eĉ kiam ŝi ne povas savi.

Kvankam Sir Walter Scott neniel estas komparinda kun Shakespeare rilate al kompreno de la homa naturo, kaj ankoraŭ malpli, kiam kompreno de la kaŭzoj kaj iradoj de la Sorto estas la parolo, tamen ni turnu nin por ricevi la ateston de verkisto, kiu ja donis al ni la plej larĝan vidon de la kondiĉoj kaj manieroj de la ordinara pensado en la moderna socio.

Mi flankenmetas liajn nure romane-cajn prozaĵojn kiel nevalorajn, kaj kvankam la fruaj romanecaj poeziaĵoj liaj estas tre belaj, ilia aŭto ankaŭ estas senvalora, krom se nur kiel knaba idealo, tamen liaj plej bonaj verkoj, kiuj estas studaĵoj el Skota vivo, alportas fidindan ateston, kaj en la tuta verkaro li prezentas nur tri virojn, kiuj ĝisatingas la heroan rangon—Dandie Dinmont, P'ob Roy, kaj Claverhouse, (elp. Klav'rhaŭs) el kiuj la unua estas Skot-Angla landlima bienetulo: la dua estas ĉefo de vagrabistaro, kaj la tria estas soldato por malĵusta almiĉito. Sed estas nur pro iliaj kurajo kaj fido, kune kun forta, kvankam nekulturita aŭ malĝuste aplikata intelekta povo, ke tiuj viroj apenaŭ atingas la idealon de heroeco; kaj la pli junaj virfiguroj de Scott ne estas pli ol sinjoro-marionetoj de kaprica fortune, kiuj nur per helpo aŭ bonokazo de tiu sama Sorto, sukcesas travivi, ne venki, la vivpruv-cjn, nevolonte de ili elportatajn. En liaj konceptoj de junaj viroj estas renia signo de disciplinita, konsekvenca karaktero, fervora en saĝe dediĉata celo; nenia signo de traktado kun formoj de militanta multvirto definitive spitata kaj kurajo venkata.

Kontraŭe, en liaj imagaĵoj de viroj, ĉe Ellen Douglas, Flora Mac-Ivor, Rose Brawardine, Catherine Seyten, Diana Vernon, Lillias Redgauntlet, Alice Bridgenorth, Alice Lee, kaj Jeanie Deans, krom preskaŭ senfinaj specoj da karakterbeleco, molkoreco, kaj intelekta povo, ni trovas en ĉiuj tute seneraran kaj neeviteblan de ni senton de digneco kaj justeco, sentiman, ĉiampretan, senlaca memoferon al eĉ la ŝajno de deo, ne parolante pri la realaj postuloj de la Devo. Fin-

fine, trovas pacienca saĝeco de forte regata amo, kiu faras multe pli ol ture gvide firmi la amatojn de eblaj sekvaĵoj de momenta eraro; tiu saĝeco grade formas, animvivigas kaj altigas la karakterojn de la neindaj amatoj ĝis tia grado, ke je la fino de la rakonto ni havas ĝustan refleĉon da pacienco, sed ne pli ol sufiĉon, por sciigi pri ilia nemeritita sukceso.

En ĉiu okazo, do, ĉe Scott, kiel ankaŭ ĉe Shakespeare, ĝi estas la virino, kiu gardas, instruas, kaj gvidas la junulon; ĝi estas neniam, neniel, la junulo, kiu faras tion por la amatino.

(Num sekvas atesto de la glora Dante, tiu de la antikvaj Egiptanoj, Grekoj, Skandinavoj kaj aliaj).

El la Angla trad. ROBO, Melbourne.

SYDNEY—A JARRAPORTO.

En la kunveno de la "Sydney Esperanto-Societo" ĉe Rawson Chambers, Rawson Place, je 30a junio, kunvenintaj anoj atente aŭskultis la jarraportojn de diversaj komitatanoj.

Legante sian prezidantan raporton, s-ro F. T. Simson, diris: "La societo povas esti kontenta kun la faradoj dum la pasintaj dekdu monatoj; seninterrompe daŭris la semajnaj kunvenoj kun sistema instruado kaj interesaj alparoladoj, monataj dancadoj multe kontribuis al socia amuzaĵo, bona propagando okazis, vizitantaj fremdlandaj samideanoj pruvis la disvastigon de nia lingvo, kaj finance la situacio iom plibonigis. Sed de membreca vidpunkto la klubo ne sufiĉe kreskis, kiel meritas urbego kun miliono da enloĝantaro. Tion nur povas helpi individuaj eksterklubeja klopocado por superi lokaj kondiĉoj kaj tiu punkto devas esti bone konsiderata dum la venonta jaro.

"La pli sukcesaj kunvenoj okazis je Zamenhofa Vespero kaj ĉe koncerto por monprofiti la U.E.A.

"Instrua fako ĉiam estas la plej grava en nia movado, ĉar per la instrumaniere oni aŭ faras bonajn esperantistojn, aŭ nur diletantojn. Du apartaj grupoj funkcias por la membroj, unu por komencantoj kaj alia por progresantoj, ambaŭ kun bonaj rezultoj."

Post legado de longa listo pri alilanda progreso (precipe por tagjurnalaj raportistoj), la prezidanto speciale laŭdis s-ron H. Davies pro lia dumjara plibonigo kaj sindediĉo, kaj dankis la socian komitaton, konsistanta el f-inoj M. Harwood, V.

Fairfield, M. Cullington kaj s-ro V. Rutland, pro la multaj sukcesaj aranĝoj. La diversaj instruistoj ankaŭ estis dankitaj.

S-ro Sekretario Leslie Pfahl limigis sin al lokaj aktivecoj, rakontante ke dum la jaro kurso de 12 lekcioj estis disaŭditaj de 2KY (Trades Hall Broadcasting Station), kaj 9 paroladoj, enhavante 5 lekcioj, de 2FC (Farmer's Broadcasting Service). La Aŭstralia Registaro oficiale permesis la eksterlandan forsendon de Esperanto-telegramoj kiel "klara lingvo," konforme al la deziresprimo de la Internacia Telegrafa Unio, kaj alimaniere raportis ĉi-tiecan antaŭenmarŝon.

La kasistino, f-ino V. Fairfield, laŭtlegis la financon staton, montrante ke ĉe neprofitema societo, kiel la esperantistaj ĉiam estas, aferoj sufiĉe bone staras por pagi ĉiujn kuran-tajn elspezojn.

Aliaj raportoj estis tiaj de la kontrololisto, s-ro D. Healy, kaj la bibliotekistino, f-ino M. Cullington. Ĉiuj estis akceptitaj.

Oni tiam iris al elekto de nova komitato, kiu rezultis jene:—Prezidanto, S-ro F. T. Simon; Viv-Prezidantoj, S-ro H. Davies kaj D. Healy kaj S-ino. C. Ostler; Sekretario, S-ro L. E. Pfahl; Kasistino, F-ino V. Fairfield; Bibliotekistino, F-ino M. Cullington; Kontrololisto, S-ro. H. Torr.

Inter diversaĵo estis diskutita malaltigon de la kotizaĵo, laŭ propono de s-ro. Rutland kaj subtenata de s-ro. Healy. Fine, la ĉeestantaro unuanime decidis malaltigi ĝin al 10/- po jare provizore por ses monatoj, kiam revuo de la situacio devas okazi.

lita al mi kum kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kum mi al vi promeso; apud kio posta perigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fino de Aŭgusto."

This same piece written in Esperanto style would sound as follows:

"Estimata sinjoro. Mi havas la honoron raporti al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi oonis al vi; mi ankaŭ sciligas vin, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de Aŭgusto."

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Por spari la poŝtelspezoj ni kvitanacas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nomo kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata) G. Bird, 4/6, aŭg. '28; L. Lawson, 4/6, aŭg. '28; H. N. Love, 4/6, julio '28; A. M. Carter, 4/6, junio '28; P. Leahy, 9/- junio '28; H. S. Rientz, 4/6, majo '28; F. Trewin, 4/6, sept. '28; J. T. Downey, 5/6, donaco, 4/6, junio '29; R. B. Bigelow, 4/6, junio '28; C. L. Clarke, 4/6, junio '28; D. W. Kvarnstrom, 5/-, sept. '28; W. L. Waterman, 9/-, junio '29; F. T. R. McArchie, 4/6 aŭg. '28; N. R. Thomas, 4/6, junio '28; H. V. Tilbury, 4/6, junio '28; E. D. Nisbet, 1/-, okto. '29; F. Livy, dec. '27; A. H. Slade, 10/-, julio '29.

GAZETOJ RICEVITAJ.

British Esperantist, 269; Belga Esperantisto, 6-7; Bulteno de la Esperanta Komitato, 8; Bulteno de Esperanta Preso-Agentejo, 3; Der Arbeiter-Esperantist, 8; Esperanto-Anzeiger, 7; Heroldo de Esperanto, 29 ĝis 33; Internacia Esperanto-Servo, 19-20; International Language, Aug.; Kristana Revuo, 1; La Unigita Tut-homaro, jul. aŭg.; La Suno Hispana, 12v; La Fervojisto, 5-6; La Lernanto, 50; Libera Laboristo, 7; La Revuo Orienta, 7; La Progreso, 6; Munkaskultura, 5-6; Oomoto 27; Oomoto Internacia, 19; Svenska-Tidningen; La Espero, 6-7; Verda Mondo, 7, 8.

ESPERANTO AND TOURISTS.

Esperanto is increasingly employed in connection with touring. The Touring Offices of Colagne, Budapest and Neuchatel have published illustrated guides in Esperanto.

—I.E.S.

NIGRULOJ KAJ SUPERAKVOJ.

De E. S. Sorenson en "Sydney Morning Herald" de 21a marto, 1927.

Rimarkinda okazo dum lastatempa superakvego en Kvinlando estis la ĉroniĝo de kelkaj indiĝenoj. Tia morto ĉe la gentoj de Murri neniam okazis en la malnova tempo, en kiu la gentoj estis multehomaj kaj la superakvegoj estis pli oftaj, ol ili estas en la nuna tempo. Almenaŭ dum mia multjara spertado inter la indiĝenoj mi neniam aŭdis diri, ke unu el ili tiamaniere perdis la vivon. Kvankam ili grandnombre loĝadis apud la bordoj de la riveroj, kaj kvankam iam kaj iam superakvegoj subite alkuregis kaj rapide superverŝis la teron, ili ĉiam ĝustatempe forsavis sin sur eksterdangera lokon. Se la akvo ĉirkaŭis ilin, tio ne tre timiĝis ilin, ĉar ĉiuj de pli ol ses-jaraj povis naĝi.

Laŭ la pratempa moro de la indiĝenoj en la sovaĝejo la virinoj havas la devon instrui la infanojn naĝi, kaj tiam ili faras en profunda akvo preskaŭ tuj kiam la etuloj ekpovas kuri. Ĉar la hejmo aŭ vilaĝo de indiĝeno ĉiam estas apud rivero, tio kiu ne povus naĝi estus en konstanta danĝero dromi. Plue en ilia vagado en la sovaĝejo la familioj ofte devas transiri profundajn riverojn kaj riveretojn kaj surdorse transporti tiujn infanojn, kiuj ne povas naĝi, krom se ĉe la transirejo troviĝas arboĉelaj boatoj faritaj por la transiro. Komprenibile, ke la plenaĝuloj kiel eble plej baldaŭ sensargigas sin de tia laboro.

La indiĝenoj estas atentegaj observantoj kaj komprenemaj studentoj de la ilin ĉirkaŭantaj sovaĝaj kreitaĵoj, kaj en la tempo, kiam ili estis grandnombraj en la orientaj regionoj kaj laŭlonge de la rivero Murray kaj la riveroj fluantaj en ĝin, ili rimarkis iajn signojn per kiuj ili antaŭdiris pluvon kaj la okazon de superakvoj. Vidinte ranojn forlasantaj la riverbordojn kaj superflueblajn akvokavojn ili tuj transloĝiĝis sur pli altan lokon ekster la atingebla de superakvo kaj kie hejtoligno estis proksima kaj abunda. Diversaj specoj de ranoj loĝas apud riveroj kaj en marĉoj, sed neniu speco amas fluantan akvon, kaj tial, ke sur pli alta tero ilia vivo ofte dependas de pluvo, la indiĝenoj akceptis ĝeneralan formigradon tien kiel nepran sig-

non de venonta superakvo.

La sagacon de la formikoj antaŭdiri pluvon kaj superakvon la indiĝenoj ne dubis, kaj kiam tiuj insektoj, plenkripe aŭotis pri transloĝiĝo sur pli altan lokon ekster la atingebla tikigis siajn citadelojn kontraŭ iron malsekeco, tio estis signo de venonta superakvo, kaj kiam surgrunde la ĝantoj araneoj kovris siaj kavetojn, tio per la indiĝenoj estis nepre antaŭdiro pri venonta pluvego. Alia signo estis amasa formigrado de riveraj testudoj al malproksimaj lagunoj, sed kiam tiuj amfibuloj forlasis la lagunojn por iri la riverojn, tio estis signo de tempo de senpluveco. Multajn birdojn la nigruloj konsideris kiel antaŭvidantojn de venonta vetero kaj inter ili ĝenerale ia nigra kakatuo, sur kies agojn kaj kriojn influas certaj statoj de la atmosfero. Dum la pluviga ceremonio la pluvfaristoj de la ĝantoj ornamis sin per pintoj de la nigra kakatuo alportis en la manoj faskojn el tiaj.

Pluvadon kaj superakvon antaŭdiris la stranga, ŝiranta krio de la kukolsimila birdo "Channel-bill" (t.e. kanelita beko, *Seythrops novaehollandiae*) ĝenerale nomata "floodbird" (t.e. superakva birdo) de la loĝantoj en la Kvinlanda sovaĝejo. Tiu birdo sin movas laŭ la fluejoj, je kelka distanco antaŭ la superakvo, el la nordaj partoj de Kvinlando ĝis la rivero Barcoo kaj ties regiono.

Alia antaŭdiristo de pluva vetero estis la blanka ibiso (*Threskiornis strictipennis*), kiu iras renkonte al pluvoj, kvankam aliaj akvaj kaj marĉaj birdoj sekvas tuj post granda pluvado.

Estis nenio en la sovaĝejo, kion ne rimarkis la vigla okulo kaj atentega orelo de la indiĝeno de Murri. Eĉ ŝango en la krio de birdo estis plena de signifo por li. Dum la pasado de nekalkuleblaj jarmiloj li lernis la naturajn leĝojn de la sovaĝejo, kaj tra ĉiuj siaj generacioj li loĝis inter la vivantaj kreitaĵoj de sia regiono. La sovaĝejo estis liaj lernejo kaj provizanto, kaj tial ĝi povis doni nenian signon, kion li nepovis interpreti. Li sciis la historiojn kaj kapricojn de la riveroj en sia landparto kaj ĉion, kion oni devas atendi pro ili. Kvankam por li muĝanta superakvo estis travibriga spektaklo, ĝi ne estis bonvena okazo. Li neniel timis ĝin, kie ajn ĝi lin trafis, ĉar en okazo de subita dan-

ĝero pro neantaŭvidita multe pli ol ordinara superakvo, savis lin liaj lerteco kaj eltenemo en la akvo kaj lia povo rapide grimpi arbojn aŭ similan maniere sin svingi de branĉo sur branĉon. Plaĉis al li, ke de tempo al tempo okazis iom alta, rapidkura fluo, ĉar ĝi purigis kaj freligis la riverojn, sed se la akvo atingis aŭ superigis la bordojn tio ofte ruinigis la fikaptadon. En laŭ laŭ laŭ okazo de superakvoj venigadis pluvantajn svarmojn da "sabi-muŝoj," kiuj tial turmentis la kangurulojn, ke ili foriris. Al la indiĝeno plaĉis la pleniĝo de marĉoj kaj lagunoj: ĉar tiurturne venigadis miriadojn da anasoj kaj anseroj, kaj tiam ovojn fariĝis abundaj. Ankaŭ la okazo de superakvo ŝita laguno donis al li grandan fiŝarojn, kiuj tiam forliberigis kaj naĝis super la akvokovritaj herbaĵoj al la riveroj kaj riveretoj, kie eble ili sufokiĝis de koto.

Tial kiam la antaŭvidistoj avertis pri venonta ruiniga superakvego de rivero, la indiĝenoj transmovis sian vilaĝon en la proksimon de alia superakvo ne tro granda por provizi al ili nutraĵon.

El la Angla lingvo tradukis George Gordon, F.B.E.A.

KRONIKO.

MELBURN, V. — En la frua parto de septembro, kelkaj Esperantistoj kaj geamikoj renkontiĝis en la ĉefurbo kaj veturis vagonare ĝis Hurstbridge. Survoje, fruktarboj kun blankaj kaj ruĝkoloraj floroj, vidiĝis inter la kampa verdaĵo, kaj subite, la ekvido de belaj kvazaŭ orkovritaj arboj, elvokis ekkrion de admiro. Estis la akacio kiu ravis la rigardantojn, kaj, poste, piedirante laŭ longe de la rivereto, ili kolektis bonajn specimenojn. Intertempe, la anoj bone profitis je la okazo kaj ekzercis sin en la parolo de la kara lingvo.

La kutima danco, allogis la dancaĵantojn, kiuj pasigis feliĉan vesperon per tiu ekzercado. — Por provi la lertecan de la anoj, estis aranĝita je sept. 9, Esperanto konkurso, hju estis aranĝita kaj ankaŭ instrua. Tre riĉinda dabato "Ĉu estus bone faru imposton sur katoj," okazis je la 30a, kaj la prononco estis vigle debatita. — Tiam saman vesperon la anoj havis la plezuron bonveniĝi inter si, s-ron L. Hiob, kiu

ius alvenis el Estonia. La sinjoro afable respondis al la bonvenigaj vortoj, kaj pasigis la vesperon per interesa interparolo kun la anoj.

AUCKLAND, Nova Zelando.—Sinjorino J. L. King, el Gisborne, daŭras sian laŭdindan kaj efikan propagandadon. Dum vespero, 24an aŭgusto, ŝia samideanino paroladis per radio de stacio, IYA. Post la parolado, s-ino King brodkastis kanton en Esperanto al la radiaj aŭdantoj.

WELLINGTON, N.Z. — Klubo, nominata "Esperanto-Klubo de Wellington," fondiĝis dum 31a aŭgusto, kiam ĉirkaŭ dekkvoo da interesatoj entuziasme kunvenis. Pardonpetoj pro foresto neevitebla estis ricevitaj de kvar aliaj personoj.

S-ro Daniel, kiu prezidis, klarigis la celojn, disvastigon, k. t. p. de Esperanto. S-ro Potts priskribis la progreson kaj agon de la antaŭa societo, kiu kreskis ĝis ĉirkaŭ 150 da anoj, sed dum la milito ĉesis funkcii.

Jen la oficistoj de la nova klubo:—Prezidanto, s-ro W. L. Edmanson, F.B.E.A.; vic-prezidanto, s-ro L. E. Dust, D.B.E.A. kaj Delegito de U.E.A.; sekretario, s-ro Bertram Potts, F.B.E.A. (Adreso: 34 Argentine Avenue, Miramar, Wellington); kaskisto, s-ro V. L. M. Daniel.

Intertempe la klubo kunvenas dufoje ĉiumonate — dum la unua kaj tria jaŭdoj el la monato — en la kunvenejo, 19 Tory strato (apud Courtnay Place).

Dum 8a septembro okazis la unua kunveno de la klubo, kiu dekkvin da anoj ĉeestis. Inter klubanoj troviĝas kvar diplomitoj de la Brita Esperantista Asocio, kiuj sin okupas pri la instruado de la lingvo al la lernantoj.

Nov-Zelandaj legantoj de S.K. estas petataj ĉiufoje rekomendi al genmiko en la ĉefurbo aliĝon al la klubo, la adreso de kies sekretario estas supre-citita.

SYDNEY, N.S.W. — La Sydney Societo ankoraŭ progresas kaj reorganiziis la klasojn. Multaj novaj anoj aliĝis.

Unu vesperon okazis ĝindaj konkursoj aranĝitaj de s-ro V. Rutland, kaj en alia vespero tiu sama samideano faris tre interesan paroladon pri la "Evaluado de Sporto," en kiu li traktis la temon de la plej fruaj tempoj, kaj montris, ke kelkaj el niaj nuntempaj sportoj estas tre antikvaj.

S-ro D. Calnan paroladis pri Giorgio Bruno, kiu oni mortigis ĉar li asertis, ke la tero vojaĝas ĉirkaŭ la suno.

La ĉiumonata dancado okazis, kaj estas multe ĝuita.

La 29 de septembro arvenis s-ro W. H. Sturge, per la vaporŝipo "Niagara". Tiu ĉi sinjoro estas vicdelegito de la U.E.A. en Birmingham, Angrujo, kaj farus mondvojaĝadon. Li portis al ni salutojn el Birmingham'aj Esperantistoj, kaj prenas hejmen la bondezirojn de la Sydney Esperanto Societo.

BRISBANO (Kvinslando. — En la lasta kunveno de la Esperanto-societo okazis parolado pri la UEA kaj ties praktika utilo, kaj la devo subteni ĝin en ĉiuj monopartoj. Kelkaj aŭstantoj aliĝis al UEA, kaj oni elektis delegiton kaj vicdelegiton; sinjoroj Klement Kidd kaj Oskar Behncken.

Dimanĉon 25 septembro kelkaj societanoj havis agrablan ekskurson al Petrie, kaj amuzis sin per babilado, banado en la rivero, ktp.

Ankoraŭ venas petoj pri informoj, kaŭze de la radioparoloj el la ŝtata radiostacio 4QG; kredeble la reklamo grave helpos nian propagandon.

THE TECHNICAL PRESS AND ESPERANTO.

Following the example of other technical and scientific journals, the *Revue Stenographique Belge* (Duploye) will, commencing with its February number, publish summaries in Esperanto.

—I.E.S.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon **POB VI MEM AC POR VIA AMIKO?** Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 **EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

EDUCATE THE PRESS.

Perhaps the most conservative of all English speaking institutions is the Press. Most of the great newspapers and journals jealously guard their columns against anything which hints at propaganda of a line of thought of which the editors and owners are unacquainted. This applies equally to religious matters, literature, politics and industry.

Only after years of gradual association with an idea do they venture to publish matter which the press of many other nations look upon as ordinary matter of public interest.

In this way many great inventions have been lost to Britain. The keen active brains of the Latin races are quick to see and appreciate the value of discoveries in every field of research and invention.

It is admitted that the slow plodding instinct of the British makes for solid progress, even if slow. Nevertheless the rapid development of education among European and Asiatic peoples has resulted in a keener perception in their minds of the real material and economic value of new theories and inventions.

This aspect of the modern trend of thought is not fully appreciated by the collective British mind.

In no field of activity is this more evident than in the press of other countries. Let a new idea in connection with industry, science, politics or other field which affects the common weal, be produced, and immediately the weight of many influential newspapers is used to encourage its exploitation. This applies among other things to Esperanto.

The average British pressman regards the international auxiliary language as something to be regarded with suspicion, as a fad, or as propaganda from a tainted source. Contrary to this, the press of most other countries look upon Esperanto as an inspiration. To them it promises a means for increased commercial prosperity, greater facilities for trade, a method of quick, easy communication.

Quick thinking minds realise the hundred and one ways that Esperanto opens up for national progress and the various national journals open their columns to Esperanto. Every important European city is us-

ing the international language in connection with great exhibitions promoted by Chambers of Commerce and Manufactures. By this means much trade is being diverted from British manufacturers.

A logical course suggests itself. The national press must be educated. The work of influencing and teaching can be done by those who already have taken the trouble to learn. A steady, constant flow of short articles, paragraphs, notes, cuttings, etc., from Continental and Asiatic journals, translations, reviews of books originally written or translated in Esperanto should be sent to the various editors. By these means it is possible to create a demand. Here is a field in which all who realise the benefits of Esperanto may do individual work. Verb sap.

RECENZO.

HISTORIO DE SAIDJAH KAJ ALIAJ VERKETOJ. Esperanta oficejo, Liem Tjong Hie, Semarang, Java.

Tiu ĉi libro estas verkita de la fama aŭtoro holanda MULTATULI kaj tradukita esperanten de konata orienta esperantisto. Ĝi estas unika en ĝia speco: holanda verko de okcidenta aŭtoro, kiu bone scias la javan estintecon, esperantigita de sudamarbino, kaj prezentita al la ĉiunacia gesamideanaro.

Ni menci la enhavon: Antaŭparolo 1 Historio de Saidjah kaj Adinda; 2 Alparolo al la estrop de Lebak; 3, La balĝiro (superakviĝo); 4 La japana ŝtonhakisto; 5 Thugater; 6 La Branĉkolektantino; 7 Kredkonfeso.

La historio de Saidjah prezentas la rakonton de du geamantoj junaj indigenaj, kiuj ambau devas pereji pro bedaŭrindaj misŝtatoj. La rakonto estas vekrio pro la lama malbona superrego. El la du sekvantaj rakontoj ankau eliras plendo por la java indigeno. La 4 aliaj estas veraj sencenhavaj verkoj el la vivo. La stilo de la aŭtoro estas rimarkinda kaj la tuto prezentas anime vere inspirantan verkon. La prezo estas malalta: po peco nur 14 Svisaj frankoj au kvar respondukuponoj.

ANONCO.

Seriozajn korespondantojn en Aŭstralio deziras sinjoro Jozefo Grau, Caldetas (Barcelona), Hispanujo.

IDOLA FORI.

Translated from the Esperanto of Prof. T. Cart.

Idola fori, idols of the forum, was the name given by Bacon to those errors which we owe to the influence of certain oratorical tricks of speech, certain commonly accepted aphorisms.

Without doubt many of our opinions as to artificial language belong to the same category.

Let us then examine some of the most common of our "truisms."

How readily, when discussing pronunciation, we reiterate: "One letter, one sound"? But no one possessing a delicate ear could doubt that that is not true concerning the vowels; as to the consonants also, such an overstrong assertion is wrong; if we wish to pronounce Z easily and correctly, K necessarily sounds like G in the word *ekzemplo*—and B sounds like P in *absurdi*.

Are we then to blame Dr. Zamenhof for this? Is the matter of any importance? No, certainly not!

Our rules, because they are intended to be practical, are, and must ever be, only approximate. More than sixty characters would be needed to indicate the different sounds of Esperanto, which language, however, for reasons of euphony does not possess too many. Sixty characters! Any attempt at practical usage or propaganda under such conditions would be impossible.

To change the form of a word would not meet the case; such a remedy would make reading extremely more difficult.

Well then, should the above rule be abandoned?

No; but let it not become an idol!

Some say: "One word, one meaning." They cry out because *"romano"* means both "a man who lives in Rome, or who has become possessed of Roman citizenship," and "a work of belles lettres."

But is that, too, important? No, certainly not!

If we were to do away with those double-meaning names of things and qualities we should need such a huge number of words that no one could learn them. The sentence itself defines for us the precise meaning of each word, and that suffices.

It is advisable then to retain the rule, but we must not make it an idol.

Others are of the opinion that the roots should never finish in a seeming suffix. They cannot sleep because the "Fundamento" contains such words as *"betulo," "kulero," "muslino."* They want us to cripple every future newcomer, even if it is necessary to retain the old.

But, in advising such a course, they reject the entirely commendable and practical course indicated by our Master. Soon the principle of internationality would break down under a pitiless and complicating logicity.

The same may be said in response to those who declare that we must have one root, and only one, to express the one idea. They chide Zamenhof because his *"Universala Vortaro"* gives us side *"redaktoro"* and *"relakcio," "barbo"* and *"barbiro," "kancelario"* and *"kanceliero"* and so on.

Logically these people appear right but practically, by such a hard and fast rule they would hinder the introduction of many international words that we really want and which general use inevitably, and in spite of unnatural barriers, will admit into the language, because such words are already accepted into the languages of all civilized nations, and are clearer, more understandable, and more convenient than the more logical but not international forms; such are the roots *"federacio,"* found by the side of *"federi"* and *"federo," "halucinacio"* with *"halucini"* and *"halucino," "evolucio"* near *"evolui"* and *"evoluada," "elektriziti"* near *"elektrigi"* (1) and *"elektro,"* and so on.

When we use them, let us not regret it as though we had sinned against some "single-root" dogma. In such cases no rule can be absolute; it must be always relative.

Let us not make it an idol!

Dr. Zamenhof, by his liberal application of the "Fundamento," has pointed out to us the reasonable measure, the practical method.

Let that work remain our model, for it is the sure bond of our unity!

(1) Although the significations of *"elektriziti"* and *"elektrigi"* are not the same, the difference between them is not, in common speech, important.

THE WORD "NE."

The word "ne" negatives that word which immediately follows it in the same sentence. This seems very plain; but in practice it is not easy for learners to appreciate the difference in meaning corresponding to the different positions of "ne" in the sentence; and it is a good exercise to alter its position and then translate the sentence. We may take an example from that casket full of gems of word-meaning—Millidge's Dictionary.

(1) Vi ne devas diri tion—You have no need (ought not) to say that.

(2) Vi devas ne diri tion—You must not say that.

(3) Ne vi devas diri tion—It is not you that must say that.

(4) Ne tion vi devas diri—It is not that that you must say.

There is a tendency to place the "ne" before the first of two verbs when it should be before the second: thus—"Mi ne devas forgesi tion," instead of "mi devas ne forgesi tion."

We must also remember that "ne" when used as a prefix affects only the root, but, if unattached, negatives the whole word, thus:—neaperigi—to cause not to appear, but "ne aperigi"—not to cause to appear.

MANY TONGUES.

PCJJ Adds Esperanto.

In conducting its world-wide broadcasting experiments, PCJJ, at Eindhoven, uses many languages and listeners have been surprised at the facility with which announcers change from one tongue to another. English, French and German are used with equal fluency to the native Dutch and Flemish.

The Sydney Esperanto Society has received word that Professor P. A. Schendler, official representative of

the Esperanto movement in Eindhoven, will now broadcast in the international language.

Preliminary announcements concerning these transmissions will be made from the station and Australian listeners are asked to forward any helpful information to the Sydney Esperanto Society, Rawson Chambers, Rawson Place, Sydney, or phone the president, Mr. F. T. Simon, FX5549.

PCJJ broadcasts on a wave length of 30.2 metres on Tuesdays and Thursdays from 7 to 9 p.m. -G.M.T.

—"The Sun," 1/10/27.

BRISBANE ESPERANTO CLUB
kunvenas la trian Mardon ĉiunonate, 7.45 p.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Vic-Prezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro N. Grant; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society, Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobartia Esperanta Grupo, Kunvenejo: Katon-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW." Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.
Melbourne (Aŝtralia).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŝtralia: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŝtralia: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 89 (Eighth Year) Melbourne (Melbourne), Australio. 10 Novembro 1927

ANSWERS TO QUESTIONS RE LANGUAGE.

Concerning the Style of My Recent Works.

You write to say that in my last translations you sometimes find difficult passages. Wishing to convince a non-Esperantist of the wonderful clarity of Esperanto you began to translate for him certain lines of "La Fabistoj" out to your great disappointment you came across a sentence which you yourself did not fully understand, as was also the case with several other Esperantists whom you asked to help you, for they either failed to comprehend the text at all or translated it differently! I can understand your embarrassment, and if it was caused by my faulty translation I ask your pardon; . . . but permit me to suggest that you in part are also responsible. When making an unprepared experiment of such a nature before a non-Esperantist you should have chosen, not a classical and serious work, but some lighter and more simple writing. If this or that sentence in the translated work of a long-departed classicist is not readily comprehensible, it is often the fault, not of the language into which it is translated, but rather of the author himself. You know of course, that the really great writers—those who care more for the con-

tent of their writings than the popularity of the form in which they are cast, often themselves need commentaries, because even their fellow-countrymen fail to grasp the meaning of this or that expression in their works. Do not be surprised, therefore, if in my translations of the classical writers you sometimes find a passage which at the first reading seems murky to you. If it were my intention to give only translations in a popular style of writing I should (1) choose for translation only popular works, (2) all lines not perfectly understood or with difficulty translatable I should either leave out altogether or translate freely, as I thought fit. Such a procedure would be very easy for me, and would claim far less time than does my present system of translation, which often compels me to give long consideration to this or that expression or sentence. But although the apparent value of such translations would by that means be greater, their real value would be much less because (1) in that case our literature would consist only of unimportant works, (2) the translations would not be trustworthy and would be an inaccurate rendering of the original, and (3) our language would not be enriched and would not develop. Especially to this last point would I draw the attention of our writers; it is very desirable that we do not avoid difficulties in translation; rather should we search them out and mas-

ter them, for only in that way will our language become fully developed. We must, of course, avoid national idioms which are not necessary to the text, and must try to translate their sense in the most logical and international manner; but such expressions as are necessarily possessed by every language we must endeavour in some way to translate, and not simply avoid them through fear that they may not please the reader, or that not everyone will fully understand them. One of the chief tasks of our writers must be the development of our language; therefore, if certain expressions which not everyone understands (such as "elrigardi", "subaĉeti" and so on) seem to him to be obscure, he must try to displace them by other and better forms. But if in the endeavour to avoid spoiling their style they avoid the translating of such expressions, they do our language a great disservice. Of course, in this, as in all else, a reasonable measure must be observed. "Not carelessly; not too much at once." New expressions must be introduced little by little, imperceptibly. Besides that, we must remember that our language has to serve not only for documents and contracts, but also for life itself; therefore, (especially in dramatic dialogues of a realistic nature) the crisp and short phrase, even if it is not wholly logical, is often better than a phrase perfectly precise but tiringly heavy and labored.

THE VIENNA TRAMS AND ESPERANTO.

Viennese policemen who speak Esperanto wear a badge on their uniform by which they can be recognized in the street. Tram conductors will shortly do the same under an order of the Directorate and the recommendation of the Traffic Commission.

—I.E.S.

INTERNATIONAL FAIRS AND ESPERANTO.

As in previous years, the Office of the Francfort-on-Main Fair has distributed a very artistic prospectus in Esperanto for the Spring Fair of 1927. The Office will also issue a register of branches in the same language with translations in few other languages.

RECENZO.

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO (Dua Parto): La Movado 1900-1927; de Edmond Privat. Eldono de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig; 199 paĝoj. Prezo 6k.

Doktoro Privat estas ankoraŭ juna homo, sed li apartenas ankaŭ al la "heroa epoko" de nia movado; en la tempo, kiam "estis gigantoj en la lando," li ja estis unu el la gigantoj. Li rakontis aliloke, ke la redakcio de "Juna Esperantisto" (Hector Hodler kaj li mem) sidis kvin jarojn sur la sama benko de gimnazio kaj kaŝe skribadis kovertojn aŭ legis patrajn leterojn de doktoro Zamenhof kaj profesoro Cart. Kaj en la nova tempo de Esperanto, la pli proza (kaj pli triumfa!) postmilita epoko, doktoro Privat estis ĉiam en a centro de la agado, li kvazaŭ portis sur la sul-troj la ŝargon de nia afero. Kiu do pli bone povas ĝin rakonti?

Kaj tio ĉi estas loga, eĉ iom sorĉa rakonto. "En la jaro 1900 Ruslando enmanigis la torĉon de l' esperanta lumo al la Francoj"; per tiuj vortoj komenciĝas la libro, kaj la rakonto daŭras ĝis la preparoj por la kongreso kaj somera universitato de Danzig en 1927. La kresko de nia afero dum la "Franca periodo," la neforgesebla unua kongreso en Balonjo (Boulogne-sur-Mer) en 1905, la sekvanta vere internacia periodo kaj niaj progresoj ĝis la nuna tempo . . . ĉio estas vive prezentataj per la trafa kaj klara stilo, kiun la "Svisa skolo" konigis tra la tuta mondo. La rakonto tuŝas ĉiujn flankojn de nia movado: la kongresoj, la fonda de UEA (tiu verko de tre praktikaj revolvoj), la Delegacio kaj la Ido-krizo (kiom malproksima tio jam sajnas!), la Lingva Komitato, la organiza batalo, kiu tiom riĉigis nian lingvon per administraj vortoj kaj frazoj, la laboro dum la milito kaj la postmilita rekonstruado, la peresperantaj teknikaj kongresoj, kaj la disvastigo de nia afero en internaciaj sferoj (Ligo de naciaj, Internacia Laboroficejo, Telegrafa Unio, Unio de Radiofonio, k. a.) Ĉio ĉi iam estas temo de epopeo, ne nur de simpla senafekta historio.

De historio kaj literatura flankoj la libro havas grandan valoron, sed ne sole de tiuj flankoj. Ĝi estas mino de praktikaj informoj por la propagandisto, kaj enhavas en si

multajn respondojn al la plej oftaj kontraŭdiroj. Ekzemple, la plej konata estas, ke la lingvo eble difalos en dialektojn; sed la aŭtoro majstre rebatas tion, ne nur per apelacio al la praktika vivo de nia lingvo (regas nun en ĝia uzado pli da unueco ol iam antaŭe), sed ankaŭ per montrado de la centrigaj influoj de moderna vivo, telegrafo, aeroplano, radiofonio, gazetaro kaj aliaj, kiuj same emas unuecigi la plej disvastigitajn naciajn lingvojn kiaj la Angla kaj la Rusa. Pri la valoro de simpla komuna lingvo en internaciaj kongresoj la aŭtoro donas frapantajn ekzemplojn: "En multlingvaj konferencoj regas ĉiam la grandlingvanoj, Angloj, Francoj aŭ Germanoj. La ceteraj ofte balbutas malfacile . . . timas ofendi aŭ ridigi tiujn, kies gepatran lingvon ili nevole difektas." Sed en konferenco uzanta Esperanton ili ne devas pensi, ĉu luno estas vira aŭ la suno virina, aŭ male, ĉu la verbo formiĝas regule aŭ malregule ktp; ne; ĉiu sentas sin egala kun la ceteraj, kaj ne timas erari. "Se ĉiuj aliaj popoloj interkomprenus sin tiel bone, kiel Angloj kaj Aŭstralianoj en kongresoj aŭ konferencoj, la mondo pli sanus."

De lingva vidpunkto la libro staras en unua rango; tion certigas la nomo Privat. La stilo estas pli regula kaj sobra ol la trafa kaj iom afekta stilo, kiun la aŭtoro uzis en sia "Vivo de Zamenhof." Kelkaj vortoj estas notindaj. Ĉu ni bezonas "bankedo," havante jam "festeno"? El neoficialaj vortoj, oni notas "elito, ekskludo, inkludo, stabileco," kies neceso estas diskutinda. La radiko "adult" estas uzata en senco "plenaĝulo, plenkreskulo"; ĉar laŭ la fundamento ĝi havas tute alian signifon (rompo de geedza fideleco), tiu uzo kreas konfuzon. Kaj . . . ĉu mi kuraĝos diri ĝin? . . . mi trovis kvar gramatikaĵn erarojn: "La membroj . . . sidas 9 jaroj" (paĝo 75); "kiu forgesigas malsaton kaj hejmosopiro" (p. 96); "En Brazilio, leĝo de 31-an de Oktobro 1918" (p. 107); kaj "de l' 2-an ĝis 8-an de Aŭgusto" (p. 175). Ho, doktoro Privat, doktoro Privat!

La libro estas bone bindita kaj impresa volumo, kaj valoro riĉiĝo de nia literaturo, efektive tia verko, kian ni kutimas ricevi de la entreprenema firma Hirt.

A.D.

RECENZO.

Citlibro Por Seriozuloj.

"Zamenhof-Radikaro", eldono de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

La titolo de tiu ĉi libro, eldonita de la firma Wuster, povas estigi erarkomprenon de la ekleganto. Tion ĝi miakaze faris. La nomo de la verko pliguste povus esti la jena longajo: "Ĉiuj neoficialaj radikoj uzitaj de Zamenhof; kaj de la verkintoj en 'Fundamenta Krestomatio'; kaj de tiuj en 'La Esperantisto' (1889-95), kune kun iliaj ĉefaj trovlokoj." Sciencista studo—"Gradoj de Esperantigo," pritraktanta la demandon pri la transkribo de naciaj propraj nomoj en Esperanton, kaj lerte metoda "Klarigo pri la fontindikoj," ambaŭ modeloj de Germana ellaboriteco, klarige helpas konsistigi tiun ĉi 84-grandpaĝan vortarostudolibron. Kiel Zamenhofaĵo estas rigardataj tiuj radikoj, kiujn prese aŭ skribe uzis aŭ rekomendis d-ro L. L. Zamenhof, laŭ ekzistantaj dokumentoj, kaj "neoficialo" karakterizas ĉiun radikon ne-estantan en la "Oficiala Radikaro" de Wuster (1923) kaj ties suplemento (1924). Ĉi-rilate estas interese iom studi la diferencon inter la enhavoj de la "Oficiala Klasika Libro" de Grosjean-Maupin, la "Oficiala Radikaro" de Cart (1922), kaj la supre nomita, kiun Wuster aŭtoritatigas.

La libro estas nur provizora, kaj komenciĝas por jam nun iom kontentigi la urĝan deziron de la Esperantistaro pri plena Zamenhofa konkordanco, kiun oni intencas eldoni post finapero de la ĉionpostulanta, antaŭ ĉio gravega Enciklopedia Vortaro, kies kvara parto nun estas presata.

Kompletecon de la radikoj ili aspiris sed ne atingis, ĉar du gravaj verkoj de Zamenhof (restaĵo de la Malnova Testamento, kaj parto dua de la Fabeloj de Anderson) ne aperis sufiĉe baldaŭ por inkluzivigo. Ĉe speciale rimarkindaj maloftaj radikoj ili klopodis plimulte pri kompleteco, ol ĉe esprimoj tre ordinaraj.

Kvankam ĝi estas eldonaĵo nure portempa kaj verŝajne amstataŭota per kompletigita plenradikaro, la verko estas tuja respondo al forta bezono, preta cifonto por la studento, kaj krome havas tion, kio mankas ĉe la Encik. Vortaro, nome, precizaj indikojn de la ĉefaj trovlokoj.

Tio multe ŝparas tempon, kaj ĉe granda nombro da studentoj povas forigindigi kiel nenecesajn la malnete prilaboritajn notarojn kaj "hejmefaritajn" citlibrojn.

Mi donu ekzemplon: —Malpacience mi gratas la kapon, ĉiam demandante min, kie trovi la Zamenhofan neoficialan "celebri," kiun mi nebule rememoras vidi ĉe dum mia disa legado? Sen la pritraktata libro mi povus vane dum horoj serĉadi, febre fokumante la "ordigitajn" kaj laŭmetodajn citaĵojn de mi de tempo al tempo faritajn. Sed per helpo de la nuna volumo mi facile povas surfingrigi la sinkaleman vorton, kiu ja la Majstro uzis unufoje . . . ĉe pĝ 10 de "La Rabeno de Balarah." Samfoje en la literaturo "ekspedicio," ĉe "La Rabistoj" 84, kaj leksikografie ĉe la vortaro Esperanta-Rusa. Ankorŭe, ni rigardu vortolistojn de aliaj aŭtoritatuloj, kiaj Jan Janowski, unu laborinto por la "Fundamenta Krest." Tie ni sciiĝas, ke li uzis "organizatoro" (201 pĝ.) kun tiama aprobo de Zamenhof; ke li anonimulo (85 pĝ.) elplumigis "uzurpatoro"; ke eble estis Mejerkszky, kiu donis al la mondo (vol. v, 95, 112 "La Esperantisto") la rimarkindan historiaĵon "asociacio"; ke antaŭulo nenoma ĉe iv, 142 uzis "gentlemano," kaj ke N. Borovko (v, 105) enkondukis prove "cinismo" (cinikeco).

Por tiu libro mi faros kuŝlokon ĉe sur mia bretaro; ĝi enrigardate sin trovos ofte en miaj manoj ĝis kiam la kompletigita plena radikarokondanco de la Majstro slavice prenos ĝian niĉon.

La prezo estas 6 ormarkoj laŭ la Hirt katalogo.

ROBO.

ANNUAL MEETING OF U.E.A.

This year's U.E.A. annual meeting will be held on 25th November at 8 p.m., in the rooms of the Melbourne Esperanto Society, 323 Bourke Street.

This meeting is specially important as Delegate and Vice-delegate for Melbourne for the next three years will be elected. Strenuous efforts are being made to insure a continuance of the various activities of the Association, and the chief delegate for Australia, hopes that all past and present members will renew their subscriptions and help in all other possible ways.

KRONIKO.

BRIBANO (Kvinslando). — Vespere festo (danco kaj amika kunveno) okazis la 12 oktobro en Suda Erisbano, aranĝita de la sindona fraŭlino Allie McCarthy kaj aliaj fervoruloj. En bele ornamita salono la samideanoj kaj iliaj amikoj dancis kaj sin amuzis ĝis malfrue. La festo plene sukcesis ankaŭ de financa vidpunkto, kaj riĉigis la kason de la societo per kelke da funtoj.

La 18 oktobro la societo akceptis kun granda plezuro sian anon sinqoro P. Proctor, kiu ĵus revenis el kelkmonata vojaĝo en Japanujo. Sinqoro Proktor rakontis siajn aventurojn de vojaĝado kaj precipe interesis la anojn per la profito, kiun li tiris el la uzado de Esperanto. La kono de la lingvo grave helpis lin ne nur en veturado, sed ankaŭ en la esplorado de liaj fakaferoj, celo de lia vojaĝo.

La societo decidis kunveni ĉiulusemajne anstataŭ monate; oni kredas per tio pli utili al la anoj, aparte al la pli junaj Esperantistoj, kiuj havos pli oftajn okazojn por ekzercado pri la parolado de la lingvo.

La regna turisma oficejo permesis afikson de anonco en sia ejo montrantan adresojn de la delegito kaj vicedelegito de UEA kaj de la sekretariino; nepre utila al trapasantaj samideanoj.

MELBURNO. V. — Dum lastaj semajnoj alvenis en Melburnon la atendita mondvojaĝanto, s-ro Edmund Zschiele, kaj anoj el ambaŭ Esperanto Societoj laboris kune, por fari lian restadon en Melburno agrabila, kaj ankaŭ fari propagandon el la vizito. Sekve, laŭ aranĝo en la halo de la Aŭstralia preĝejo, s-ro Zschiele faris interesan paroladon pri siaj spertoj en la multaj landoj tra kiuj li vagis. Ne mankis prezentantaj kaj aliaj paroladetoj de kelkaj anoj, kaj ankaŭ malgranda teatraĵo tre placia.

Du vesperojn poste, en la ĉambroj de la Melburna Esperanto Societo, okazis tre sukcesa dancaĵo. S-ro Zschiele ĉeestis kaj denove parolis pri siaj spertoj kaj la utileco de Esperanto dum sia vagado tra la mondo.

S-ro L. Hiob, el Estonio, brodkastis de SIO, je okt. la. La parolado estis tre klara kaj interesa. La sin-

joro koste parolis ĉe la Esperanto Societo, pri siaj "Vojaĝimpresoj" kaj montis tre bonan stilon.

SYDNEY, N.S.W. — La 2an kaj 3an oktobro, kelkaj Sydney Esperantistoj vizitis la urbon Newcastle, kie ili estis bone gastigitaj de la tiaj samideanoj. London la 3an, ili vizitis la grandajn ŝtalfabrikojn ĉe Fort Waratah. Oni aranĝis piknikon por la ĉi grupoj ĉe Gosford, kiu estas duonvojo inter la du urboj, okazonta en komenco de decembro.

Laŭprograme s-ro E. A. Fryke intencis paroladi, la 6an pri "La frateco de la homoj," sed li ne povis ĉeesti. Anstataŭ li, s-ro D. N. Edmonds, donis tre interesan paroladon pri la piramidoj en Egiptujo.

La 20an, s-ro A. Auwart donis bongan lumbild-paroladon pri sia hejmlando Estonia, kaj Finnlando.

Je alia vespero, oni havis "Kantadon Vesperon," kiam la samideanoj kune kantadis Esperantajn melodiojn.

Krom la ĉiomonata dancado, oni nun havas du aŭ tri piknikojn ĉiunmonate. Dum tiu ĉi monato, la ekskursoj estas al Lase Cove Rivero, kaj Vaucluse parko.

Aperis artikolojn pri Esperanto en la jenaj gazetoj:—Newcastle Sun, 14-1X. Sydney Sun, 1-X. Labour Daily, 5-X. Telegraph, 7-X. S. M. Herald, 1-X. Wireless Weekly, 28-X.

AUCKLAND, Nova Zelando. — Dum la septembra kunveno de la ĉi-tiea Societo, oni bonvenigis s-ron Sturge, vic-prezidanto de la Esperanto-Asocio ĉe Birmingham, Anglujo. En intereso-plena parolado la vizitanto rakontis al la ĉeestantaro siajn spertojn ĉe Esperanto-kongresoj okazintaj en diversaj Eŭropaj urboj. S-ro Sturge diris, interalie, ke li ricevis agrablan surprizon pri la miriga spirito de frateco kio ekzistas inter la Esperantistaro; ankaŭ ke, ĉar la naciaj kostumoj ne multe troviĝas en kongresoj, estas malfacile scii la naciecon de la partoprenantoj. Tio-ĉi sendube konfirmas la universalecon de Esperanto.

La Danziga Kongreso estas forpasinta. Ĉi-tie, fakte tra la tuta lando, oni atendis kablagramojn raportantajn detalajn pri la kongreso, sed krom unu escepto, nenio estis publikata. La escepto estis kablo el Londono datita 21an septembro, kio konsistis el nur ĝenerala raporto de la Aŭstralazia delegito, s-ro J. G. Pyke, kiu donis siajn impresojn kongresajn, kune kun spertoj en la Balkanoj. La gazeto, "N. Z. Herald," traktis la novaĵojn bonforme, provizante tre alogan rubrikon je la supro.

Estas granda bedaŭro ke plena raporto pri la kongreso ne disdoniĝis telegrafe al la gazetaro, ĉar se jes, la movado tre fortiĝus kaj kredeble rajnus multajn geamikojn. Pro manko de tiaj raportoj la Nova-Zelanda publiko ne scias dum kvin jaroj ke Esperantistaj kongresoj eĉ okazis. Estas tre konsilinde ke la diversaj kongres-komitatoj pli zorge atentu pri tiu — ĉi afero. Kvankam detaloj rilate al naciaj kongresoj kaj konferencoj de Esperanto ne estas atendataj, ŝajnas ke sciligo pri la tutmonda kongreso estus disvastigitaj senprokraste ĉu kable aŭ radie. Per tio sendube la lingvo en malproksimaj landoj en kiuj ni bataladas por enkonduki Esperanton ricevos stimilon.

MASTERTON, N.Z. — La Esperanto-klaso bone funkciadas. Estas kun granda plezuro kaj kontento ke la gvidantoj povas anonci pli multigon rilate al anoj. Tio-ĉi montras ke la lingvo disvastiĝas kaj populariĝas. S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato, agas kiel sekretariino kaj s-ro Dewar, ĉe Y.M.C.A. estas la instruanto.

WELLINGTON, N.Z. — La refofondita klubo iom post iom firmiĝas. La membraro kreskas kaj la komitato preparis regulojn, kiujn la klubo akceptis ĉe ĝenerala kunveno dum 22a septembro, kiam ankaŭ oni aranĝis kunveni ĉiujnmonate anstataŭ dufoje monate. Per tio, la lernantoj de la klubo ricevas daŭron instruadon.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POB VI MEM AC POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

La fondiĝo de la klubo okazis ĝustatempe, kaj eĉ je tiu frua stadio de ĝia ekzistado faris multe por la lingvo. Al la fino de septembro, ĉefministro sinjoro Coates rekte atakis Esperanton kaj kiel rezulto vortbatalado daŭris per la kolonoj de la gazeto, "The Dominion." La prezidanto kaj sekretario partoprenis en la polemiko. Kvankam la ĉefministro parolis malfavore kontraŭ Esperanto (li montris kolosan nesciecon pri la temo) li efike propagandis la lingvon samtempe provizante okazon al la Esperantistoj antaŭenmeti publike diversajn detalojn kaj informojn.

La radia Esperanto-kurso antaŭeniras bonege. Ĉiusemajne de post komencigo leciono estis brodkastata, nenia menciinda interrompo okazinta. Je skribtempo, dek lecionoj estis klarigitaj. Laŭ nunaj aranĝoj la kurso finiĝos dum 15a decembro post kiam plena raporto rilate al la afero estos prezentata al legantoj de La Suda Kruc.

NEKROLOGO.

Kun profunda malĝojo Esperantistoj en Aŭstralio kaj Nova Zelando sciigis kaj sciĝis pri la morto, ĉe Aucklando, N.Z., dum 25a septembro, 1927a, de Johano Lowe King.

